

**LA DOMO**

**INTER**

**LA DUNOJ**

**MAXENCE VAN DER MEERSCH**

**El la franca tradukis Mikelo (Michel DEREYGER)**

# **El la originala romano «La Maison dans la Dune»**

**Albin Michel (1932)**

Mi dankegas plurajn geamikojn kaj samideanojn pro iliaj konsiloj, rimarkoj kaj valorega helpo!

Mi precipe ŝuldas multajn dankojn al Ginette MARTIN kaj Philippe COMBOT, kiuj amike relegis kaj poluris la tradukon!

Sed ankaŭ al NOĈJO (Noël Lecomte), IVAR Barshevskiy, JADRANKA Miric, DOROTA Burchardt.

Kaj Anjo, Pascal Vilain, Cezar, Tjeri, Michael Lennartz ...



## UNUA ĈAPITRO

Silvano iris de domo al domo por proponi belgan tabakon.

Por sonorigi ĉe la pordoj kaj fari siajn ofertojn al la klientoj, li havis sian propran manieron, la manieron de la « fraŭdantoj<sup>1</sup> », kiuj neniam scias, ĉu ili tuj vidos fronte al si amikon aŭ malamikon. Sian biciklon li apogis kontraŭ la muron, tintigis la sonorileton kaj revenis al sia maŝino. Li surbicikliĝis, metis sian piedon sur la pedalon, sin tenis preta por tuj starti. La pordo malfermiĝis.

- Ĉu tabakon ? mallaŭte demandis Silvano.

- Ne ĉi-semajne.

La pordo refermiĝis. Kaj Silvano iris pluen por sonorigi ĉe alia pordo.

Silvano estis tridekjara viro, altstatura, kun larĝaj ŝultroj, vizaĝo, kiu plaĉis, ĉar io naiva kaj sincera troviĝis en ĝiaj trajtoj. Neorde kreskintaj kaj mallonge tonditaj, liaj kaŝtankoloraj haroj falis sur lian grandan frunton. Lia nazo de eks-boksisto estis en sia bazo platingita kaj plilarĝigita, sen esti pro tio tute deformita. Li havis brunajn okulojn malgrandajn kaj brilajn - almenaŭ tiun, kiun oni vidis, ĉar la alia estis tute kaŝita de grandega violkolora ŝvelaĵo. Tio malbeligis lin, misformis lian vizaĝon, sen abomenigi liajn trajtojn, sur kiuj oni povis legi ian simplaniman mildecon, kiu kurioze kontrastis kun lia atleta korpo. Li estis vestita kiel masonisto. Lia peza pantalono el veluro de Amieno falis en abundaj faldoj laŭlonge de liaj kruroj, kaj estis firme tenata ĉe lia talio per blua flanelzono. Sur sia torso li surhavis veŝton tajlitan el la sama ripa veluro, sur kiu estis kunkudritaj manikoj el brile nigra forta ŝtofo. Tute makulitaj aspektis liaj blankaj ŝnurŝuoj. Lia tuta vestaro estis kovrita de krustoj el mortero kaj de fajna kalkopolvo. Masonŝovelilon kun kvadrata feraĵo li estis ŝnurliginta sur la

---

<sup>1</sup> Fraŭdi tabakon : (en Flandrio, antaŭ la malapero de landlimaj doganejoj) kontrabandi tabakon.

horizontala stango de sia bicikloframo. Per unu mano li tenis la stirilon de sia biciklo, per la alia li ekvilibrigis surŝultre cemento-sakon, kiu estis supozata enteni liajn trulon kaj laborilojn.

- Ĉu tabakon ?

- Du paketojn.

Por la virino, kiu petis ilin de li, Silvano elŝovis du duonfuntajn paketojn el sia sako.

- Kiom ?

- Dudek frankojn.

Li ricevis la monon.

- Ĉu mi pasu venontan semajnon ?

- Ne. Post du semajnoj vi povos reveni.

- Dankon.

Kaj Silvano plu iradis, plu sonorigis ĉe la pordoj ĉie, kie li havis konatajn klientojn. Aliloken li ne iris, krom en la senhomajn kvartalojn, la domaretojn meze de la kamparo, la izolitajn farmobienojn. En la vilaĝoj oni povis sonorigi senriske ĉe iu ajn pordo. Sed ĉi tie, ĝuste en la centro de Dunkirko, oni ĉiumomente riskis trafi doganiston, « negron » - civile vestitan doganiston - kiun ne trompus la honestaspekta vestaro kaj la sako de masonisto.

« Ĉu tabakon ?... Ĉu tabakon ? »

Sur lia ŝultro, la sako iĝis malpli peza kaj Silvano mense kalkulis : kun sep kilogramoj li foriris ; jam iom pli ol kvar li vendis. Por sia tabako, li pagis po dudek kvin frankojn kilograme. « Laŭ vizaĝo de l' kliento », ĝin li revendis de tridek kvin ĝis kvardek. De la tagmezo li jam perlaboris, li kalkulis, proksimume kvindek kvin frankojn. Kaj tio ne estis malfacila. Oni ankoraŭ trovas profiton, pagante dek frankojn por unu duonfunto da bonkvalita belga tabako, dum la malpli multekosta franca tabako kostas pli ol dek kvin frankojn.

Tuta ĉeno da perantoj tiel vivas per tiu ŝakrado, de la « fraŭd-

estro » ĝis la detalrevendistoj. Oni pagas por la belga tabako dek ses frankojn, kio egalvaloras dek unu frankojn en franca valuto. La estro donas por « la portado » ses frankojn al la homoj, kiujn li dungas por alporti ĝin al Francio. Kaj por dudek kvin frankoj li revendas ĝin. Ankaŭ la revendisto, kiel Silvano, elprenas profiton de deko da frankoj. Kaj liaj klientoj, ĝenerale kafejestroj, plejofte plu revendas la tabakon al ŝatantoj, tiel deprenante el la varo kvaran dekonajon.

« Por hodiaŭ sufiĉas, opiniis Silvano. Mi povas reiri hejmen. »

Vizitinte du aŭ tri pliajn trinkejojn, li lastfoje ekrajdis sian biciklon kaj ekprenis la vojon al Furnes<sup>2</sup>. El Dunkirko li eliris, dum momento sekvis laŭlonge de la kanalo la vojon de Dunkirko al Furnes kaj trairis ponton. Oblikve irante en la direkto al la maro, li alvenis la senarban kaj sablan parton de la marbordo, kiu etendiĝas tutnuda, arida kaj preskaŭ senkultiva, kilometrojn post kilometroj, ĝis Bray-Dunes<sup>3</sup> kaj la belga landlimo. Dum momento li ankoraŭ rajdis tra mallarĝa vojeto, kiu trapasis tiun tristan landon, proksime al la marbordo. Tie etendiĝis iuj malriĉaj kultivejoj, herbejoj el maldensa herbo, ĝardenetoj en kiuj bone kreskis nur terpomoj. Ili alternis kun vastegaj sterilaj surfacoj fuŝlasitaj al la invadado de la dunoj. Estis regiono morna, seka, trakurita de malagrabra kaj sala vento, kiu pikis la haŭton.

Nepalpebla sablopolvo siblante trairis la herbojn, amasiĝis sur la vojon, desegnante krescentformajn liniojn similajn al etetaj dunkordonoj. Kaj fore, pli forta ekblovego ilin ree kunprenis, ilin kirlomiksis en turbantaj kolonoj, kiujn oni vidis kiel trombojn ĝis nevideblo. Kaj aliaj kolonoj senĉese malsupreniris el la sablomontetoj, kiuj stariĝis inter lando kaj maro. Ili alvenis, kun seka kraketado trapasis la akrajn kaj fuŝkreskajn arbetojn. Foje ili ĉirkaŭis Silvanon per spirala kirlovento, kvazaŭ nepalpebla svarmo de aeraj dancistinoj. Malrapide, tiu feina invado disetendiĝis sur la ebenaĵon, tie deponis tiujn senĉesajn

---

<sup>2</sup> Furnes : [fyrn] franca nomo por Veurne (flandra), en Belgio.

<sup>3</sup> Bray-Dunes : [brɛ'dyn] la plej norda (banloka) urbeto en Francio.

sablokunportaĵojn, la grundnivelon iom post iom plialtigis. Ĉio nerezisteble ensabliĝis. Marflanke la malmultaj domoj, kiujn Silvano trafis, estis enterigitaj, kvazaŭ jam dronigitaj de la dunatakado. Jene, tuj apud Zuydcoote<sup>4</sup>, oni iam konis preĝejturon, en kiun oni eniris tra la fenestroj, kaj kiu - laŭdire de la maljunuloj - estis la postvivanto de enfosita vilaĝo.

En tiu soleco, Silvano biciklis, kun la kapo klinita, la kaskedviziero mallekata sur la okuloj por ilin ŝirmi. Li alvenis al izolita vilaĝeto, konstruita laŭlonge de la vojo, kaj turnanta sian dorson al la marvento. Tie li loĝis. Staris nur sep aŭ ok domoj, el kiuj unu nutraĵvendejo, kie oni aĉetas ankaŭ panon. Tiuj ĉi estis iam domoj por fiŝistoj, nuntempe luitaj al laboristoj plejparte dungitaj en Dunkirko aŭ en la tre proksimaj grandaj ŝtalfabrikoj. La domoj estis malnovaj, konstruitaj el brikoj helflavaj laŭ la regiona kutimo, kaj kovritaj per ruĝaj tegoloj, kiujn la ĉiama vento erodis kaj briligis per senĉesa falo de fajna sablo. Ĝia lanta agado estis eĉ desegninta eluzadostriojn, tie kaj tie ĉi sur la brikoj. Tiuj domoj estis tre etaj, duonenfositaj, malaltaj sub siaj grandaj tegmentoj, tiel perditaj meze de tiu senmezura ebenaĵo. Ĝin limigis norde kaj sude la paralelaj linioj de la dunoj kaj de la kanalo, sed ĝi etendiĝis dekstre kaj maldekstre ĝis la plej fora horizonto.

De dek jaroj Silvano tamen vivis tie, kutimigita al tiu izoleco, al tiu senreliefa seninterrompa tristeco. Neniu arbo, neniu preĝejturo, nur la monotona ondumado de la dunoj kaj, dise, dornohirto de rakitaj arbetoj, haltigis la rigardon. Li alvenis al sia domo, la antaŭlasta el la linio. Li desaltis de biciklo, puŝis la pordon kaj eniris.

- Bonan vesperon, Ĵermena, li deziris.
- Bonan vesperon, diris lia edzino. Ĉu vi bone vendis ?
- Ne malbone.

Silvano demetis sian sakon, enŝovis sian biciklon en la korteton,

---

<sup>4</sup> Zuydcoote : [z<sup>u</sup>id'kot] franca banloka vilaĝo tuj apud Dunkirko.

kaj revenis.

Ĵermena estis bela kreitaĵo, fortika, kun sana karno, la okuloj nigraj kaj viglaj sub densaj kaj tre arkaj brovoj. Ŝiaj grasaj lipoj, sana vizaĝkoloro, karnodikaj vangoj donis al ŝi allogan kaj volupteman aspekton, kiun ne malkonfirmis la moleta malvigleco de la gestoj. Oni sentis, ke ŝi estas malamika kontraŭ peno, laca de la aventuroj dum sia pasinta vivo, kiam ŝi prostituis sin, antaŭ ol Silvano enamiĝis al ŝi kaj edziĝis kun ŝi. - Ŝi sidis ĉe la fenestro, kaj trankvile fadenflikadis ŝtrumpojn.

Vidalvide al ŝi estis Luiza, la dika amantino de Cezaro - la plej bona kamarado de Silvano. Ŝi estis virino brava, honesta kaj iom bonaĉa, kiu tre sincere amis sian pseŭdoedzon, malgraŭ la ŝakrado de tabako, al kiu li ofte dungis ŝin kiam urĝas la laboro. Pasiega « fraŭdanto » estis Cezaro, kiu de dudek jaroj, malgraŭ senĉesaj konfliktoj kun la dogano kaj la polico, ne kapablis reveni al normala vivo.

Eks-boksisto, same kiel Silvano, li iom post iom falis en kompletan senmoralecon, kontraŭvole kuntrenita de fortaj pasioj, kiuj kaŭzis lian defalon. - Li sidis ĉe la fajrejo, kaj fumadis cigaredon post cigaredo, atendante Silvanon.

Reveninte el la korto, Silvano demetis sian kaskedon, alkroĉis ĝin al najlo, kontraŭ la muro.

- Kio ja okazis al via okulo ? tiam demandis Ĵermena.

- Pugnobato, klarigis Silvano unuvorte.

Cezaro turnis la kapon :

- Ĉu vi lasis ilin fari tion ?

- Mi opinias, ke vi mem farintus kiel mi, diris Silvano sen ofendiĝi. Mi renkontis du « negrojn »...

- Kie ?

- Ĝuste alvenante al Dunkirko.

Ĵermena forlasis sian flikaĵon, kaj Cezaro ĉesis fumi.



- Ĉu ili forprenis vian tabakon ?

- Ne. Ili arestis min precize en la vojturniĝo de l' akcizejo<sup>5</sup>.  
Verdire, mian nazon mi preskaŭ frakasis kontraŭ ilin !

- Nu ?

- Tiam estis por mi fuŝo... Al ili mi jam donis mian sakon. Mi opiniis, ke ne tro gravos unu prizonmonato kun prokrasto...

- Ne, samopiniis Cezaro.

- Sed vi tamen havas vian sakon, miris la dika Luiza.

- Lasu min klarigi, Luiza. Ilin mi estis sekvonta sen protesti, sed ili volis min mankateni. Mi estas tro konata por tiele paŝi en Dunkirko, ĉu ne ? Tial ni interbatalis.

- Okazis ja vigla interbatiĝo, ĉu ? diris Cezaro, kies vizaĝo prezentis pasian intereson.

- Certe ja ! Des pli ke unu stulta oficisto de l' akcizejo alkuris, post kiam ili kriegis por peti helpon.

- Ilin vi tamen fine venkis ?

- Finfine, jes. Sed mi ja kredis, ke mi forlasu mian biciklon. La plej vundita estis la oficisto de l' akcizejo . Ankaŭ unu « negro », kies nazo sangis kiel fonto. Sed tiu min mordis ĉi tien : rigardu !

Silvano levis unu manikon, montris sur sia bicepso profundan bluaĵon de mordovundo.

- Oni tuj surmetu jodoformon, Ĵermena, ĉu ne ?

- Jes.

Ĵermena iris por preni boteleton el sia ŝranko.

- Sed, vi tamen sukcesis rehavi vian biciklon, ĉu ? ankoraŭ demandis Cezaro, kiun ekzaltis tiu lakona rakonto. Li deziris ekscii pli.

- Jes. Kiam la « akcizulo » falis teren, la aliaj laciĝis. De tiu

---

<sup>5</sup> Akcizejo : ĉe la pordoj de la francaj urboj, oni tie devis pagi kromimpostojn por importitaj varoj. La akcizbariloj malaperis en 1943.

situacio mi profitis por fuĝi. Dum momento unu el ili plu sekvis min. Sed mi atendis lin iom pli fore kaj petis, ke li lasu min trankvila. Tute sola li estis, vi komprenas : lin mi facile venkintus. Sed li foriris.

Parolante, Silvano etendis sian dikmuskolan brakon, kiun Ĵermena ŝmiris per rufkoloraĵo.

- Tio pli doloras nun, li diris. Antaŭe mi tute ne sentis ion.
- Ĉar nun vi koleras, esprimis Cezaro.

Li ankaŭ rigardis la brakon de Silvano. Sen konfesi tion, li admiris la belecon de la muskoloj longaj kaj netaj sub la haŭto. Ili ekruliĝis kun facileco, ekstremis pro ĉiu gesto, estis riĉaj pro densa varma sangfluo, kiu ŝveligis la elstaran vejnangiaron. Estis simile al bela viva marmoraĵo. Kaj la admiro de Cezaro malkaŝiĝis kontraŭvole :

- Kia malfeliĉo rezigni la boksadon kun tiaj brakoj ! li diris.
- Sufiĉe ! Haltu ! incitite protestis Ĵermena. Tiajn ideojn ne remetitu en lian menson !

Silvano mute ridetis. La boksarto estis ja la amataĵo de Cezaro. Tiu ĉi, eluzita pro diboĉo kaj virinoj, ne plu povis eĉ revii pri boksado. Tamen, iam li estis fortika. Malalta sed lumboforta, li havis longajn brakojn, kvadratan vizaĝon, masivan makzelon, brutalan frunton. Li ankoraŭ konservis sur sia vizaĝo la stigmatojn de sia antaŭa profesio : deformitan nazon, tuberajn pometojn, brovajn arkojn premegitajn kaj tranĉitajn de cikatroj. Malaperis du el liaj antaŭaj dentoj. Kun unu orelo iom elŝirita kaj la lipoj fenditaj, li malprecize similis al bronzaĵo martelita per maleobatoj.

Kiam lia pansado estis finita, Silvano iris ĝis la ŝtuparo el ligno, kiu kondukis al la kelo. Per la klingo de sia poŝtranĉileto, li malŝraŭbis la tabulon de unu el la ŝtupoj. Tiel li malkovris kaŝejon en kiun li transŝutis la enhavon el la fundo de sia masonsako, kaj reŝraŭbis la tabulon.

- Ĉu vi atendis min ? li revenante demandis al Cezaro.

- Jes. Vin mi bezonos morgaŭ posttagmeze.

- Por fari kion ?

- « Transpasigi » hundon al Belgio.

- Kiun ?

- Tom. Mi havis volontulon, sed li estis arestita hieraŭ. Tridek frankojn vi ricevos. Tio estas la prezo. Ĉu en ordo ?

- Konsentite. Mi venos al via domo, tuj post tagmezo.

Luiza, la amantino de Cezaro, interparolis.

- Ja ne estas bone fari tiajn stultaĵojn kun tiuj hundoj. Unufojon aŭ alian, ili mortigos tiun kompatindan Tom.

- Tro ruza ĝi estas, replikis Cezaro. La doganistojn ĝi rekonas dank'al iliaj uniformoj.

- Kio pri tiuj, kiujn vi daŭre dresas ? Min naŭzas imagi kion ili faru...

- Ĉesu nun ! Moraladmonon mi malŝatas, diris Cezaro. Ne enmiksu vin. Tio estas virafero !

Luiza ĉielen levis sian rigardon, sed ne aŭdacis diri plu. Ŝi estis bona virino, kiu timis la ĝendarmojn. Ŝi ja sentis, ke Ĵermena, eks-ĉiesulino kun freneza pasintaĵo, ne pravigas ŝin en tiaj diskutoj. Al justico estis Ĵermena pli alkutimiĝinta. Krome, la ŝakrado enspezigis al Silvano gajnojn, el kiuj ŝi tro profitis por vidi ilin malaperi sen postsopiro.

La vespero alvenis kaj jam malheliĝis la eta kuirejo. Cezaro ekflamigis alian cigaredon, kaj lia alumeto estigis purpuran rebrilon, kiu ŝajnis plidensigi la ombron. Tiam li leviĝis.

« Nu, Luiza, ni iru. Jen tempo por vespermanĝi. »

Ili eliris. Tuj apude, oni aŭdis la pordon de ilia domo klakfermiĝi.

- Ĉu ili ne rekonis vin ? tiam demandis Ĵermena.

- Kiuj ? La « negroj » ? Ne. Eĉ se mi devintus lasi mian

biciklon, vi ja scias, ke ĉiam mi havas falsan registroplatan.

- Kiel statas via brako ?
- Bone.
- Ĉu morgaŭ vi povos iri tien ?
- Jes, certe ja.

La trankviligita virino silentis.

Silvano ne ŝatis paroli. Ĵermena devis elturniĝi por rezumi per malmultaj vortoj, kion ŝi volas lin diri. Ŝi lasis sian flikaĵon, leviĝis por prepari la vespermanĝon. Silvano iris ĝis la pordo kaj malfermis ĝian supran klapegon, por ke eniru iom da taglumo, kiu ankoraŭ trenadis super la kamparo. Kubutapogante sin sur la malsupran pordoklapegon, li spektadis la tristecon de tiu sabla erikejo, de tiu helverda ĉielo. Tie supre blovis vigla vento, kiu forpelis antaŭ si trenajojn el fadenigitaj kaj ruĝfranĝitaj nuboj. De la dezerteco de tiu sterila tero, de la heleco de tiu malplena kaj malvarma ĉielo, li eksentis la tragikecon.

Li ne sciis kial, sed pro tio li ekpensis pri sia destino...



## DUA ĈAPITRO

La postan tagon, kiam Silvano tagmeze alvenis al la domo de sia amiko, Cezaro en blanka subĉemizo estis boksanta, en la kuirejo, kun la granda Julio, la policisto.

Afabla knabo, tiu Julio. Li loĝis en la tria domo pli fore. Kvankam li konis la suspektindan finegocon de Cezaro kaj Silvano, li tamen restis ilia amiko. Cezaro kaj li amikiĝis pro sia komuna amo al boksado kaj sportoj. Julio amatore praktikis la «noblan arton» dum sia juneco. Kiam lin rekaptis unu el liaj grandaj sopiroj al trejnado, Cezaro regule renkontiĝis kun Julio por kelkaj raŭndoj.

Granda, masiva, kun la membroj kaj torso rigidaj, Julio havis nek suplecon, nek facilan moveblecon. Tamen, dank'al siaj pezo kaj rezisto, la granda Julio sukcesis ĉiam venki sian kamaradon, pli maljuna kaj lacan precipe pro neregula vivo. Cezar furiozis, ĉiufoje eltrovis senkulpigojn pro sia malvenko, asertis, ke li gajnos revanĉon la venontan fojon. Tiel granda estis lia humiligo, ke, post tiuj krudaj lecionoj, li ofte ree ektrejnis sin ĉar li ege deziris trovi «sian bonfarton». Kaj, dum kelkaj tagoj, oni vidis lin, frumatene, kuri sur la vojo, ekprovi kuradojn de kvarcent aŭ okcent metroj, levi pezmasojn el giso, ŝnursalti, kaj lanĉi longajn bastonojn kvazaŭ ĵetlancojn. Nur akvon li trinkis kaj fumadon li ĉesigis. Pro tio estis lia edzino mirigita kaj kontentega.

Sed tio neniam longe daŭris. Malgraŭ sia obstino, Cezaro rapide sentis, ke estas tro malfrue, ke oni ne revivigas maŝinon malpurigitan, rustigitan pro diboĉoj kaj malregula vivo. Spiron li ne plu havis. En lia brusto, malespere la koro rapidege batis post cent metroj de piedkurado. Kramfoj kaj muskoldoloroj krakigis liajn membrojn kaj artikojn. Pri tio li ĝemis furioze, insultis sin, mokpikis sian propran ostaron, pritraktis sin insultmoke. Tiam, venkita, li rekomencis sian senenergian vivon, li diboĉis dum tri aŭ kvar sinsekvaj tagoj. Reaperis la Cezaro cinika kaj elrevigita.

Finiĝis la ludbatalo. Indiferente, sidante sur seĝo, Silvano rigardis la kontraŭstarantojn, kiuj haltis kaj grave manpremis laŭ la ritoj. Kaj Cezaro venis direkte al li, etendis siajn gantitajn pugnojn por ke Silvano malstreĉu la laĉojn. Li anhelis, li senspiriĝis.

- Tamen vi ne venkis min, ĉu ne ? li diris al Julio.

- Tio okazos venontan fojon, respondis Julio sen emociiĝi.

Kvieta, li apenaŭ ŝvitis. Ĉar malpli ol Cezaro li strebis. Dum la « fraŭdanto », memorante la batalojn de sia juneco, provis trovi siajn lertajn evitojn, siajn fintojn, sian krurludon, sian tutan antaŭan flekseblecon, Julio taksis ja neutile tiom klopodi por tiel ĉirkaŭdanci la kontraŭstaranton : firme staranta sur siaj kruroj, li kontentiĝis atendi la alproksimiĝon de Cezaro, por lin forte pugni.

Neniam plu boksis Silvano. Ĵermena tute ne ŝatis tion kaj ankaŭ li ne plu volis. Antaŭlonge, kiam li aĝis proksimume dudek jarojn, li estis tre forta. Belan karieron ĉiuj el lia rondo prognozis al li. Belajn batalojn li gajnis. Li estis ĉampiono de la departemento Nordo, kiam li ĉesigis ĉion. Nun estus por li tro malfrue, ĉar li ĉagreniĝus konstati sian defalon kaj memori pri la brila estonto, pri kiu li rezignis por sekvi Ĵermenan.

Estis ŝi, kiu delogis lin el lia vojo. Ŝin li ekkonis en sia dudeka jaro kaj pasie ekamiĝis. Al ŝi, li foroferis siajn forton kaj esperojn al gloro malgraŭ la konsiloj kaj avertoj de siaj geamikoj. Por ŝi, li rezignis ĉion

Cetere, ŝi bone kondukis. Nenion li riproĉu al ŝi. Ekde kiam ilia rilato fariĝis serioza, ŝi eliris el la suspektinda domo, en kiu ŝi allogis klientojn. Ŝi forgesis sian antaŭan vivon, siajn kamaradinojn, sian tutan malvirtan ekzistadon. Kaj ŝi fariĝis rektanima, iĝinte bona hejmomastrino. Depost ilia geedziĝo, Silvano ne plu havis ian mallaŭdon por adresi al ŝi. Sed tamen, kelkfoje li havis bedaŭrojn, meditante pri kio li eble fariĝintus sen ŝi. Kaj tio dolorigis lin ; male al Cezaro, li preferis forlasi ĉiujn siajn memorojn.

- Nu, ĉu vi vestigōs ? li petis al Cezaro.

- Jes.

- Ĉu vi tuj promenos ? demandis la granda Julio.

- Ne, ni tuj « transpasigos » Tom al Belgio. Ĉu vi ne venu kun ni ? ironie demandis Cezaro.

Cezaro ne ŝatis la policon. Kaj, kvankam Julio estis lia amiko, la « fraŭdanto » ne perdis unu okazon por klare sentigi al li sian opinion pri la tuta ĝendarmaro.

Julio, kiu estis pri tio kutimigita, ne kontraŭdiris.

- Estas granda enspezo, tia hundo, li simple diris.

- Jes, replikis Cezaro, sed ĉu vi opinias, ke kostas nenion por aĉeti kaj nutri ĝin? Ĉiutage ĝi manĝas unu panon, tiu fortikulo !

Malfermante la kortopordon, li alvokis :

« Tom ! »

Kaj, oscedante, hundo eliris el sia hundujo, streĉiĝante eniris la kuirejon. Ĝi estis granda ŝafhundo de Tervueren<sup>6</sup>, tiom alta kiom la tablo, kun longa felo rufa kaj kapo maldika kun belaj okuloj brunaj. Ĝi priflaris Silvanon, kiun ĝi konis, kaj rondkuŝiĝis ĉe liaj piedoj.

- Tiu ĉi estas superlertulo, orgojle diris Cezaro.

- Ĉu vi ne timas iam perdi ĝin ? demandis Julio.

- Estas metiorisko, respondis Cezaro.

Sed li silentis. Oni ja vidis, ke li ŝatas sian hundon pli ol li asertas : la paroloj de la policisto lin lasis meditema, kontraŭvole.

- Ĉu vi jam perdis iujn ? plu demandis Julio.

- Kompreneble, diris Cezaro. Unufojon aŭ alian, ili estas murditaj de fusilpafo. Aŭ ili renkontas sian superulon : pli fortan hundon, kiu strangolas ilin. Ankaŭ la doganistoj tiucele havas siajn hundojn.

---

<sup>6</sup> [tɛr'vyrən]



Tom, ankoraŭ kuŝanta, levis la okulojn al sia mastro, kvazaŭ ĝi aŭskultadis.

- Kion vi faras tiam ? daŭrigis Julio.

- Mi aĉetas alian kaj dresas ĝin.

- Ĉu vi mem ?

- Kompreneble ! Ĉu vi neniam vidis ? Estas grava afero. Komence oni aĉetas viandon ; oni donas al la hundo tiom kiom ĝi deziras. Oni starigas por ĝi bonan hundeton. Oni manĝigas al ĝi sukerojn, ostojn, ĉion kion ĝi ŝatas. Vi ja komprenas, ke la hundo kutimiĝas al tio ; ĝi opinias, jen estas bona hejmo. Se alvenas iu kamarado, oni petas, ke li frapu la hundon, piedbatu ĝin, se ĝi alproksimiĝos. Kial ? Por ke la besto iĝu malfidema. Necesas, ke ĝi havu nur unu mastron, ĉu vi komprenas ?

- Sed Tom ? Tamen vi permesas, ke oni ĝin karesu.

- Tiu ĉi estas maljuna, ĝi estas dresita. Ĝi konas la hejmon, nun.

- Kaj poste vi alportas ĝin al Belgio, ĉu ?

- Ne tiel rapide. Unue, mi donas la hundon al kamarado, kiu kunprenas ĝin kun si. Je kvincent metroj de mia domo, li batadas la beston, kun bastono postkuras ĝin, ĵetas brikojn al ĝi. La hundo forkuras, rapidege revenas hejmen. Kaj ĝin mi atendas. Je la ĵusa reveno, ĝi tuj ricevas bonan manĝaĵon, sufiĉe por plenigi sian ventron. Oni tiel daŭre rekomencas, plilongigante la distancojn.

- Same kiel oni faras por trejni kolombojn, komentis Silvano.

- Kaj finfine ĝi komprenas. Oni povas kunpreni la hundon tiom fore kiom oni deziras. Apenaŭ ellasita, tuj ĝi rapidegos por reveni.

- Estas strange, diris Julio.

- Jes, daŭrigis Cezaro. Ne ĉiam la hundoj havas belan vivon, kiam ili devas kuri kun du aŭ tricent paketoj da cigaredoj surdorse. Komence, ankaŭ tiucele oni devas ilin dresi.

- Ĉu ili ne volas iradi ?

- Ne. Ili ne komprenas, kion oni volas ilin farigi.

- La unuajn fojojn, daŭrigis Cezaro, kiu ĵus finis sin lavi kaj pretigi, la dresado okazas ĉi tie. Sakon da pajlo oni metas sur iliajn lumbojn. Kaj se ili ne volas iri, oni lasas la bestojn tiel ŝarĝitajn. Iuj kvazaŭ freneziĝas. Ili sin trenas sur la postaĵo, sin rulas sur la dorso, ĝemas tutan tagon.

- Kaj finfine ?

- Ili ja devas finfine iri. Oni ne plu nutras ilin tutan tagon ; al ili oni poste proponas pecetojn da viando. La hundoj fine sin decidas antaŭeniri por ilin kapti. Iom post iom ili kutimiĝas. Tamen, la unuan tagon, kiam oni « transpasigas » ilin al Belgio, la bestoj estas ŝarĝitaj per fojno, ĉar oni neniam estas tro prudenta...

- Venu ĉi tien !

Tom alproksimiĝis. Cezaro surmetis al ĝi buŝumon. Li estis preta kaj prenis sian kaskedon. Julio kaj Silvano ekstaris.

- Ĉu ni foriru ?

- Ni foriru !

Cezaro elirigis sian biciklon.

- Nu, bonan ŝancon, deziris Julio forirante.

- Ni provos !

Silvano havis sian biciklon antaŭ la pordo. Cezaro kaj li ekrajdis, forirante malrapidete, por ne lacigi Tom, kiu regule trotadis je la dekstro de sia mastro.

Ambaŭ homoj bicikladis kelkajn kilometrojn sur la ŝoseo de Dunkirko al Furnes. Poste, alproksimiĝante la doganejon, ili transiris la kanalon, ĝirante maldekstren en la direkto al la dunoj kaj la maro. Ili sekvis vojeton, sur kiu streta strio de malglataj pavimeroj duone malaperis sub la sablinvado.

Ankoraŭ necesis transiri la fervojon de Ghyvelde<sup>7</sup>. Tie, ĉe la elirejo de la vilaĝo, ili lasis la biciklojn en eta trinkejo. Piedirante ili foriris al la landlimo, paralele al la maro, lasante Bray-Dunes

---

<sup>7</sup> Ghyvelde : [gi'veld] franca vilaĝo apud la belga landlimo kaj Bray-Dunes.

maldekstre. Cezaro intence elektis tiun lokon, kiu estis al li kutima, ĉar tie li povos senkatenigi Tom, tute nerimarkitaj de la doganistoj. Tiel ili diskrete pasis malantaŭ la lastan doganejon antaŭ la maro. Kaj ili plu marŝis ĝis la dunoj, kies unuajn montetojn ili atingis post kelkaj minutoj. Tie, dum Cezaro surgrimpis ramplon, de kie li supervidu la landon, Silvano alligis Tom al kondukŝnuro, kaj atendis.

Cezaro revenis.

- Neniu. Ni ekmarŝu. Mi tuj foriru en tiun direkton. Kiam mi estos « sur » Belgio, liberigu Tom. Ne tuj, ĉu ne ? Atendu, ĝis mi ne plu estos tuj apud la landlimo.

- Tie for ? demandis Silvano, montrante al la horizonto, trans la landlimo de ambaŭ landoj, izolatan domon kun ruĝa tegmento sur la belga teritorio.

- Jes. Kaj ankaŭ tien vi min reatingos. Mi atendos vin.

Cezaro ekiris. Kiam Tom vidis sian mastron foriri, ĝi gruntis kaj tiris sian kondukŝnuron por lin sekvi. Sed per firma pojno Silvano restigis la hundon, kaj frapetante ĝian postaĵon, devigis ĝin sidiĝi. Tom ĉesis moviĝi, kontentigis sin iom ĝemeti, ne ĉesante okulsekvi la silueton de sia mastro, kiu rapide malkreskis. Silvano ekbruligis cigaredon.

Fore, Cezaro bonpaŝe antaŭeniris. Li transpasis la landlimon, ĉirkaŭen rigardis, sin turnis por amike mansigni al Silvano, kiu komprenis la averton : « Ĉio iras glate. » Sian iradon li daŭrigis kaj baldaŭ estis sur la belga teritorio. Silvano vidis lin paŝi ĝis la dometo kun ruĝa tegmento. Alveninte tien, Cezaro sin turnis, okulserĉis la du nigrajn punktojn, kiel aspektus por li Tom kaj Silvano. Li ne trovis ilin, tiel perditajn en la ondata tereno de la unuaj dunoj, kie la rigardo konfuziĝis de la aspektoj, ĉiuj similaj, de la pejzaĝo. Silvano dume supreniris la altaĵon, kien iris Cezaro antaŭ nelonge. Ĉirkaŭ sin li rigardis, neniun vidis, nek unu doganiston, nek unu suspektindan promenanton. Tiam li malkroĉis la kondukŝnuron, dum momento plu retenis Tom per la kolringo.

« Nu iru, Tom, li laŭte rediris plurfoje, iru serĉi vian mastron, iru serĉi vian mastron ! »

Kaj li ellasis la beston.

Tom senhezite tuj fulmrapide malsuprenkuris la dunon, impetegis sur la spurojn de Cezaro. Oni vidis ĝin saltegi tra la samaspektan ebenaĵon. Ĝi forkuris per longaj kurpaŝoj, per sia plenrapideco. Same kiel sago, ĝi transpasis la landlimon kaj reatingis sian mastron post kelkaj minutoj.

For malantaŭ ĝi, ankaŭ Silvano ekiris. La landlimon li transpasis sub la nefidema rigardo de doganisto, kiu ĵus alvenis por patroladi en tiu ĉirkaŭaĵo. Sed jam de longe Tom estis sekura apud Cezaro.

- Jen tio farita, diris Cezaro, kiam Silvano siavice reiris kun li. Ni sukcesis « pasi sub iliajn barbojn... » ĉu ne, Tom ?... Tamen, tiu fortulo postkole alte mezuras iom pli ol tridek-sep centimetrojn ! Nun, Silvano, vi povas formarŝi kun Tom. Mi mem devas reiri al Dunkirko. Tie atendas ulo, kiu havas tabakon por mi.

- Kio koncerne vian Tom? Al kiu mi devos ĝin konduki ? Ĉu kiel kutime ?

- Ne, sed al Duplo, la nutraĵvendisto, vi ja scias, ĉe la elirejo de Adinkirko<sup>8</sup>...

- Jes.

- Vi lin petos, ke li surmetu dek ok kilogramojn, same kiel la unuan fojon. Li ellasu Tom proksimume je la deka.

- Ĉu vi reiros samvoje ?

- Ne.

- Pli bone. Kiam mi transpasis, tie estis unu doganisto, kiu rigardis min strange. Li povus malfidi.

- Mi preterpasos la doganoficejon de Ghyvelde. Ĝis ĉi-vespere, ĉu ?

- Ĝis ĉi-vespere.

---

<sup>8</sup> Adinkirko : belga vilaĝo. En la franca : Adinkerque ; en la flandra : Adinkerke.

Cezaro reiris al Francio. Kaj Silvano kuntrenis Tom ĝis Adinkirko.

## TRIA ĈAPITRO

Post kiam li deponis Tom en la nutraĵvendejon, Silvano emante gapvagi, decidis promeni ĝis la ĉirkaŭaĵo de Furnes, ĉar li havis nenion ajn por fari dum tiu tuta posttagmezo.

Trairante la kampojn, li alvenis apud Furnes, malnova flandra urbo, kies dentvica belfrido tre alte en la helblua ĉielo levis la bulbon de sia ardeza tureto.

Silvano ne iris pli foren. Li enpaŝis etan butikon, meze de domareto, por aĉeti panon kaj ŝinkon. Kaj manĝante, laŭirante la kanalon de Furnes li revenis al Dunkirko ; li iris laŭlonge de la malrapida kaj kvieta akvo, finmanĝante sian panon kun bona apetito. Kiam oni iras al Dunkirko, la vojo situas maldekstre de la kanalo. Sed tie Silvano ne ŝatis marŝi. Tro ofte la aŭtomobiloj trudas la piedirantojn flankeniri. Malplaĉis al li tiu longa unutona rubando, senfine disvolvanta sian perspektivon el gudrita makadamo, kies bitumo haladzis. Li preferis sekvi la dekstran kanalflankon, kie, en la herbo, apenaŭ desegniĝis padeto kaprica kaj dolĉa al la piedoj. Tie li piediris, kvietega, spirante kun feliĉo la freŝan aeron, en la malstreĉa etoso de tiu senfara posttagmezo.

Tiam li malkovris la malnovan « kabareton<sup>9</sup> ».

Tiel ekzistas lokoj, kies aspekto - pro nekonata kaŭzo - vin ĉarmas, vin senreziste ravas, vin subite instigas rekoni kaj ami la belecon. Ĉu nekonsciaj memoraĵoj, obskure revokataj el la profundejoj de la memoro ? Ĉu rememorigo pri malnovaj bildoj ? Ĉu efektiviĝo de idealo malrapide formita en la profundo de la memo ?

Silvano ne sciis, kie li jam vidis tiun lokon, kial li ĝin rekonis, ŝatis kaj plezure retrovis ties detalojn. Sed nediskuteble, ĉio el tio estis al li familiara. Certe iam li songis pri tio. Ja en tia dekoro okazas la fabeloj, kiujn oni antaŭlonge rakontis dum lia infanaĝo.

---

<sup>9</sup> Kabareto = (fr : cabaret / estaminet) trinkejo en Flandrio.

Ĉio estis tiel, kiel devis esti.

Kaj, sen ia miro, Silvano forlasis sian vojon, malsupreniris la herban irejon, kiu kondukas al la gastejo. Li sidiĝis sur kamparstilan seĝon ĉe malnova tablo el kverko, kies ligno skrapita per vitropapero dise kaviĝis kaj ondoformiĝis. Atendante la gastejstron, li lasis sian rigardon vagi ĉirkaŭ si, sur tiujn aĵojn nekonatajn kaj tamen familiarajn. Ŝajnis al li, ke li subite eniris en la pejzaĝon de unu el tiuj anglaj gravuraĵoj, sur kiuj vidiĝas vojego, kie haltis fiakro kun du blankaj ĉevaloj ŝvitofumantaj ; dika gajmiena ĉeval-kondukisto, kiu trinkas glason da ĝino ; kaj, sur la herbo, dancantaj je la sonoro de violonistaĉo el hazarda renkonto, du aŭ tri paroj da junaj landsinjoroj kaj beletaj sinjorinoj.

La fiakro ne ĉeestis. Nur ĝi, kun la roluloj, mankis en la dekoracio.

Dum kvin minutoj Silvano atendis. La gastejestro ankoraŭ ne alvenis. Sed Silvano ne alvokis, ĝuante tiun kvietecon.

La gastejo estis konstruita apud la kanalbordo, laŭlonge de larĝa pavimita vojo forlasita, kvazaŭ ia vojego, kiu abrupte haltas, krute super la akvo. Post pli bona observo, Silvano komprenis, ke temas pri eksvojego, kiu iam pasis trans la kanalon per iu ponto nun detruita. Cetere, la novan ponton oni ekvidis je tri cent metroj de tie.

Grandaj arboj bordis tiun eksan vojon, enkadrigis la gastejon kaj tiun tutan loketon en aranĝo de densaj folioj. Tio aspektis kvazaŭ foliriĉa insuleto da verdaĵo meze de la monotona nudeco de la ĉirkaŭaĵo. Kaj, kutiminta je la sterileco de la sabla erikejo, je la arboj magraj kaj fuŝkreskaj, kiujn la marvento skuadis kaj turmentadis ĉirkaŭ sia loĝejo, Silvano nekonscie spertis la logon de tiu abunda vegetalaro, de tiu kvieta kaj nobla forto, kiu ŝajnis eliĝi el bela arbo.

Premita sub tiu vivopleno, la gastejo aspektis tute malgranda. Malnova domo konstruita el sablobrikoj, nuntempe kolorigitaj de

ŝtongriza patino, ĝi estis tre malalta, kvazaŭ enprofundiĝinta en la grundo. Grandega tegmento el ruĝaj tegoloj pezis sur ĝi, deklivis sur la fenestroj ; tie freŝaj kurtenetoj bluaj kaj blankaj aldonis ion pimpan kaj gajan - kvazaŭ kreitaj per ĉarma kaj diskreta estetika sento de avino. Sur la fenestrobretoj kuŝis ankaŭ kestoj verdaĉe farbitaj. Tie kreskis fuksioj kaj asparagusoj volviĝintaj ĉirkaŭ fajnaj subteniloj el blanka ligno. La malfermita pordo de la alloga malnova loĝejo ŝajnis instigo por eniri en la freŝon de la duonombro, kiu plenigis la internon.

Herbo kreskis en la juntoj inter la pavimeroj de la eksa vojego. Tra la arbobranĉoj, la suno filtriĝis, sur la grundon projekciis rondojn el blonda lumo. Kaj tio estigis en la aero sennombrajn radiofaskojn, nubeton, ŝvebantan lumpulvoron, kiuj donis al tiu loko feinan etoson. Malsupre, piede de la taluso kruta, kiu ĉesigis la pavimitan vojon, la akvo murmuris per plaŭdoj kaj lantaj tremetoj tra la junkoj.

En la domo ekestis paŝbruo. Iu aperis sur la soljo. Antaŭ ol Silvano returne rigardis por peti trinkaĵon, li aŭdis etan surprizkrion. Tiam li vidis tre junan fraŭlinon, kiu mire lin rigardis.

- Ĉu delonge vi estas ĉi tie ? ŝi demandis.

- De kelka tempo, jes.

- Kial vi ne alvokis ?

- Ĉar mi sidis tre trankvila ĉi tie, kompreneble !

Ne vere sciante kial, li ridis, feliĉa senti sin tie, plena de svaga kaj dolĉa kvieto.

La junulino rigardis lin. Kaj ankaŭ ŝi ridis.

- Ŝajnas al vi eksterkutime, ke mi estas ĉi tie, daŭrigis Silvano. Vi aspektas ege surprizita.

- Ĉar ne estas dimanĉo, ŝi respondis.

- Ĉu nur dimanĉe vi havas klientojn ?



- Jes. Homoj, kiuj venas fiŝkapti aŭ deziras ripozi.

- Mi opinias, ke vi ne rapide riĉiĝos, se vi restas senlaboraj tutan semajnon.

Ankoraŭfoje ŝi havis ridon belan, junan, freŝan, - ridon de knabineto, pensis Silvano mirigite. Kaj ŝi naive respondis :

- Ho ! ne. Sed de longa tempo, ankaŭ ni jam ne esperas riĉiĝi. De kiam oni detruis la malnovan ponton, vi komprenas...

- Do vi estas ja trankvilaj tutan semajnon ?

- Preskaŭ. Oni ne lasus min sola, vi ja sciu, se oni kredus, ke alvenos klientoj.

- Ĉu vi estas tute sola ?

- Jes, miaj geonkloj estas foririntaj al Furnes.

- Ĉu ne viaj gepatroj, kiuj loĝas ĉi tie ?

- Ne. Ili estas mortintaj. Ili mortis

Ombro de tristeco pasis sur ŝiajn trajtojn, sen ilin longe malheli. Oni sentis en ŝi superabundon da juneco, grandan vivĝojon, simplaniman miregon antaŭ la okazaĵoj, kiu malpermesis al ŝi daŭre resti trista.

- Nu, ŝi diris kun embarasa mieno, kion ni faros nun ?

- Ĉu vi ne povus doni al mi trinkaĵon ?

Sen scii la kialon, Silvano ne aŭdacis antaŭvidi, ke ŝi mem servu glason. Krome, la fraŭlino aspektis konsternita pro tiu peto.

- Neniam mi faris tion, ŝi konfesis. Neniam mi servis klientojn ; mi konas nek la trinkaĵojn nek la prezojn. Ne delonge mi estas ĉi tie.

Ekestis silento.

- Aŭskultu, ŝi fine daŭrigis, plej bone estus, ke vi foriru...

Tio estis tiel gajiga, ke Silvano ne povis ne ridi.

- Sed mi soifas, li protestis. Oni ne povas tiel forpeli klientojn.

La fraŭlino iĝis pli kaj pli perpleksa.

- Ĉu vere ? ŝi insistis. Ĉu vere vi soifas ?

- Jes ja ! Mi ne volas ofendi vin, sed vi ŝajnas esti stranga komercistino !

Denove, ankaŭ ŝi ridis.

- Do, kion ni faros nun ? ŝi rediris.

- Nu, en la hejmo vi havas tamen ion por trinki, kio eĉ estu nur por la dimanĉoj ?

- Jes. Estas biero, vino, ribo-siropo.

- Bone. Mi tuj servos min mem.

- Prave. Estas plej simple. Venu ĝis la verŝtablo kaj mem elektu.

Silvano ekstaris, eniris en la gastejon. Neniam li vidis ion tian. Ĝi estis ĉambro vasta, malalta, malhela, lumigita per etaj fenestroj. La bruniĝinta plafono, la planko el bluaj ŝtonoj, la fumomakulitaj muroj, ĉio estigis apartan agordon, ian agrablan kaj freŝan klarobskuron. Du ŝprucoj el vigla lumo enfalis tra la fenestroj kaj trairis la ĉambron per krudaj radioj. La okuloj rapide kutimiĝis al ili. Tiam Silvano ekvidis, ke, multe pli ol nur gastejoĉambro, ĝi estas ia granda kuirejo, ĉambro kie la tuta domanaro kutime kunvivas. Kontraŭ la malantaŭa muro staris larĝa kameno, kian oni ankoraŭ kelkfoje vidas en la malnovaj farmobienoj de Flandrio. Tre alta, ĝi fariĝis pli mallarĝa ĝis la plafono ; duonalte, mantelo transverse trairis ĝin. Tuta sinsekvo da kaseroloj, marmitoj, lampo el kupro kaj statueto de la Virgulino estis ordometitaj sur tiu tabulo. La grandega aperturo de tiu kameno estis masonfermita. Oni tie lasis nur truon, tra kiu eniris la tubo de flandra rondpota stovo - fornelo ornamita per nikelitaj stangoj, kaj zorgeme polurita per grafito. Ĉiuflanke de tiu stovo staris unu brakseĝo, ambaŭ tegitaj per tapiŝo, kaj kies fundoj kaviĝis pro ĉiutaga uzado. Sur tiu ĉe la dekstra flanko dormis hundeto buliĝinta. Meze de la ĉambro, sub pendolampo kun granda lumŝirmilo el tapeto, staris tablo kahelita per blanka fajenco.

Kontraŭ la muro : servicoŝranko kun koloritaj vitraloj, kie supre viciĝis spicoskatoloj. Vidalvide, kontraŭ la alia muro : ne funkcianta malnova horloĝo kun senmova pendolo el kupro, en longa ingo el bruna ligno, kun ciferplato el blanka emajlo sen hormontriloj. En la angulo de la maldekstra fenestro : eta verŝtablo, kun breto sur kiu vidiĝis kelkaj boteloj kaj returnite metitaj puraj glasoj. Tiuj ĉi estis la solaj aĵoj por rememorigi, ke oni troviĝas en kabareto.

Silvano ne havis la tempon por vidi plu. La eta rufa hundo vekiĝis kaj, bojante furioze, impetis al li.

« Ĵim ! Ĵim ! Bonvolu... ! » ekkriis la fraŭlino. Kaj ŝi kuris ĉirkaŭ la hundeton, penante sensukcese kapti ĝin.

- Li estas ja malica, ŝi diris, timigata. Li volas mordi vin !

- Lasu min fari, respondis Silvano. Mi kutimas.

Li ne moviĝis, lasis priflari la etan beston, kiu hirtigis la felon kaj alpaŝis al li malfide, senaplombigata pro tiu senmoveco. Silvano malrapide alproksimigis la manon al sia poŝo, elŝovis sukerpecon, eklevis ĝin al sia buŝo, ŝajnis longe maĉi. Ĵim levis la kapon, pintigis la orelojn, kun interesata mieno. La haroj de ĝia dorso lante malaltiĝis. Silvano duonrompis la sukerpecon, donacis duonon al la besteto. Ĵim akceptis ĝin, kontentige krakmanĝis, svingis la voston. Tiam Silvano donis al ĝi la restaĵon de la sukero. Kaj Ĵim ŝajnis paciĝi kaj akcepti la entrudulon !

- Estas eksterordinare, diris la fraŭlino. Li estas tiel malica. Mi vidas, ke vi ne timas hundojn.

- Ne, diris Silvano, amuzata ; male : mi iom scias, kiel dresi ilin.

- Kun Ĵim, neniu ankoraŭ sukcesis pri io ajn. Li estas tro malica.

- Se mi havus tempon, tamen mi ja volonte instruus al li kelkajn trukojn.

- Sen suferigi lin ?

- Kompreneble. Tute male, kaj per multe da sukero.

- Estas bedaŭrinde, ke vi ne ofte venas ĉi tien : vi instruus al li prezenti unu piedon aŭ stariĝi. Mi havas amikinson, kies hundo scias fari tion... Tre afabla vi estas !...

- Kiam eblos la okazo, mi revenos ĉi tien kaj provos tion.

Silvano iris ĝis la verŝtablo, servis al si glason da blanka vino, ĝin kunprenis eksteren kaj metis sur la malnovan tablon, en la ombro. La knabino sekvis lin, apogis sin kontraŭ la muron de la malnova domo, kaj rigardis la junan viron kun scivolemo tiel naiva, ke ĝi ne ofendiĝis. Oni sentis, ke interesas ŝin tiu viro, kiu neatendite alvenis, servis sin mem, superfortis la furiozon de Ĵim kaj parolis pri instrui al ĝi trukojn.

- Do vi ne venis por fiŝkapti, ĉu ? ŝi denove demandis.

- Ne, sed simple por promeni. Mi iom ripozas, ĉu vi komprenas ?

- Ĉu vi ne laboras ?

- Ho jes, tamen kelkfoje.

- Vi ne estas kafejestro, ĉu ?

- Ĉu mi ? Kial do ? Ĉar mi sciis, kiel malkorki botelon kaj servi al mi glason ? Ne, mi faras... eksporton. Kaj ĉu vi mem nenion faras ĉi tie ?

- Ne ; fakte preskaŭ nenion. Mi helpas mian onklinon en la mastrumado, promenadas, ĝardenas. Nur de kvin monatoj mi estas ĉi tie. Antaŭe, mi loĝis en Nieuport<sup>10</sup>, kun mia patrino. Sed ŝi forpasis kaj nun mia onklo zorgas pri mi.

Silvano rigardis ŝin, dum ŝi parolis. Ŝi estis tre juna, eble aĝis maksimume dek kvin aŭ dek ses jarojn. Tion oni konjektis pro la desegno de ŝiaj lipoj, kiuj tuj ridis pri la plej eta bagatelaĵo, pro la ankoraŭ simplanima maltimo en ŝia blua rigardo, kiu profunde rigardis vin fikse, sen malrespekto, kun ia naiva miro. Ŝi havis ruf-orajn harojn, kiujn oni antaŭvidis bruniĝontaj, fariĝontaj arde kaŝtankoloraj, sed kiuj, nuntempe, ankoraŭ konservis varmajn

---

<sup>10</sup> Nieuport : [nju'por] (flandra : Nieuwpoort) belga urbeto ĉe la marbordo.

kuprajn rebrilojn. Ilin ŝi tiris ĉiuflanken de sia vizaĝo, sencede malhelpante, ke ili bukliĝu aŭ ekflugu en malsaĝaj hartufetoj. Ŝi nodis ilin en dika bulo, tre malalte en sia kolo. Oni konjektis pri tio la senindulgajn konsilojn de rigora patrino. Tio ne malbeligis ŝin, sed male vidigis ŝian palan kaj rektan frunton, tiel donante al ĝi ion sinceran kaj puran. En la estonto, la aĝo sendube substrekos la desegnon de ŝiaj naztruoj, sed nun ili havis ankoraŭ tiun etecon kaj moveblecon de la infanaĝo.

Antaŭ ŝi, Silvano sentis sin mallerta. Li ne sciis pri kio paroli. Ĉiuj liaj vortoj, lia tuta propra vortotrezoro, ŝajnis al li enhavi ion krudan, maldecan, kiu devus ŝoki tiun infanon. Li, kiu asertis posedi sperton pri virinoj, kiu ne renkontis unu el ili sen tuj pensi pri amoro, kaj sen provi plaĉi al ŝi kelkfoje eĉ nekonscie, sentis sin tiumomente senarma, konfuzita. La simpleco, la simplanimeco de tiu knabineto senaplombigis lin. Ĉe la aliaj virinoj, li ordinare kaptis pensojn, kiuj kongruis kun liaj : intereson, scivolon, afablan simpation aŭ malinklinon. Fronte al ŝi, nenia el tiuj sentoj tuŝetis lin. Kaj tiu freŝeco, tiu juneco kortuŝis lin. Ne longe li aŭdacis elteni ŝian rigardon. Ŝajnis al li insulteme vizaĝobservi ŝin, vidigi al ŝi la pensojn, kiujn ŝi sugestis al li. Li rigardis ŝian korsaĵon, ankoraŭ apenaŭ desegnititan, simile al brusto de adoleskantino. Ŝi surhavis etan robon el indieno, kies krucforma dekoltaĵo vidigis nur la brustkomencon, kaj plenigis Silvanon de ĉasta emocio, en kiu miksiĝis nenio malpura. Junecon ŝi simbolis al li. Ŝajnis al li honte senti malmoralan penson je ŝia apero. Image, li komparis ŝin kun io pura, senmakula, kiel blanka neĝo, sur kiu li hezitus stampi sian paŝmakulon.

- Kompreneble viaj geonkloj delonge loĝas ĉi tie, li daŭrigis.

- De ĉiam. Ambaŭ estas maljunaj, preskaŭ tiel maljunaj kiel la domo, mi opinias. De mateno ĝis vespero ili kvereladas, kaj unu ne povas vivi sen la alia. Estas kurioze, ĉu ne ?

Denove, ŝi havis sian belan junan ridon, kiun Silvano ŝatus longe aŭdi.

- Verŝajne ili ne multe perlaboras en tiu ĉi loko, li diris por paroli plu, por respondi ŝin, kaj revidi, sur ŝia freŝa vizaĝo, la ŝanĝantan kaj ĉarman rebrilon de la enaj emocioj.

- Ho ! ne. Antaŭ tre longe, la vojo pasis ĉi tie, almenaŭ laŭdire. Sed la ponto estis detruita dum la milito, kaj rekonstruita pli fore. Tion mi mem ne bedaŭras. Pli kvietaj ni estas. Kaj samopinias mia onklo. Nur mia onklino kelkfoje enuas, ĉar ŝi ŝatas paroli, tion mi devas konfesi...

- Ĉu vi ne iom similas al ŝi tiurilate ?

- Ĉu vi divenis ? Jes, vi pravas, mi estas ege babilema ; tion ĉiam diras mia onklo. Kaj ĉu vi mem ne ŝatas paroli ?

- Kun vi, mi tre ŝatas...

Kaj li tuj pentis pro tiu senĉarma galantaĵo, kiu eble ŝokos aŭ ofendos la knabinon.

Sed li estis trankviligita. Ŝi ne divenis la intencon kaj daŭrigis :

- Nu, kun mia onklino vi ja bone konkordos. Mia onklo neniam parolas. La viroj ĝenerale kondutas tiamaniere. Estas amuze... Ĉu vi jam foriros ?

Silvano elpoŝigis sian horloĝon.

- Jes. Tempas. Mi devos marŝi longan vojon.

- Ĉu vi iros malproksimen ?

- Francion. Apud Dunkirko.

- Do ne ofte vi venas ĉi tien, ĉu ?

- Tute male, mi ofte venas.

- Nu, se iafoje vi revenos en nian domon, vi povos eble lernigi ion al Ĵim ?

- Konsentite. Mi ne forgesos. Ĝis la revido !

Silvano reprenis sian ĉapelon, refoje karesis Ĵimon, definitive konkeritan, kaj, malrapide, li forlasis la freŝan azilon, retrovis sian irejon kaj denove direktis sin al Francio.

Kvincent metrojn li ankoraŭ ne iris, kiam li bruske memoris : li forgesis pagi.

« Mi revenos, » li pensis.

Kaj sian marŝadon li daŭrigis cele al Dunkirko.

## KVARA ĈAPITRO

Tamen, unu plian fojon okazis al Tom aventuro, kies profundaj kialoj restis al ĝi nekomprenablaj, sed kiu jam ofte ripetiĝis en la pasinteco kaj fine fariĝis kutima.

Silvano estis foririnta, lasinte Tom sola en tiu domo kun odoroj malprecize konataj, kaj kien, laŭ sia hunda memoro, ĝi jam kelkfoje venis.

Tom troviĝis en granda kaĝo el tabuloj fermita per aĵura pordo. La hundo sciis, ke iu liberigos ĝin nur post longa atendo. Sed ĝia sperto jam instruis, ke estas neutile ĝemi, ĉar neniu venos antaŭ nokto.

Kiel kutime, dum momento ĝi gratadis la tabulojn de sia hundejo, priflaris la interspacojn, per sia muzelpinto serĉis la odorajn spurojn, kiujn lasis en la kaĝo aliaj hundoj enŝlositaj antaŭe. Poste, por forgesi la malsaton, kiu iritis ĝian stomakon, ĝi filozofie rezignaciis antaŭ ol ekdormi. Kaj ĝi memoris, ke en tiaj tagoj oni lasas ĝin ĉiam fasti.

Longan tempon poste - jam estis nokto - homoj eniris en la korton. La maniero, laŭ kiu iu alpaŝis al ĝia kaĝo, komprenigis al Tom, ke ĝi baldaŭ estos libera. Ĝi subpremis la grunton, kiu jam ekruilis en la gorĝo. Tio estis malpermesita. Kiam oni malfermis la pordon, Tom dankeme eliris, premis sian nazpinton sur la kruron de la viro, kaj longe analizis lian odoron. Nekonata, tiu fremdulo. Sed ŝajne li ne havis malfavorajn intencojn. Li mandorlotis Tom, amike gratetis sub ĝia mentono. Lia voĉo artikulaciis bruojn. Fingre li frapetis kontraŭ sian femuron, faris alvokajn signojn. Tom sekvis lin, eniris en ĉambron, kie estis virino kun sia infano. La virino ektimis, kio ne plaĉis al Tom. Ĝi malfidis la homojn, kiuj forkuras, kaj instinkte deziris postkuri ilin. Sed la viro ekparolis kaj la virino silentis. Ŝi eĉ alpaŝis al la besto kaj karesis ĝin, tamen ne tro aŭdace. Ŝi volis doni sukeron, kiun Tom volonte



krakmanĝus, kvankam ĝi preferus viandon. Sed la viro denove intermetis, malpermesante, ke la virino donu eĉ la sukerpecon. El ŝranko li eltiris grizan tolon, malvolvis ĝin, pugnobate amasigis en ĝin sekan malbonodoran herbon.

- Kiom oni surmetas sur ĝian dorson ?

- Dek-ok kilogramojn.

- Dek-ok kilogramojn ! Ĉu ĝi povos tiom transporti ?

- Eĉ dudek-kvin tia fortikulo transportus, mi opinias. Mi sci-volas, kie tiu fripono Cezaro malkovras tiajn hundojn.

Tom atendis, priflaris la suban parton de la pordo, kaj forte enflaris la odorojn de tiu loko, kiun ĝi ne konis. Dume, la viro jam finplenigis la sakon. Li levis ĝin, alpaŝis al Tom :

« Dolĉe, amiko », li diris.

Jam sciante kion li deziris, Tom firme apogis sin sur siaj piedoj, senflekse ricevis surdorsen la pezan ŝarĝon. Kaj la viro ĝin firme alligis, pasigante la laĉegojn sub la ventron kaj antaŭ la bruston. La ŝarĝo ne estis ekvilibra; unu rimeno ĝenis Tom. La hundo kuŝiĝis, rifuzis moviĝi, sciante per sia sperto, ke tiel ĝi ne povus kuri sed tuj skrapvundus sian haŭton.

- Kion ĝi faras ? zorgis la virino.

- Ne gravas, diris la viro. Silvano klarigis al mi, kiel mi reagu tiuokaze.

La viro iom malstreĉis la laĉegojn, remetis la ligaĵon pli supre sur la postkolon. Tiufoje Tom ekstaris, iris al la pordo, gratis ĝin per sia ungegofino. La virino malfermis ĝin kaj Tom estis ekstere, en la nokto.

Ĝi ne povis sin orienti en tiu nova lando. Ĉio aspektis malamika. Tom ne plu foriris, ĝi levis siajn okulojn al la viro kaj la virino, kiuj sur la sojlo rigardis ĝin. Se ili bonvolus, ĝi ja restus tie, en tiu domo, kie lumas kaj varmas.

- Kia kompatinda besto ! diris la virino.

- Pŝ ! Pŝ ! diris la viro, manlevante kvazaŭ preta bati ĝin.

Tom tuj komprenis, per unu eksalto grunte foriris.

Krome, jam io nedifinebla maltrankviligis la hundon. Neniu el ĝiaj kutimaj sensoj, nek la aŭdo, nek la flarsento avertis ĝin, sed obskura instinkto, io simila al la magneta influo, kiu orientas la kompasmontrilon. Tom ekstaris, malproksimiĝis, paŝis dum momento, revenis. Sian vojon ĝi nun retrovis. Ĝi sciis, kiun direkton elekti por hejmen reiri.

- Kion ĝi serĉas ? demandis la virino.

- Sian itineron. Sed jen trafite. Ĝi sin orientas nun.

Dum momento la vendistoj rigardis, kiel foriras Tom. Kiam ĝi profundiĝis en la nokton, ili revenis hejmen.

Tom rapide kuris. La kamparo dronis en tenebro. Neniu lunlumo. Tamen la hundo povis vidi. Cetere ĝi laŭiris tervojon, kiu kondukas rekte al Francio. Sur ĉiu kurpaŝo, Tom sentis, ke pligrandiĝas en ĝi tiu mistera povo, kiu gvidas ĝin. Kaj vigla, malgraŭ dek-ok kilogramoj surdorse, ĝi rapidiris, per troto longa, regula, persista, lasante malantaŭ si, je egalaj interspacoj, malpezajn vapornubetojn de spirado. Tom pasis, ombro griza misformata pro la grandega pako, kiu ĝibigis ĝian dorson. En la nokta silento, oni aŭdis nur la hastan kaj ritman tuŝeton de ĝiaj piedoj sur la grundo. Ne estis iu, la kamparo estis senhoma, malplena, peze kvieta. Kaj en la nokto, meze de tiu soleco, kvankam estis malhele, Tom vidis la longan kaj mallarĝan sablan vojon. Neniu arbo, neniu bosko, neniu arbeto. Kvieta majesto etendiĝis sur tiu areo.

Post longa kurado, Tom alvenis al rivereto. Tie la vojo turniĝis orten, laŭiris la etan rojon, eble ĝis la plej proksima ponto. Sed laŭ sia sperto Tom sciis, ke necesas malfidi pontojn. Tie oni ofte renkontas homojn kun suspektindaj intencoj. Do Tom haltis etan tempon, priflaris la venton, kaj, lasinte la vojeton, dekstren laŭiris la rivereton, serĉante vadejon. Senŝarĝe, ĝi transnaĝus la obstaklon sen ia hezito. Sed kun sia pakego sur la dorso, ĝi ne

aŭdacis fari tion. Iufoje, ĝi preskaŭ mortis pro tia risko. Feliĉe, elirinte el la rivero per energimiraklo, ĝi finfine revenis al la domo de sia mastro nur iomete antaŭ tagiĝo, elĉerpita, premegita sub grandega maso da tabako malseka kaj gutadanta.

Kvincent metrojn ĝi iris. Ĝi trovis irejon, kie ĝi singarde enŝoviĝis. La akvo malsekigis ĝiajn piedojn, poplitojn kaj ventron. Jam ĝi antaŭeniris nur malrapide, preta returniri se ĝi sentus, ke la pakego trempiĝas en la akvo. Sed sub la besto, la grundo ree plialtiĝis. Sen malhelpo, Tom trafis la alian bordon. Tie, ĝi vigle skuiĝis antaŭ ol daŭrigi sian iradon.

Sed tie ne plu estis vojeto. Tom devis nun sekvi mallarĝajn padetojn, herbajn bendojn, randojn de fosaĵoj kiuj limigis la kampojn. Malantaŭ ĝi, neatendite aperis la luno inter du nigraj nuboj disŝiritaj de ventopuŝo. Ekde tiam, Tom instinkte malleviĝis, fariĝis pli malalta kaj pli longa, kate ŝoviĝis laŭlonge de la tritikoj kaj avenoj. Unu fojon, ĝi denove haltis, levis la kapon super la aveno-tigoj, foren rigardis la vastegon de la kampoj, kiuj sub la luno lumiĝis de transmonda\_fantoma helo. Kaj meze de tiu ebena kaj senĝoja dezerto, ankoraŭ tre malproksime, direkte al la malhela linio de la dunoj, kiuj dekstre fermis la horizonton, ĝi ekvidis la silueton de atendanta homo. Tom faris longan rondiron, ĉirkaŭpasis la viron je ducent metroj por esti sub la vento. Tiam ĝi eksciis, ke estas hundo kun la homo. Kaj tio sugestis al ĝi malfidon. Sperto revenis al ĝia memoro, ke tiuj uloj, kiuj nokte atendas kun armiloj kaj hundoj, estas timendaj kaj evitendaj.

Malrapide, Tom enŝovigis sin en la tritikojn. Ĝi fariĝis ankoraŭ pli eta, tuŝetante la grundon per sia ventro, disŝovante la cerealojn per sia nazpinto, ondetiĝante, ŝtelirante ; apenaŭ tremetis la tigoj ĉirkaŭ ĝi. En tiu ondanta verdaĵmaro, ĝi glitis kvazaŭ ŝipo, senbrue, senskue...

Sed subite, ĝia nazo, kiu simile al pruo fendis la dikajn tritikojn, trovis antaŭ si malplenon. Tom estis alveninta al la kampolimo. Pli malproksime kuŝis nur erikejo nuda, sen kreskaĵoj, apenaŭ dise makulita de spacoj el herbo mallonga kaj rufeta.

Tom iom hezitis. Dekstre estis la dunaro, kaj pli fore la maro. Ĝi dezirus trafi tiun sekuran areon, kie la sablomontetoj ĝin kaŝus. Sed antaŭe, ĝi devis trapasi la nudan kamparon, sub la rigardo de la doganisto. En sia besta cerbo, Tom meditadis pri tiuj aferoj, kiam, subite, la hundo de la doganisto priflaris ĝin. Tom tuj komprenis, ke ĝi estis malkovrita. La tiea hundo ĵus levis la kapon, pintigis la orelojn, flaris la venton. Nun ĝi gruntis, levis la okulojn al sia mastro.

« Ek, iru Dick ! », kriis la homo.

Kaj de malproksime sekvata de la doganisto, kun la furiozo de malbona besto finfine liberigita, Dick ekimpetis al la flarita malamiko.

Tom ektimis. Ĝi reiris en la kampon, kaŭriĝis, provis sin kaŝi. Sed ĝi estis jam malkovrita. Per unu eksalto, Dick plonĝis en la tritikon kaj stariĝis sur la malantaŭaj piedoj por trovi la lokon, kie kaŝiĝis la malamiko. Tom komprenis, ke ĝi devos akcepti la batalon. Ĝi restariĝis, firme rektiĝis sur siaj fortaj piedoj harditaj pro la kutimaj penoj. Kaj, eĉ nevole, ĝiaj spinharoj hirtiĝis, ĝiaj lipegoj leviĝis ; ĝi estis preta por interbatali.

Alvenis la malamiko. Estante vidalvide, ili hezitis, ronde iris unu ĉirkaŭ la alia. Kaj, elmontrante la dentegojn, Dick bruske decidis impeti. Ĝi provis mordi sed ne trafis sian celon. Tom evitis ĝin, flanken glitis, kaj samtempe, subite turnante la kapon, longe ekŝiris la flankon de la kontraŭstaranto. Dick furioze kriegis. Per returniĝo, ĝi refoje alfruntis Tom, antaŭ ol tiu ĉi povus mordkapti ĝian gorĝon. Dume de malproksime alkuris la doganisto. Tiam Tom returniĝis kaj forkuris, ĉar ĝi ja sciis, ke ĉio estos finita se la homo alvenos pafdistance. Furioza pro tio, ke fuĝas nun sia predo, la hundo impetis malantaŭ ĝin, saltis sur ĝian dorson, provis enplanti siajn kaninojn en la ŝultron. Sed la grandega tabaksako protektis Tom. Dick ne trovis ŝireblan pecon sur tiu senforma amaso, kiun vane mordis ĝiaj makzeloj. Dume Tom kuntrenis la beston pli foren en la tritikokampo. Kiam ĝi taksis, ke tiu lasta estas sufiĉe for de sia mastro, sen ia grunto, sen ia averto, Tom

malrapidigis sian kuradon, kaj flanke enigis la dentegojn en la gorĝon de sia malamiko.

Ili sin rulis surtere, miksitaj en furioza interbatado. Dick sufokis, baraktis, koleris ĉar ĝi sentis sin mortanta. Ĝi tordiĝis, sin movis per grandegaj skuadoj. Ĝenata pro sia pakego, Tom ne havis sufiĉan flekseblon; ĝi klopodis por restariĝi, kiam ŝoko faligis ĝin dorsen. Dick sukcesis liberiĝi. Poste okazis konfuza miksbatalo : malsupre Tom, supre Dick mordante ĝian ventron kaj elŝirante haŭtopecojn. Ili sovaĝe gruntis, spiregis, ĝemis... ĝis kiam Tom sukcesis mordi la antaŭan kruron de la malamiko, iom sub la ŝultro. Sub ĝiaj molaroj la osto fleksiĝis kun longa krako, kvazaŭ seka ligno, kaj nete rompiĝis.

Dick haltis, ĉesis mordi, eligis ĝemon, kiu sinistre trenadis antaŭ ol estingiĝi. Jam estis Tom starinta kaj ĝi rapidegis tra la tritikoj. Ĝi alvenis la nudan areon, la sterilan erikejon, kie alkuris la doganisto. Ĝi ekvidis, ke la homo haltis ; la hundo ja sciis, kion li tuj faros. Tial ĝi plilongigis siajn eksaltojn, antaŭen impetis per mirindegaj malstreĉoj de siaj poplitoj. Aŭdiĝis pafo. Dum ĝi sovaĝe saltis, io krude trafis Tom kaj ruligis ĝin surteren. Sed nenion ĝi sentis. La kuglo nur trairis la dikan tabaktavolon, kiun ĝi portis surdorse. Kaj tuj restarinte, Tom daŭre forkuris kaj alvenis al la unuaj ondantaj dunoj ; tie, ĝi ĉesis kuri, haltis malantaŭ maldika arbeto, kiu kreskis sur la sablo, kaj rigardis. Ĝi vidis la doganiston, kiu alproksimiĝis al sia hundo. La vundita besto daŭre hurladis. Dua pafo... tuj ĉesis la hurladoj.

Tom longe atendis, ke la luno estu denove nubkaŝita. Poste, ombrego kuris sur la senvivan vastejon kiam pasis nubo. Nur tiam Tom forlasis sian kaŝejon antaŭ ol malaperi inter la dunojn.

Ankoraŭ longatempe ĝi plu kuradis. Ĝi grimpadis supren-suben montetojn, ondiĝojn kun krutaj deklivoj, ree supreniris, dum unu momento malkovris la senvivan kaj senliman hulon de la dunaro, kaj denove plonĝis. Ĝi tuŝetis veprojn, kuradis sur la seka herbo, kiun la vento svingis per turmentigaj tremoj.

Ĝia neerarema flaro anoncis la ĉeeston de alia doganisto iom pli malproksime. Por eviti lin, ĝi devis alproksimiĝi al la maro. De tiam Tom laŭiris la strandon. Firme sur siaj piedoj, ĝi nelacigeble kuradis sur la malseka sablo, kie la alfluo bruete deponis malpurajn ŝaŭmpaketojn. Blovadis fortega vento. En la stranga pure blua ĉielo fuĝis nuboj, krudaj masoj tra kiuj malvarme lumis la luno. Ĝi arĝente franĝis la ondokrestojn, kuŝigis mirigitajn kontrastojn de lumo kaj ombro sur la dunoj, inundis la senliman strandon de pala radiado, kiu heligis la flavan sablon. Tie, laŭirante la flusolinion, projekciante sur la grundon netan kaj fortikan ombron, Tom senlace plilongigis sian rapidan kaj regulan paŝon, rapide kaj senpene trotadis, apenaŭ elspirante. Ĝi estis kapabla tiele iradi horojn, kun tiu sama facileco. Ĉirkaŭ la hundo, plenigante la spacon, blovis la vento kun unutona kaj senŝancela kanto. Dum la silentaj intertempoj, aŭdiĝis nur la basvoĉo profunda kaj majesta de la ondoj. Ili alkuris el la plej fora alfluo de la tajdo, haste kaj regule, plenaj de kolosa kaj retenata forto. Ili ĉiuj ŝajnis konverĝi al Tom, mole venis sur la strandon por morti ĉe ĝiaj piedoj, kaj kelkfoje dolĉe lekis ĝiajn kruojn, kun tremeto de ŝaŭmanta akvo.

Ĉirkaŭ noktomezo, tra la dunaro, Tom revenis en la domon de sia mastro. Kaj demetita de siaj dek-ok kilogramoj da kontrabanda tabako, ĝi englutis kun ĝoja apetito grandegan pladon da ĉevalaĵo kun brano, antaŭ ol ekdormi.

## KVINA ĈAPITRO

- Ĉi-vespere mi revenos hejmen malfrue, diris Silvano al Ĵermena, forirante iun tagmezon. Mi iros kun Cezaro ĝis Gravelino<sup>11</sup> por alporti tabakon.

- Kioma horo signifas « malfrue » ?

- Je la deka aŭ deka kaj duono.

- Por atendi vin mi iros do al Luiza, diris Ĵermena, kiu estis timema.

- Ŝi ne estas hejme. Cezaro jam diris al mi, ke ŝi forestos ĝis morgaŭ vespere. Ŝia patro malsaniĝis kaj ŝi devas flegi lin.

- Tamen... mi ne restu ĉi tie sola ! Mi mortos pro timo en tiu dezerto !

- Vi ne bezonos atendi min. Enlitiĝu.

- Nu !... Ĉu por esti murdita en mia lito ?! Nee ! Mi prefere iros al Dunkirko. Mi vizitos Johaninon. Kiam vi revenos, survoje pasu tien por akompani min hejmen.

- Laŭ via volo, diris Silvano.

Li ne tro ŝatis, kiam Ĵermena vizitis siajn eks-gemastrojn en tiu suspektinda aĉa kafejo, kie li ekkonis ŝin. Sed li ne volis ĉagreni ŝin.

Post la foriro de Silvano, Ĵermena do rapide lavis sin kaj ekiris al Dunkirko. Plaĉis al ŝi tiaj eskapoj. Tiuokaze, ŝi kutime elektis siajn plej briletajn tualetojn por fari sensacion. Hodiaŭ, ŝi surhavis nigran robon el fajo kun falbaloj, kaj surtuton el la sama ŝtofo, ambaŭ formis « ensemblon ». Ŝia peltkolo - ĉirkaŭkolo el ermenpelto - estis donaco de Silvano. Krom tio : ĉapelo ornamita per plumego, kiu kaŝis ŝian vangon kaj karesis ŝian vizaĝon ; ŝuoj el bruna ledo de damao kun dika buko el straso ; gantoj el perlogriza fadeno, kaj mansaketo el blua bovidledo kun ŝia

---

<sup>11</sup> Gravelino (En la franca : Gravelines) : urbeto ĉe la marbordo inter Dunkirko kaj Kalezo.

inicialo el arĝento. Tio ĉi ŝajnis ĝin tre « granda sinjorino », kiel ŝi mem diris.

Kiam ŝi alvenis al Dunkirko, ekpluvis. Ĵermena devis malfaldiasian pluvombreleton, alian donacon de Silvano. Kun sia pluvombrelo ĉemane ŝi laŭiris la kotoplenajn kajojn. Ŝi saltetis de unu pavimero al alia, afekte marŝis piedpinte. Singarde, kun mienoj de katino kiu timas malsekigi siajn piedojn, ŝi klopodis eviti ŝprucmakulojn. Viroj returne rigardis ĝin, ridis diskrete aŭ ne, elmontris sian admiron. Ŝi ja sentis tiun scivolon, tiun intereson, kiujn ŝi pasante estigis. Dank'al sia sagaco de eks-ĉiesulino, ŝi ne bezonis rigardi por vidi. Ŝi antaŭflaris tiujn, kiuj sekvos ĝin. Kaj instinkte, eĉ nepensante pri tio, ŝi nekonscie retrovis sian teniĝon, sian antaŭan paŝadon, tiun koksan svingeton kiun ŝi antaŭe uzadis por loginciti la pasantojn.

Tiel ŝi trairis la kajojn de Dunkirko, laŭirante la kotajn trotuarojn, meze de la interpuŝiĝoj de maristoj, ŝargistoj, fiŝvendistinoj, gapvagantoj kaj promenantoj, kiuj obstrukciis la trairejon. Ŝi devis ĉiumomente devojiĝi por eviti montetojn el forĵetaĵoj, superpaŝi ŝnuregojn, ĉirkaŭiri ĉiajn obstaklojn. Indiferente pro kutimo, ŝi paŝis tra tiu vigla svarmo, piede de la grandaj grizaj velŝipoj, kies mastaroj estis konfuzitaj de ŝnuregoj. Ŝi eĉ ne plu rigardis la trolŝipojn, la barkojn de fiŝistoj, la grandajn vaporŝipojn, kiuj dormis tie, flankon ĉe flanko, sur la glaŭka profunda akvo, kie floris malpuraĵoj. Ŝi ne vidis la ciklopan laboron de la grupoj, kies brakoj malrapide turniĝis en la ĉielo kaj translokis balanciĝantajn ŝarĝojn ĉe ekstremaĵo de ŝnurego. Ŝi ne plu flaris la fortegan odoron de fiŝo, sala vento kaj algo, el ĉiuj tiuj maraĵoj, kiuj miksiĝis kun la karba fumo de la grupoj, kun la akra haladzo de brulita benzino.

Tiel ŝi alvenis antaŭ etan kafejon ĉe placeto, kiu duflanke larĝe rigardis al la haveno. Sep aŭ ok samaj drinkejoj konsistigis la tutan fundon de la placo ; tiu de la eks-mastrino de Ĵermena distingiĝis de la aliaj banale verde aŭ brune farbitaj, per sia viola fasado plibeligita per flavaj strekoj, kiuj evidente celis aspekti kvazaŭ



« moderna arto ». Antaŭ ol eniri, Ĵermena jam konis la dekoracion, kiun ŝi vidis ene. Ĝi estis kafejo, kiun oni volis altigi al la rango de stardrinkejo per stranga flortapeto, komplika verŝotablo, rombaj speguloj, lustro el farbita ligno de kie falis senĉarma rozkolora lumeto, tre etaj tabloj ringitaj per kupro, kaj malstabilaj ridinde altigitaj taburetoj. Jam en la tempo de Ĵermena ĉio estis simila. Nenio estis ŝanĝita.

La eniro de Ĵermena okazigis sensacion. Ĉeestis multaj homoj. La trinkejo estis plena. Kaj la salono mem estis plenplena de klientoj, kiuj trinkis ĉampanon, fakte « ŝaŭmvinon » tiel nom-sanĝita por la cirkonstanco. Ĵermena trairis tiun tumulton, estigante bruan kriadon de admiro survoje. Ŝi eĉ ne ridetis. Ŝi kutimis tian entuziasman bonvenigon, tiajn kriadojn de ebriaj uloj, kiuj ĝenerale salutis la alvenon de iu ajn virino en la domon de Sinjoro Henriko. Ŝi eniris en la kuirejon, kie Sinjorino Johanino estis kontrolanta sian kontolibron.

S-ino Johanino estis virineto proksimume kvardek jaraĝa, bulronda, kun dikaj brusto kaj koksoj, kaj kies ventrego ne malhelpis ŝin rapidegi, sen paŭzo nek ripozo, de supre malsupren en sia tuta domo. Ĉiam ŝi vestiĝis per morkonforma longa robo, deca antaŭtuko de bona hejmomastrino. Malsupre aperis mallongaj dikaj kruroj kun masivaj maleoloj. Ŝiaj nudaj brakoj eliris el manikoj daŭre falditaj kuspe sur la kubutoj. Ruĝaj, vermilionaj, riĉaj pro abunda sango, kiun oni sentis fluegi tuj sub la haŭto, ŝiaj brakoj faris impreson de bonega farto. La estrino havis bonan vizaĝon, larĝan, grasan, gajan, kie vidiĝis vejnetoj. Ŝia haŭto brilis pro ŝvito kaj graso. La nazo eta, kuspa - iom kiel marmitopiedo ; la okuloj globaj, grizaj, kvietaj ; la lipoj molaj kaj larĝaj ; la hararo lin-kolora, kuntirita sub dika hartubero laŭ malnova maniero : ŝi multe pli ŝajnis kuraĝa hejmomastrino ol mastrino de fifama drinkejo.

- Nu... ŝi diris, vidante Ĵermenan eniri, ĉu estas vi, filino mia ?  
Ja eksidu ! Ĉu ĉio plu iras glate ?

- Jes, dankon, respondis Ĵermena.

Kaj ŝi prenis seĝon, sidiĝis apud la fajrejo, etendis la manojn al la varmo.

- Ĉu vi kontrolas viajn kontojn ?

- Ne, mian vendosumon. Kaj mi ne plu memoras, ĉu estis la 17an aŭ la 18an, kiam mi vendis tiom da ĉampano.

- Ĉu tio multe gravas ?

- Ha, karulino mia !... kaj se li estus impostoficisto, tiu ulo kiu venis tiom diboĉi ? Eble li intence faris tion por enfali min en kaptilon. Mi ja memoras, ke li havis strangan aĉan vizaĝon. Sufiĉus, ke li venos por kontroli mian kontolibron, grave fuŝus mia komerco... - Kaj kiel fartas Silvano ? Ĉu li daŭre okupiĝas pri tabako ?

- Ĉiam.

S-ino Johanino multe interesiĝis pri Ĵermena, unu el siaj eks-« pensionaninoj ». Dum pli ol kvar jaroj ŝi loĝis en la domo. Kaj - jen raraĵo - ambaŭ virinoj bonege konkordis kaj neniam kverelis. Poste alvenis Silvano, kiu konatiĝis kun Ĵermena kaj enamiĝis al ŝi. Kiam li postulis, ke Ĵermena forlasu tiun profesion por esti ekskluzive lia, S-ino Johanino spertis grandegan ĉagrenon. Tamen ŝi komprenis, ke tio estas necesa, ke temas pri la bono de tiu fraŭlino. Sed pro tiel longa kunvivado, ili korligiĝis. Kiam unu « pensionanino » de S-ino Johanino ekŝiĝis, la mastrino ŝin promesigis, ke ŝi skribu ; ŝi ŝatis daŭrigi la interrilatojn, almenaŭ kelktempe, ĝis la vivo ilin definitive apartigos. Ĵermena daŭre restis la amikino de S-ino Johanino ĝis tiu tago. Ŝi loĝis tuj apud Dunkirko. La profesio de Silvano ofte rilatigis lin al klientoj de S-ro Henriko, la mastro. Pro tio, ne pasis unu semajno sen ke Ĵermena venis por revidi S-inon Johaninon. Ŝi ŝatis tiujn vizitojn. Tiam ŝi retrovis konatajn etoson, parolmanieron, vizaĝojn, odorojn - fakte la medion de sia juneco. Krome, ŝia nova situacio de edzino iom ebriigis ŝin. Ŝi sentis fierecon pro paradi tien, honesta kaj respektinda antaŭ tiuj virinoj, kiuj ŝin iam konis kiel ĉiesulino same kiel ili. Ŝi estis kvazaŭ tiuj novriĉuloj, kiuj, elirinte el nenio,

poste revenas altrudi la spektaklon de sia sukceso al sia naska vilaĝo. Des pli, ke ŝi estis nun bonhava. Silvano lukris multe da mono kaj de tio Ĵermena profitis. Ŝi aĉetis al si belajn tualetojn, tro multekostajn aĵojn, senutilajn koketaĵojn, konservante en tiu nova situacio siajn malnovajn gustojn de ĉiesulino, kies mono rapide gajnita estas rapide elspezita. Neniam ŝi alvenis ĉe S-ino Johanino sen elmontri ian novan galanterion, ĉapelon, gantojn el damaledo, robon el ĉina krepo, ŝuojn el serpentoledo, aŭ skarpon, mansaketon, etan ombrelon kun strangege tenilo. Kaj tio ĵaluzplenigis la « pensionaninojn » de S-ino Johanino, antaŭ kiuj, Ĵermena orgojle elmontris siajn ornamaĵojn.

- Kia homamaso, hodiaŭ, ĉu ne !? diris Johanino, finfine refermante sian kontolibregon, kaj relevante la kapon por rigardi al Ĵermena.

- Jes ja ! Kie estas S-ro Henriko ?

- Li staras ĉe la verŝotablo kaj servas la klientojn.

- Neniun konatulon mi vidas...

- Ne, nur novajn vizaĝojn. Ha, jes ja !... tamen ĉeestas Lurĵo. Ĉu vi ne konas lin ?

- Ne. Kiu ?

- La alta ulo, kiu parolis al Henriko. Li certe estas nun ĉe la verŝotablo. Iu « negro », laŭdire fortikulo. Silvano devus ja malfidi lin.

- Mi ne rimarkis lin, diris Ĵermena kun intereso. Kia li estas ?

- Ho ! Bonaspekte ! Belega viro, alta brunulo kun dikaj lipharoj... Nu, iru por voki al Henriko. Nur diru, ke mi bezonas lin. Tiel vi vidos la aliulon. Estas por vi preferinde, ke vi ekkonu lin. Jen homo, pri kiu oni ne malfidas, sed li estas ja danĝera.

- Mi tuj iru, diris Ĵermena.

Ŝi leviĝis, trairis la salonon, alvenis en la kafejoĉambron plenplenan de homoj. Per la unua rigardo, ŝi ekvidis unu grandan brunulon, kun larĝaj ŝultroj, kiu parolis kubutapogante ĉe la

verŝotablo. Ŝi tuj divenis, ke estas li tiu timinda Lurĵo.

Nediskuteble, belulo li estis. Ĉar ŝi kutimis ĵuĝi la virojn kiel masklojn, laŭ iliaj fizikaj ebloj, Ĵermana admiris lin. Imprese ŝultrolarĝa li estis ! Liaj haroj, kies koloro aspektis tro intence nigra por esti natura, dense kovris lian kvadratetan kapon firmiĝintan sur masiva kolo. Lia frunto estis malalta sed inteligenta, ŝveligita de tuberetoj kaj enfendita de energia falto. Malpli nigraj ol la hararo, liaj brovoj desegnis malregulajn liniojn, kaj, hirtaj, sovaĝigis liajn etajn bluajn okulojn kun senmova kaj malmilda rigardo. Lia nazo misformita pro multaj batiĝoj ampleksiĝis sur la kvadrata vizaĝo larĝa en la malsupro. La vangostoj kaj la muskoloj de liaj makzeloj forte elstariĝis. Ĵermana mire rigardis la gigantan pugnon tuberplenan kaj malglatan, kiun li parolante metis sur la verŝotablon.

Fronte al li, malantaŭ la verŝotablo, S-ro Henriko razita, pudrita, « kosmetikita », kontraste aspektis preskaŭ malfortika. Tamen ankaŭ li ne estis tiel malbela persono. De meza staturo, kun eta kaj inteligenta vizaĝo, li tre kokete zorgis pri si, glatigis siajn blankiĝantajn harojn, ŝmiris sian haŭton per parfumaj kremoj, ofte karesis sian mentonon per aŭtomata gesto por kontroli al si la freŝecon kaj velurecon de la epidermo. Krome, li havis la vizaĝon rozkoloran kaj grasan de bonfarta homo, kiu nenion rifuzas al si. Liaj grizaj okuloj brillumis pro ĉiama memkontento. La oreloj apenaŭ tro ruĝaj, la lipoj malsekaj kaj vermiljonaj, la vangoj plenaj : ĉio atestis fortikan sanon. Li havis manojn blankajn kaj bone prizorgatajn, manojn de senokupulo, kun mola haŭto kaj puraj ungoj. Estis li homo kontenta je sia sorto.

Kaj kial do li ne estus tia? Li loĝis en tiu prospera domo kvazaŭ vera rentulo. La mono eniris sen ia problemo ; oni havis nek zorgon nek timeton. Ĉiutage, S-ro Henriko iris en la urbon por sia eta promenado, kaj tie renkontis geamikojn, kiuj montris al li multan konsideron. Por ĉiu sezono, li havis grandan elekton da distraĵoj : fiŝkaptado, kartludo, sed ankaŭ kino, buloludo kaj bilardo. Kaj tamen la enspezoj grandiĝis : S-ino Johanino kontrolis ĉion,

spertege mastrumis la domon. Malrapidete oni akumuladis rentojn, bonajn ŝtatajn rentojn, aŭ la plej elstarajn akciojn, senriskajn valorpapirojn. Henriko nur bezonis lasi sin vivi, dorlotita, eldorlotita, karesetita de sia tenera edzino, por kiu li estis objekto de amo kaj admiro.

- Kion vi volas, Ĵermana ? li demandis ekvidante la junan virinon alproksimiĝi.

- Vin vokas Johanino... kiam vi havos tempon.

Lurĵo insiste rigardis Ĵermanan. Al li plaĉis ŝia freŝeco, ŝia komenciĝanta ventrodikeco. Krom tio, ŝi aspektis decidita, memfida, malsimile al la ĉiesulinoj kun iliaj maltimo kaj senhonto. Ŝi volis sentigi, ke ŝi estas serioza virino. Sed aliflanke ŝin allogis Lurĵo. Ŝi ne povis ne ŝtelrigardi lin, interesata, konfuzata de tiu bela viro, kiun ŝi antaŭflaris virinŝatanto. Kaj Lurĵo ekkonsciis pri tio. Iliaj rigardoj kruciĝis du-trifoje. Tio stulte emociigis Ĵermanan, dum Lurĵo kontraŭe eltiris el tio vantecon, kiu aŭdacigis lin.

« Ĉu la Sinjorino trinkos glason ? », li gaje proponis.

Kaj S-ro Henriko, kiu bone konis sian profesion de kafejestro, tuj verŝis glason da benediktanlikvoro. Li rigardus kiel gravan ofendon, el Ĵermana, la fakton fuŝeti la vendon per rifuzo de iu ajn trinkaĵo.

Ĵermana trinkis sian glason kun nekutimaj mienoj, lipfine, tre konvene. S-ro Henriko foriris al la kuirejo ; dum momenteto ŝi estis sola kun Lurĵo.

Serĉante konvenajn vortojn, la viro kuspis al si la lipharojn per sia pugno.

- Ĉu vi ofte venas en la kafejon de Henriko ? li demandis.

- Jes, ĉar mi estas amikino de S-ino Johanino. Kio pri vi ?

- De tempo al tempo, diris Lurĵo, kiu ne volis kompromitiĝi malkaŝante sian funkcion de doganisto.

- Ĉu vi estas kliento ?

- Jes, precipe amiko. Dank'al mia metio, mi devas ofte veni ĉi tien, en tiujn havenajn kvartalojn.

- Vi estas... ?

- Reprezentanto.

Ĵermena, komprenante la pravan singardemon de Lurĵo, ne rebatis la mensogon. Cetere, eniris unu policano en la kafejon ; li alproksimiĝis al la verŝotablo.

« Bonan tagon, Ĵermena », li diris.

Ĵermena rekonis sian najbaron Julio.

- Ĉu vi atendas vian edzon ? li demandis.

- Jes.

Julio jam komprenis la palpebrumon, kiun Lurĵo direktis al li. Li ŝajnis ne koni lin, kaj ignori lian ĉeeston, kvankam la plej sentima « negro » en la brigado estis fama ĉe ĉiuj policanoj.

- Ĉu la estro ne apudeblas ? li demandis.

- Li estas en la kuirejo, diris Ĵermena, mi tuj iros por voki lin.

- Laŭ via volo. Oni patrolos ĉi-vespere. Sed ne estas taŭga vetero por promenadi, ĉu ne ? Tial oni dezirus, ke li malfermu la kafejon kaj preparu kafon.

- Bonvolu iomete atendi.

Ĵermena foriris en la kuirejon :

- La policist' Julio estas ĉe la verŝotablo. Li venos ĉi-vespere, ŝi diris.

- Ĉu li deĵoros ?

- Ŝajnas.

- Mi tuj iros.

Ĵermena restis sola kun S-ino Johanino.

- Ĉu vi vidis Lurĵon ? demandis la estrino.

- Jes.

- Bela viro li estas, ĉu ne ?

- Jes.

- Kaj ankaŭ lertulo, vi sciu ! Jam multe da fortuloj li arestis...  
Ĉu Silvano venos ĉi-vespere por hejmen reiri kun vi ?

- Jes. Sed li ne plu havos tabakon. Ĉion survoje li devas liveri.

- Des pli bone ! Ĉar tiu Lurĵo povas flari belgan tabakon kvazaŭ vera ĉashundo. Nekredeble ! Kaj aŭdaca li estas ! Nenion li timas ; eĉ la plej aĉajn drinkejojn li vizitas ; kun iu ajn li ekbatalas. Iam lin trafis revolverkuglo en la ŝultron, kaj tranĉil-frapo sur la frunton. Ĉu vi vidis la cikatron ?

- Ne.

- Tio ekforviŝiĝas nun. Sed li estis forte vundita. Ja maltima li estas. Kaj ankaŭ obstina. Kiam li volas iun kapti, li sukcesas. Ĉe stratangulo li povus resti tutajn tagojn sen manĝi, eĉ sen trinki unu glason, ĉu neĝus aŭ frostus. Kiam li scias, ke oni transpasigos tabakon, nenio povas haltigi lin.

- Ŝajne li ne konas Silvanon, ĉu ?

- Ne. Ĉar li jam parolintus kun mi pri Silvano. Sed Cezaron li jam malkovris, tion mi scias... Ankaŭ virinojn li ŝatas. Li estas edziĝinta, sed ne gravas, li tamen amindumas. Sian edzinon li abrupte forlasis pro tio...

S-ino Johanino ĉesis paroli, levis la kapon por aŭskulti pezan paŝon, kiu krakigis la ŝtuparon.

« Nun malsuprenvenas la kliento de Neneta. Lin mi tuj paroligu ! »

Kaj ŝi rapidegis al la ŝtuparoŝakto, atendis la klienton, invitis lin en la kuirejon.

« Venu por trinki glason. Ion bonan mi havas en la kuirejo. »

La viro eniris. S-ino Johanino plenigis unu glason da portovino.

- Vi pravas ! Bonega ĝi 'stas ! trinkinte li diris

- Tiu ĉi estas nur por amikoj, mia karul' ! Do, ĉu glatis la afer' ĉi-supre ? Ĉu vi bone amuziĝis ?

- Ho jes ja !

- Ĉu vi estis aminda kun la etulin' ? Vi espereble donis al ŝi sufiĉan trinkmonon, ĉu ? Vi bone scias, ke tio 'stas ŝia eta gajno.

- Dek kvin frankojn mi donis. Ne 'stas malsufiĉe, ĉu ?

- Bonege ! Bone sufiĉas. Ĉar lastfoje, vi ne estis tiel donacema.

- Jes ja ! Mia prez', tio 'stas. Donas ĉiufoje dek kvin frankojn.

- Ha ! diris Johanino. Mi kredis, ke... Bone, ne gravas.

La viro trinkis duan glason da portovino kaj foriris en la kafejon.

« Kia knabinaĉ' ! Kia ŝtelistin' ! ekkriis Johanino. Mi tuj superruzu ŝin ! Tion vi tuj vidu ! Jen ŝi malsuprenvenas... »

La knabino envenis la kuirejon. Ŝi estis granda brunulino kun graka voĉo kaj kontuzitaj okuloj. Ĵus alveninte, ŝi eksidis sur seĝon. Kaj, aspektante lacega, ŝi oscedis, larĝe malfermante la buŝon, montrante sian blankan kaj tute tartrigitan langon.

« Kia profesi' ! », ŝi sopirĝemis.

S-ino Johanino sin retenis, klopodis bone vizaĝaspekti.

- Nu, kio pri niaj kontoj ? ŝi demandis.

- Jen, diris la fraŭlino.

Ŝi eltiris el sia ŝtrumpo du bankbiletojn de kvin frankoj.

- Mi ricevis dek frankojn. Jen kvin por mi kaj kvin por vi.

- Ĉu vi certas, rilate vian konton ? demandis S-ino Johanino.

- Jes.

- Nu, estas bone. Vi povas resupreniri en vian dormoĉambron kaj fari viajn pakaĵojn. Mi ne plu volas vin ĉi tie.

- Sed kial do ?

- Ĉar tro stulta vi estas por trompi min, kara. Oni ne tiel facile superruzas min. Ankoraŭ ne estis vi naskiĝinta, kiam mi mem faris



jam tiun metion, vi sciu ! Vi ricevis dek kvin frankojn de via klient', kaj dek kvin lastan fojon, kaj dek kvin ĉiufoje, kiam li supreniras kun vi. Tion mi scias ĉar li mem diris al mi. Kaj se vi ne estus stultulin', vi malfidus, kaj vi ne provus trompi min. Nun, for ! Pretigu viajn pakaĵojn !

- Nu, bone... Ni ne kverelu pro tio, provis diri la fraŭlino.

Sed S-ino Johanino estis malcedema :

- Estas mia hejm' honesta. Oni ne bezonas ŝtelistojn. Ek ! Foriru !

- Sed mi ne plu scias kien iri ; ĉie oni jam ekscias pri mi en Dunkirk'. Kaj Ludvik' min batados... bonvolu Sinjorin' Janjo...

- Vi iru prepari viajn pakaĵojn, mi jam diris. Nenion mi aŭskultos. Kaj se vi min plu tedegos, mi alvokos Henrik'. Vian pugon li eĉ piedbatos ! For el mia hejm' !

La knabino foriris.

- Je kioma horo Silvano venos kunpreni vin ? tuj poste demandis S-ino Johanino kun la menskvieto de virino kutimata je tiaj kvereloj.

- Ĉirkaŭ la deka, ŝi diris.

- Tiel vi ankoraŭ havas tempon. Mi tuj faru kafon por vi.

Kaj pludaŭris la konversacio.

## SESA ĈAPITRO

Nur post la deka revenis Cezaro kaj Silvano. Tiumomente en la kafejo restis nur S-ro Henriko, absorbata en aparte interesa konversacio kun Lurĵo. Per glaseto post glaseto, la doganisto kvazaŭ ebriigis sian partneron, kiu volonte oferis sin por funkciigi sian komercon. Dum S-ro Henriko parolis pri siaj ambicioj kaj estontaj planoj, Lurĵo lin pridemandis pri Ĵermena, per lertaj frazoj, kiuj iom post iom sukcesis klarigi obskurajn punktojn. Lurĵo interesiĝis pri Ĵermena. Ŝi apartenis al la virina tipo, kiu plaĉis al li : juna, grasa, fortika. Ŝi havis belajn brilajn okulojn, kiuj malkaŝis voluptaman kaj vivoplenan virinon al iu ajn kompetentulo. Ŝi ŝajnis honesta, kio igis ŝin des pli alloga en tia rondo. Krome, Lurĵo kredis antaŭflari ŝian intereson por li. Per multe da insidaj demandoj, li finfine eksciis, ke tiu ekspansionano de S-ino Johanino edziniĝis kaj estas rigardata kiel serioza, havante edzon, kiu gajnas multe da mono, kaj kiun ŝi ŝajnas ami. Eĉ pli ekscitis Lurĵon ĉiuj tiuj obstakloj...

Kiam eniris Cezaro kaj Silvano, Lurĵo apenaŭ atentis pri tiuj novaj alvenantoj, kiuj senprokraste eniris en la kuirejon, kiel kutimaj gastoj. Cetere, tion li tuj poste bedaŭris ĉar S-ro Henriko diris al li :

« Nu ! Ĉu vi ekvidis lin ? Estas li : jen la edzo ! »

Lurĵo rapide rigardis returne, sed tro malfrue ĉar Silvano estis jam foririnta.

Instinkte naskiĝis en Lurĵo senkiala obtuza malamo nur pro antaŭsento, ke tiu homo povus esti estonta rivalo.

- Nu, bone lukras tiu ulo, li daŭrigis. Kion do li faras ?

- Mi ne bone scias, diris Henriko, kiu, eĉ kiam ebria, ĉiam konservis sian realosenton. Li komercas pri grajnoj, mi opinias.

- Ha ! Ĉiurilate belan edzinon li havas ! Tion mi diros al li venontfoje, kiam mi vidos lin.

- Ne faru tion ! ekkriis S-ro Henriko. Li kapablus rompi al vi la kapon. Sciu, ke li amas ŝin...

- Necesus alia viro ol li por rompi mian kapon, Lurĵo respondis malhumile.

Kaj senkonscie li rektiĝis kaj ŝveligis la torson, kvazaŭ prepariĝante al la lukto.

Sed S-ro Henriko ne ŝajnis impresata. Li dube grimacis :

« Ankaŭ li estas fortikulo... »

Lurĵo sentis, ke neracia malamo kreskas en li kontraŭ tiu nekonatulo, kiu bone lukris, posedis belan edzinon kaj estis rigardata kapabla rivali kun li, Lurĵo, per muskola forto. Li tamen komprenis, ke estus ridinde pluinsisti tiurilate kaj montri senutilan fanfaronadon. Pri alia afero li ekparolis.

Cetere, S-ino Johanino nuntempe deziris fermi la trinkejon. Tuj eksonos la dekunua. Necesos mallumigi por eviti monpunon. Ŝi estis elpelanta la ebrietan klientaron, kiu daŭre restadis en la salono - junaj diboĉantaj fraŭloj, kun kiuj ŝi cetere vigle ĵus diskutaciis, ĉar ŝi postulis, ke ili pagu por malplenaj boteloj da ĉampano, kiujn ŝi lerte miksis kun aliaj, en la malordon de la tablo. Fine ŝi sukcesis, timiginte ilin per la elvoko de la okazonta alveno de policianoj ĉi-nokte.

Kiam malpleniĝis la salono, oni mallumigis. Sed Lurĵo ne estis decidita foriri.

- Mi havas kamaradojn en la polico, li diris. Ĉu vi atendas viziton ĉi-nokte ?

- Jes. Ĉiufoje, kiam okazas kontrolturneo en la apudeco, ili venas pasigi kelkajn horojn tie ĉi. Des pli bone ! Ĉiam valoras bone akordiĝi kun policianoj. Venu do en la kuirejon, se vi volas ilin atendi.

Ili malfermetis la pordon rigardantan al la strato. Kiam la kafejo estis tute malluma, ili eniris la kuirejon. Tie, S-ino Johanino kviete trikis ŝtrumpojn por sia edzo. Cezaro kaj Silvano ambaŭ faris

komplikajn kontojn, antaŭ ol foriri. Tuj apud sia edzo, Ĵermana silente rigardis la fajron, moliĝanta, malvigliĝanta en tiu bona varmo, kie ŝia apatia naturo plezuriĝis.

Lurĵo tuj rekonis Cezaron. Kaj ĉi tiu lasta ankaŭ rekonis la « negron ». Jam antaŭe ambaŭ konfliktis. Sed ili manpremis sen kontraŭsento, eĉ elkore - iom kvazaŭ luktantoj, kiuj post la batalo forgesas ĉian rankoron.

Sed Lurĵo tuj ekhavis dubojn. Silvano ŝajnis tro kamarada kun Cezaro ; estis suspektinde.

« Ĉu estus ankaŭ li fraŭdulo ? sin demandis la doganisto. Estus ja komike ! »

Li ŝtelekzamenis la vizaĝon de la homo, sed ne sukcesis rekoni lin. Kompreneble, li neniam renkontis lin. Kaj, koncerne siajn profesiajn aferojn, Lurĵo havis seneraran memorkapablon.

Ankaŭ Silvano neniam renkontis Lurĵon sed konis lin pro onidiro. Tamen, li estis tre kvieta : eĉ ne unu belgan cigaredon li kunportis, kaj la « negro » ne povis suspekti lin. Silvano estis do sufiĉe kontenta pro tia ebleco rigardi tiel komforte kaj tute sekure la famulon de la doganbrigado. De tempo al tempo, ambaŭ viroj rapide kaj funde esplorante ekrigardis unu la alian.

Cetere ili ne havis tempon por longe ekzameni unu la alian. La pordo rigardanta al la strato grincis sur siaj ĉarniroj.

« Jen ili alvenas », diris Johanino levante la kapon.

Kaj S-ro Henriko rapidiris por ŝalti la lumon por tiuj sinjoroj de la polico. Gajaj, kontentaj pro la bona tempo, kiun ili jam antaŭvidis, la policanoj eniris en tiun lokon, kie ili estis la mastroj. Ĉiujn ili manpremis, diskrete mansignis al Lurĵo, tiamaniere ne riskante lin kompromiti, kaj reiris en la salonon, kie S-ro Henriko jam malkorkis ĉampanon por ili. En la kuirejo restis nur Julio, la najbaro de Cezaro, por iom paroli kun tiu ĉi kaj Silvano. Li vidis Ĵermanan, kaj ne aŭdacis festadi antaŭ ŝi : tion ŝi povus rakonti al lia edzino. Cetere, Cezaro lin tuj alparolis, ĉar ili estis grandaj

amikoj.

- Ĉu glatas ĉio en la polico ? demandis la fraŭdulo.

- Jes. Kaj pri la tabaknegoco ?

- Ankaŭ glate. Tiu diabla Lurĵo ! Li ankoraŭ ne sukcesis min kapti !

Ĉiuj ne povis ne ridi, Lurĵo la unua. Tiu ŝerculo Cezaro scipovis amuze paroli pri la aferoj. Kaj Lurĵo definitive forĵetis sian maskon : li mendis ĝeneralan trinkregalon, kaj enmiksiĝis en la konversacion sen plua rezerviĝemo. Tie oni estis inter amikoj ; nun la batalo ĉesis ; ĝi povus ja morgaŭ rekomenciĝi.

De sia sidloko, Ĵermena ŝtelrigardis Lurĵon. Ŝi estis tuj kontraŭ la ŝultro de Silvano ; tie ŝi ripozis, en feliĉa dormemo. Kaj ŝajnis al ŝi agrable rigardi tiun belan viron. Ŝi trovis lin belega. Eliĝis el li impreso de forto kaj memfido, kiu trafis la junan virinon. El la malproksimaj ŝlimaj tempoj de sia aventura vivo, ŝi konservis tiun respekton por la muskola fortikeco. Kontraŭ ŝia volo, fortika viro samtempe timigis kaj allogis ŝin. Antaŭ li, Ĵermena sin sentis senrezista. Ŝi komprenis, ke ŝi povus lin nur obei kaj sekvi obeeme, se li iam antaŭflarus tion, kio okazis en ŝi.

Ankaŭ Lurĵo rigardis Ĵermenan de tempo al tempo. Tutcerte, ŝi plaĉis al li. Ŝatante la virinojn, li havis de tiaj situacioj jam longan sperton. Eĉ ne trifoje lia rigardo krucis tiun de Ĵermena : li komprenis jam, ke ŝi iel interesiĝas pri li. Tio donis al li aplombon por pli laŭte paroli, diri spritaĵojn; li impresis ĉiujn per la klareco de siaj asertoj. Li aspektis kiel memcerta viro, sciante kion li diris kaj volis. Ĉiuj, Ĵermena la unua, admire aŭskultis lin. Iafoje, li turnis sin al la juna virino, parolante rigardis ŝin tiel insiste, ke Ĵermena havis la impreson, ke li parolas nur por ŝi sola. Tio emociigis ŝin. Ŝi deturnis la okulojn, kaj tuj kiam li ne plu rigardis ŝin, ŝi refoje direktis ilin al li. Kiam iliaj rigardoj kruciĝis, ŝi havis rapidan palpebrumon, kiun Lurĵo rimarkis. Tiel pli ekscitite, li montriĝis malavara kaj pagis pliajn rondregalojn. Obtuze en li kreskis malamikeco kontraŭ Silvano. Li ekzamenis la fraŭdulon

per rapidaj ŝtelrigardoj. Scipovante rapide opinii pri la homoj, li ekkoleris ĉar li ne sukcesis malkovri iun ajn malfortan flankon, iun ajn fizikan malperfektaĵon ĉe la eks-boksisto. Li devis konsenti, ke tiu viro estas belstatura, kun larĝa torso kaj ne tro pezaj membroj, fleksebla malgraŭ la forto de la muskolaro. Bela batalbesto nekontesteble li estis.

Dum li parolis, Lurĵo ne perdis sian sagacon, sian profesion zorgon. Ĉe ĉiu interveno de Silvano en la konversacio, Lurĵo aŭskultis, analizis ĉiujn liajn parolojn, klopodis eltrovi indicon, kiu ekmalkaŝu la profesion de tiu, kiun li kontraŭvole jam ekrigardis kiel rivalon. Kaj li koleris, ĉar nenion suspektindan li malkovris en la lakona sinteno de Silvano. Tamen, en ĉi tiu li sentis singardemon kaj nenormalan deteniĝemon. Incitite, malkontente, li povis nur imagi al si, ke tiu ulo muskola kaj robusta ne estos facile venkita per ruzo.

S-ino Johanino estis foririnta en la salonon, kie tiuj sinjoroj policistoj estis ja tro bruemaj. Ili fariĝis malprudentaj ĉar oni povis aŭdi ilin ekstere. S-ro Henriko estis parolanta kun Julio kaj Cezaro. Tiu ĉi lasta, mokeme, ŝatis ŝerci pri tiuj policanoj kaj doganistoj, kun kiuj, ĉi-foje, li povis interparoli egalnivele; li rememorigis la pasintan aferon, la batalon inter Silvano kaj la doganistoj. Tiu evento jam estigis multajn komentojn. La doganistoj, malfieraj pro sia rolo, ĝin zorge prisilentis, temante mallaŭdon de siaj estroj. Sed la « akcizulo » estis malpli silentema. Kaj nun la doganistoj multe donintus por purigi tiun ardan ofendon, kiun nekonatulo altrudis al ili.

- Nu, diris Cezaro, fortikuloj vi estas en la polico kaj dogano, tion oni vidis ! Tri homoj kontraŭ unu, ne eblis venki !

- Unue, replikis Julio, malkontente, mi ne ĉeestis, kaj mi ne lasintus min bati tiamaniere.

- Vi farintus kiel la aliaj. Oni konas vin. Vi ĉiuj estas kuraĝaj en la policejo, precipe kiam vi estas deko por draŝi unu kompatindan ulon. Sed unu homo kontraŭ alia... Ĉu ne, Silvan?

- Estas vere, kurtvorte diris Silvano.

Kaj li silentis. Ne plaĉis al li paroli pri tio antaŭ Lurĵo. Cezaro estas nesingardema, li opiniis.

- Vi ja bone scias, diris Julio, ke en la policejo mi draŝas nur malofte.

- Vi, ne...

- Kaj ankaŭ, ke mi neniam retroiras antaŭ unu homo; pruvo estas, ke kelkfoje ni ambaŭ trejnas. Ĉu mi timas vin tiam?

- Ne, refoje respondis Cezaro, sed Silvanon vi timas.

- Jes ja, Julio senhonte konfesis, sed li estas tro peza por mi; ne estas malhonoro.

- Kial vi parolas pri tio? malkontente reagis Silvano. Oni ne estas ĉi tie por paroli pri bataloj.

- Kompreneble, sed temas pri tiu pasinta afero. Se la ulo estintus kiel Silvano, imagu, kion vi farintus, Julio?

- Kaj vi mem ?

- Mi lasintus lin foriri.

- Do ankaŭ mi. Vi vidas ja, ke vi ne estas pli ruze lerta ol aliulo.

Venkite, Cezaro ĉesis argumenti.

Tiam enmiksiĝis Lurĵo. Tiu tuta konversacio, kiu nur strebis senkontestan akcepton de la escepta fortikeco de Silvano, incitis la doganiston. Li ne suspektis la rolon de Silvano en la pasinta afero, sed li ŝatintus, ke la viro fieriĝu kaj montru sian forton, por malmilde rebati lian arogantecon poste. Bedaŭrinde, Silvano ne kontraŭstaris, daŭre restis indiferenta pri la debato, kaj per sia sinteno ŝajnis nur mallaŭdi la kamaradon, kiu okazigis la konversacion rilate al tiu riskplena temo.

Tiam decidiĝis Lurĵo mem ataki.

- Nu, li diris, vi povas ja fanfaroni, Julio, sed mi ne komprenas, ke tri homoj lasis sin bati per unu sola. Jam aliajn fortikulojn mi

mem kontraŭstaris !

- Vi pravas, akordiĝeme diris Silvano, homo estas nur homo.

- Jes, rebatis Cezaro, sed iuj estas dikuloj kaj aliaj malgranduloj. Mi volas diri, ke, de tempo al tempo, la doganistoj eltrovas sian mastron. Estas bona leciono por ili !

- Sian mastron ĉiu eltrovas iam, rimarkigis Julio.

- Tamen, diris Lurĵo, mi ne ofte eltrovis lin.

Kontraŭvole, li rigardis Silvanon, kaj lia rigardo pli malboniĝis.

Malrespekte rideksplodis Cezaro :

- Tamen ekzistas iuj, li diris kun incitega rido, apud kiuj la dika Lurĵo tute ne estas tiom granda !

- Ĉu eble vi mem ?

- Ne mi, malgraŭ ke, iam, se mi ne ŝatintus la virinojn... Sed ja tiu ĉi !

Kaj li montris Silvanon en la angulo, kie li sidis.

- Nu, sufiĉas ! Sufiĉas, Cezaro ! diris Silvano.

Lurĵo arogante rigardis Silvanon.

- Amiko, vi ne sukcesus min ĵeti teren.

- Eble, flegme respondis Silvano.

Sed Julio mem proteste ekkriis :

- Vi ne scias, kion vi diras, Lurĵo !

- Jes ja, asertis la doganisto.

- Nu, provu do, spite me diris Cezaro.

- Sufiĉas nun, Cezaro, pludiris Silvano.

Sed Lurĵo intervenis :

- Ne estas mi, kiu malkuraĝas, kamarado. Fronte al iu ajn, neniam mi cedis.

Silvano komprenis, ke tiun interbatalon li ne povos eviti. Iom



pala, li stariĝis :

- Ĉu batalon vi deziras, kamarado ? Eksciu, ke mi ne timas ĝin.

- Tia vi ne aspektas.

Silvano ne degnis repliki.

- Kion vi volas ? Luktadon aŭ piedbatolukton ? Bokson mi ne volas. Oni ne eltrovus boksgantojn ĉi tie, kaj mia edzino ne plu volas, ke oni difektu al mi la vizaĝon.

- Luktadon do, elektis Lurĵo. Sentrompe, ĉu ?

- Kompreneble. Kiam la unua el ni ŝultren tertuŝos, tiam estos la fino de la batalo.

Kutimiĝinta al tiaj moroj, S-ro Henriko deprenis de la ĉambroties tablon kaj seĝojn. Julio alvokis la policistojn, kiuj estis en la salono. Unu el ili sin proponis kiel arbitracianton. Kaj la du viroj ekmalvestiĝis, aperis senveste, gardante nur la pantalonon zontenitan. Lurĵo, pli dika, estis ankaŭ pli peza, ronda kiel bovo, kun mamoj kvazaŭ virinaj. Silvano, kun larĝa brusto kaj longaj nervaj brakoj malgrasaj, havis pli maldikajn koksojn. Plie, li estis pli svelta.

Ĉirkaŭ ili formiĝis cirklo. Por ĉiuj tiuj homoj, reĝis muskolforto. Kaj la vogleco de ambaŭ luktantoj, ilia impona aspekto, estigis admiron.

Ĵermena, sidanta sur sia seĝo, ankaŭ rigardis, sen pli emociiĝi. Tute ne estis la unua fojo, kiam ŝi vidis Silvanon interbatali, ĉu en amika batalo aŭ ne.

Eksilentiĝis.

La arbitracianto rigardis sian brakhorloĝon.

« Ek ! » li ordonis.

Lurĵo ne moviĝis. Firme starante sur siaj fortaj kruroj, masiva, kun la manoj malfermitaj por tuj ekkapti, li atendis. Li sciis, ke se li sukcesos ĉirkaŭpremi Silvanon sub la ripoj, li gajnos. Neniu eltenis la teruran premsufokantan fortegon de liaj herkulaj brakoj.

Sed la taktiko de lia kontraŭulo senaplombigis lin. Silvano estis kliniĝinta ; li malfermis la brakojn ; kun la kapo mallevita, li impetis al Lurĵo. Instinkte, la doganisto sin klinis antaŭen, malmoligis la abdomenajn muskolojn por elteni la ekfrapon. Kaj li provis manpremi la kontraŭulon. Sed Silvano, kun dorso rondigata, kaj kapo sub la maldekstra brako de la aliulo, prezentis al li neniun manteneblon. Li etendis la brakon, ĉirkaŭtalie kaptis Lurĵon, lin levis el la planko, nerezisteble. Lurĵo volis streĉiĝi. Estis tro malfrue. Silvano lasis sin ekfali sur lin. Kaj sub sia kontraŭulo, Lurĵo surdorsen falis, peze pro siaj naŭdek sep kilogramoj.

Ekis elkriego.

- Nu, jen farita, jam restarante diris Silvano, kiu brue spiregis.

- Sen ia kontestado, konstatis la arbitracianto ; estis sentrompa batalo.

Malfacile, Lurĵo siavice restariĝis. Li sentis sin tute ŝanceliĝanta, post tiu peza falo. Li ŝatintus rekomenci sed sentis sin kvazaŭ disartikigita, sen ajna forto. Li bezonus ripozi tri aŭ kvar tagojn, antaŭ ol retrovi sian ekvilibron.

Ambaŭ luktintoj revestiĝis. Cezaro ĝojegis, proponis nekredeblajn vetojn al la policianoj, kiuj estis iom elrevigitaj, ke la batalo tiel rapide finiĝis.

« Pardoneme, » diris Silvano etendante sian manon al Lurĵo, antaŭ ol foriri. Ili manpremis.

« Pardoneme, » diris Lurĵo.

Sed lia rigardo evitis tiun de lia venkinto.

Cezaro kaj Silvano eliris, repreninte siajn biciklojn el la koridoro, malantaŭ la trinkejo. Kaj piedirante, tenante siajn biciklojn per la stirilo, ili foriris kune kun Ĵermena. Superekscitita, Cezaro senĉese plukomentis. Zorgema, Silvano daŭre silentis. Rekonkerita, Ĵermena ameme sin premis kontraŭ sia viro, esplorante la timindan mallumon de la stratoj ĉirkaŭ si.

## SEPA ĈAPITRO

Iun mardon por la dua fojo Silvano devis helpi Cezaron por « transpasigi » Tom al Belgio. Pro tio Silvano sentis sin ĝoja. Iun mardon li unuafoje eltrovis tiun pentrindan malnovan kabareton, kies memoro profunde restadis stampita en lia menso. Kaj, superstiĉe, li esperis, ke la juna knabino de tiu tago denove estos sola en la domo. Eble la geonkloj refoje estos foririntaj al Furnes.

Post kiam Tom estis enŝlosita en la hundejo de la tabakvendisto, Silvano reiris sur la vojon, kiu ĝisiras al la Dunkirko-kanalo. Li grandpaŝe marŝis. Baldaŭ, kun ĝoja emocio, li retrovis la strangetan kaj verdegan kadron de la malnova gastejo.

Tiam li komprenis, kial la alloga pejzaĝo neniam trafis lian rigardon, malgraŭ ke multfoje li laŭiris tiun vojon. Kutime, nur irdirekte al Belgio li pasis sur la granda ŝoseo.

Sed pro sia hazarda promenado de la pasinta tago, li marŝis sur tiu vojo kontraŭdirekten. La gastejon oni povas malkovri irante nur tiun direkton. Alidirekten, ĝi ne estas videbla : nur ekvideblas konfuza bukedo da arboj. Oni bezonas atenton por konjekti, ke en tiu arbobukedo troviĝas spuro de eks-landvojo kaj vestiĝoj de malnova ponto.

« Sen tiu hazardo, mi povintus ja neniam eniri tien », pripensis la juna viro.

Ĉar tiu ideo lin tristigis, li forpelis ĝin.

Silvano plumarŝis du aŭ tricent metrojn en la direkto al Dunkirko. La novan ponton li eltrovis, ĝin transpasis, dekstren turnis kaj laŭiris padon al la malantaŭa flanko de la kabaredo. Tie estis sambukoheĝo, kiu limigis tiun ermitejon. En ĝia mezo estis aranĝita aĵura pordo. Silvano alproksimiĝis kaj vidis, ke ĝi estas fermita nur per klinko. Li levis ĝin, puŝis la pordon kaj aŭdace eniris en la ĝardenon.

« Nu finfine mi retrovos la fasadon », li opiniis.

Li sekvis centran aleon borderitan per pirarboj piramide tonditaj. Laŭlonge de la transversaj aleoj viciĝis ribarbetoj kun bela foliaro helverda. La tuta ĝardeno estis partigita en bedoj iom malbone prizorgitaj. En la mezo, kliniĝinta al la grundo, maljunulo elprenis trudherbojn.

« Hoj ! » alvokis Silvano.

Sed la maljunulo ne rigardis returne.

Silvano daŭrigis sian iradon. Li atingis konfuzan amason da konstruaĵoj kunmetitaj iom hazarde, unuj kontraŭ la aliaj. Li rekonis, ke tio devas esti la malantaŭa parto de la gastejo. Sed ĉio estis droninta en konfuzaĵo de superkreska vegetalaro, interplektaĵo de senfruktaj frambuoj, iom post iom ree sovaĝintaj, kaj kiuj nerezisteble grimpe sturmis la malnovan domon. Pli fore, viditaj super la alta tegmento el ruĝaj tegoloj, soriris la arboj de la eks-landvojo, gigantaj, etigantaj sub la vigla disvolviĝo de siaj foliaroj la gastejon, kiun ili ŝajne ŝirmis.

Tiujn fortikajn kaj masivajn arbojn, Silvano tutcerte tuj rekonis pli frue ol ĉio ajn. Plu antaŭen li iris, ĉirkaŭpaŝante la konstruaĵojn. Finfine li troviĝis sur tiu speco de subombra placeto, kiu formis terason antaŭ la gastejo. Li sidiĝis sur la sama loko kiel la unuan fojon. Kaj sen malpacienco li atendis, plenigante siajn okulojn de tiu abunda verdaĵo. Kun strangeta feliĉo en la animo li retrovis la memorojn, la diskretajn kaj ĉarmplenajn emociojn de sia unua vizito.

Sur la planko de la kabaredo eksonis paŝo.

Silvano ne returnis sin kaj atendis.

Li subite vidis antaŭ si maljunan virineton kun tutblanka hararo, ruĝa sed freŝa vizaĝo, nigraj kaj viglaj okuloj, kiuj rigardis lin.

- Kion vi deziras, Sinjoro ? ŝi demandis.

- Glason da biero, Sinjorino.

La oldulino malaperis. Iom elrevigita, Silvano konjektis, ke ŝi estas la onklino.

« Mi envenis tra la malantaŭa pordo, Sinjorino, li diris kiam ŝi alportis lian kruĉon da biero. Mi ne plu retrovis mian vojon. Kaj mi vidis oldulon, kiu ne aŭdis min. »

La maljuna virino ridetis.

- Temas pri mia edzo. Surda li estas. Kaj mi ne plu klare vidas. Do ni ambaŭ bone kunvivas, ĉu ne ?

- Li aspektas olda.

- Li aĝas jam pli ol okdek jarojn. Ankaŭ mi baldaŭ, post du jaroj.

- Tio ne ŝajnas multe ĝeni vin. Mi eĉ opinias, ke vi fariĝus ja pli bona komercistino ol via nevino.

- Ho jes ja ! ekridis la oldulino, kiu certe estis ege babilema kaj ekĝojis pro la eblo babili kun iu. Ŝi tute ne aspektas kiel kabaredestrino... Sed kial do vi diras tion ?

- Ĉar mi konas ŝin.

- Ĉu vi estas kliento ?... Strange, mi ne rekonas vin.

- Ne mirinde ! Ĉi tien mi venis hazarde la pasintan tagon, unuafoje en mia vivo. Mi mem devis servi al mi glason. Kaj krome, via nevino forgesis pagigi min.

Silvano ridetis. La olda virino ekridegis. Ŝi enigis la kapon en la gastejon kaj alvokis :

« Paskalina ! Via kliento ! »

- Ni multe amuziĝis pro tiu anekdoto, Sinjoro, ŝi diris revenante apud Silvanon. Ŝi daŭre diradis, ke vi revenos. Por kolerigi ŝin, ĉiuj kontraŭdiris ŝin.

Vigla paŝo resonis. Paskalina estis alkuranta. Ŝi rekonis Silvanon kaj ĝoje ekkriis :

« Ha ! Mi ja sciis, ke vi revenos ! »

Malantaŭ ŝi alkuris ankaŭ Ĵim, mordema, graŭlanta, eta sed furioza. Ĝi aspektis plena de senbrida kolero. Ĝi kvietiĝus, se ĝi povus fine mordi iun. Ĝi blinde impetegis al Silvano.

« Nu, Ĵim, riproĉvoĉe diris Silvano, ĉu ni ne plu estas amikoj nun ? »

Ĵim abrupte haltis. Malrapide, Silvano elprenis sukerpecon el sia poŝo, proponis ĝin al la eta besto. Pri tio Ĵim memoris, akceptis la sukeron, ĝin krakmaĉis kaj, amike svingante sian vosteton, venis grati per siaj antaŭaj piedetoj la genuojn de Silvano.

- Vidu ! ekkriis Paskalina.

- Nekredeble, diris la onklino. Sed...

Ŝi pripensis.

- Mi demandas min, kiel vi tuj sciis, ke mi estas la onklino de Paskalina. Vi diris al mi, ke vi neniam venis...

- Ne malfacile. La fraŭlino diris al mi, ke ŝi havas maljunan onklinon, kiu tre ŝatas paroli.

- Ho ! ekkriis Paskalina, iom konfuza.

Kaj ĉiuj pluridis, bonkore.

Stranga hejmo ĝi estis. Nenie ajn Silvano sin sentis kun tiel etpeza koro. Ŝajnis al li, ke tiu loko ne estas mondoparto, ke ĝi estas insuleto de freŝeco kaj poezio, izolata de la tercetero, kie oni devas nature pensi nur pri feliĉaj kaj sanaj aferoj. La juna viro tie sentis sin pli gaja, pli malpeza ; li iom havis la impreson ne plu esti la ĉiutaga Silvano, sed Silvano tia, kia dum etulaĝo li pensis fariĝi, antaŭ ol la vivo per grandaj batpuŝoj instruis al li sian severan leĝon.

- Ĉu vi ofte venas en la ĉirkaŭaĵon ? reparolis la onklino.

- Tre ofte. Eksciu, ke mi komercas. Kaj tio ripozigas min, kiam mi iom promenadas tra la kamparo. Sed neniam mi trafis iun lokon tiom kuriozan kiom tiu ĉi.

- Dimanĉe venas pliaj homoj.

- Por mi tio ne estas avantaĝo. Mi preferas ĝin tia.

- Mia onklino senĉese plendas, ĉar ĉi tie estas tro kviete, interparolis Paskalina. Vi ja vidas, onjo mia, mi pravas preferi

semajntagojn.

- Ha ! Sinjoro, diris la oldulino, se vi ŝatas kvieton, vi estos la amiko de Paskalina. Ŝi asertas, ke ĉiuj klientoj estas tedaj...

- Almenaŭ, ŝi ne flatas la homojn.

- Ha ! Pardonon, sed mi bezonas aldoni, ke vi ankoraŭ ne estas unu el miaj klientoj.

- Des pli bone !

- Estas vere. Ili nur venas ĉi tien por elpaki sian materialon por fiŝkapti, siajn logaĵojn, kaj mi ne scias kion ajn. Pro siaj malbenitaj fiŝoj, ili forgesas ĉiujn.

- Mi havas ja bonan ŝancon ne esti fiŝkaptanto.

- Ho jes ! Jam delonge, mi lasintus vin kun viaj fiŝfadenoj kaj hoketoj. Vi, almenaŭ vi, scias pri kio paroli ; oni ne enuas kun vi. Ili timas movi siajn lipojn. Laŭdire, tio timigas la fiŝojn !

- Devas esti terure por vi, ĉu ?

- Jes ja, naive diris Paskalina.

Sed el la fundo de la ĝardeno iu alvokis :

« Henrieta ! Henrieta ! »

- Nu, diris la onklino. Li ankoraŭfoje perdiĝis.

Ŝi rapidegis al la ĝardeno per neatendita vigleco.

- Kiu refoje perdiĝis ? mire demandis Silvano.

- Mia onklo. Li estas ja tre maljuna. De tempo al tempo, li perdiĝas. Liaj okuloj estas eluzitaj kaj li ne plu bone aŭdas.

Silvano karesis Ĵim, kiu buliĝis sur liaj genuoj. Li dolĉe prenis ĝin korpomeze, sidigis ĝin sur la seĝo antaŭ li, kaj levis ĝiajn antaŭajn piedojn. Ĵim sin lasis subfali. Silvano pacience rekomencis, juste alternante sukerpecetojn kaj frapetetojn. Post kvin minutoj, Ĵim ŝajnis neprecize kompreni, kion oni volas encerbigi al ĝi, kaj, kun nediskutebla bonvolo, ĝi klopodis sin teni pli-malpli bone sur sia postaĵo.

- Sufiças por hodiaŭ, diris tiam Silvano. De tia laboro, oni ne devas lin mallogi.

- Neniam mi havus tiom da pacienco, ekkriis Paskalina.

- Li lernos ja multajn aliajn trukojn, se vi bonvolas.

La onklino revenis. Je ŝia brako sin apogis granda oldulo, apud kiu ŝi aspektis tute malgranda. Tio ne malhelpis la onklinon admoni lin vigle, kolereme svingante sian manon por plifortigi la energion de siaj paroloj. La olda viro, sen emociiĝi, pluiris kun mieno de iu, kiu kutimas al tiaj aferoj. Kvankam kurbdorsa, li estis ankoraŭ tiel granda kiel Silvano. Esceptan viglecon li certe iam havis ; tion asertis liaj ŝultrolarĝo kaj brakodikeco. Lia dika kapo aspektis pezigita pro densa blanka hararo kaj distaŭzita barbo, kiu krispiĝis sur liaj vangoj. Silvano, kiu nur duone ekvidis lin en la ĝardeno, lin admiris. Li havis grandan rektan nazon, larĝan karnodikan buŝon daŭre ruĝegan malgraŭ lia aĝo, kaj helbluajn okulojn kun senluma rigardo. Li faris impreson de saĝo, de biblia graveco. Nur kiam li alvenis tuj apud Silvano, li ŝajnis ekvidi lin.

« Saluton ! Saluton ! », li diris.

Kaj li pasis, lasante sin kuntreniĝi de sia edzino, kiu plugestadis, kaj diris, ke li estas pli senpripensa ol infano, ke oni ne plu povas lasi lin sola sen ke li farus stultaĵojn, ke ĉiutage ŝi senĉese devas prigardi lin, ke ŝi freneziĝas...

« Jes, edzino mia. Jes, edzino mia, » nur ripetis la oldulo, kun la sereneco de olda filozofa.

Kaj ili malaperis en la gastejon.

- Li estas belega, ĉu ne ? demandis Paskalina

- Jes ja, sincere diris Silvano, belega !

- Vi vidos, kiam vi bone konos lin. Preskaŭ neniam li parolas, sed ĉio, kion li diras, estas aŭdinda.

- Ĉu via onklino koleras ?

- Tute ne. Sed ŝi ne havas multe da pacienco, do ŝi kelkfoje



taŭzas lin iomete. Ŝi enuas ; tio estas ŝia sola distraĵo.

Ŝi ridis dirante tion. Kaj Silvano forgesis la sencon de ŝiaj paroloj, ne plu aŭskultis ŝin, pensis nur rigardi ŝin ridantan.

- Feliĉe, li fajfas pri tio, ŝi pludiris ; li daŭre sekvas siajn ideojn.

- Ŝi ne volas, ke li iru en la ĝardenon, ĉu ?

- Ne. Ŝi timas, ke li falos. Sed li ŝatas ĝardenumi. Li estas trista, ĉar li ne plu povas labori ; li iras tien por levpreni ŝtonetojn, elradikigi herbaĉojn. Lin konsolas tio. Fakte, ili tamen amas unu la alian. Kiam ŝi estas malsana, li ne plu volas manĝi.

- Ĉu ili estas viaj solaj parencoj ?

- Jes.

- Tamen ili estas maljunaj.

- Jes. Li estas la frato de mia avo.

Ŝi silentis. Per natura reago, ŝia intereso revenis al la juna viro : ŝi rigardis lin same kiel dum lia unua vizito, kun sincera scivolo, kiu ne aspektis malrespekta, ĉar ŝi lasis sin tralegebla kvazaŭ libro malfermata.

Silvano divenis sur tiu ŝanĝema vizaĝo ĉiujn pensojn, kiuj speguliĝis tie, kiuj pasis sur ĝiaj trajtoj kvietaj kvazaŭ ondoj sur trankvila akvo.

« Kaj kio pri vi ? » ŝi deziris demandi, sed ne aŭdacis uzi tiun krudetan dirmanieron.

Li antaŭrespondis ŝian demandon.

« Ĉar mi komprenas, ke tio interesas vin, mi nomiĝas Silvano, li diris. Mi loĝas en Dunkirko, kie mi eĉ ne konas la feliĉon havi onklinon, kun kiu mi pasigus la tempon kverelante. »

Paskalina refoje ridis.

-Vi estas amuza, kiam vi diras tion. Jes, mi demandis al mi, kiu vi estas. Kaj ĉu vi ofte tiel promenas ?

- Relative ofte, jes.

- Do vi revenos ĉi tien, ĉu ?

- Ĉu vi ŝatus, ke mi revenu ?

- Ho, jes ja ! diris Paskalina, sen ia ĝeno. Vi estas ŝerce amuza kiam vi volas. Krome, por Ĵim estus bone iomete labori.

Tion ŝi diris tiel simple, ke oni ankoraŭ sentis en ŝi plenan infanspontanecon. Dormetis en ŝi virineco ; estis neniŭ koketeco, neniŭ volo plaĉi, neniŭ malklara kaŝpenso en tiu deziro revidi Silvanon, naive vortigita. Silvano komprenis kaj tamen nenian vantemon li tiris el tio. Eble li esperintus pli. Sed eble li ankaŭ estintus elrevigita, se tio ne okazintus tiel.

Ĉar ŝia naturo estis tia, Paskalina harmoniigis en absoluta maniero kun io, kion Silvano kunportis en si : ia deziro aŭ aspiro ekde sia junaĝo - ia idealo samtempe komplika kaj preciza, kiun la vivo estis repelinta, kunpreminta, sed ne sukcesis estingi aŭ detrui en li. Pro tia abrupta renkontiĝo kun ĝi, Silvano sin sentis samtempe feliĉa kaj malkvieta. Li timetis vidi ĝin estingiĝi. Li sentis timon, ke ĉio estas nur malica ruzo pli lerta ol la aliaj, ruzo de koketulino lerte regita. Kion aliulo dezirintus, li timis, ke tio okazus.

Sed la juna fraŭlino estis for de tiuj pripensoj. Por ŝi mem, ĉio estis klara, tiel simpla en realo kiel en ŝiaj paroloj. Ŝi eĉ ne suspektis tion, kio kirliĝis en la animo de la juna viro, dum li silentis.

Silvano stariĝis.

« Ĉifoje, mi estus ja feliĉa, ke mi povus pagi, » li diris.

La domon li eniris kun tia plezuro, kiun oni sentas pro trovi agrablajn memorojn. Li rekonis la vastan salonon freŝan kaj malhelan, la kamenon laŭ antikva modo kaj la fotelojn el tapeto. La maljuna onklino alvenis por ricevi la moneron de Silvano. Dume la onklo, enprofundiĝinta en sia fotelo el tapeto, senmova kun la okuloj duonfermitaj, ne forlasis sian kvietan pozon, tiun senfinan internan revadon, kiu estigas al maljuneco imponan

majeston.

Silvano eliris el la gastejo, promesinte al la maljuna virino reveni laŭ ŝia invito. Ĝis la lastaj arboj de la antaŭa vojego, la onklino kaj nevino akompanis lin. Kiam li malproksimiĝis, li daŭre vidis Paskalinan, kiu tre alte levis en siaj brakoj la petolan Ĵim, por ke ĝi salutu sian edukanton per lastaj bojadoj.

## OKA ĈAPITRO

Por honestulo, kiu plentrankvile, nepensante pri malbono, promenas sur iu strato, tiu loko estas esence kvietaj kaj sekura. Ĝi povas prezenti agrablajn diversaĵojn, proponi amuzajn aŭ dramajn spektaklojn, sed oni ĝenerale ne iras tien por eltrovi malbanalecon aŭ romanecon. Ĝi estas ĉies propraĵo, kie ĉiu sentas sin hejme, kie ĉiu okupiĝas sen ia alarmo.

Sed por Silvano, la strato estis bataalkampo.

Tion li ankoraŭ diris al si tiumatene, forbiciklante, sub densa kaj malvarma pluvo, por liveri sian tabakon. Li sin « tegis », kiel diris la fraŭdantoj. Tra la aperturo de sia ĉemizo, li estis enŝovinta kaj bonorde vertikale metinta du vicojn de ok tabakpaketoj. Kvar kilogramojn li tiele kunportis sur sia haŭto. Por kovri la tuton, li butonis larĝan veŝton kaj surmetis sian puloveron el malfajna lano. Kun sia jako forte premita sur la tuto, ŝajnis, ke li transportas nenion. Oni konjektus ne pli ol ventrodikeceton.

Sian tabakon li liveru en Mardiko<sup>12</sup>. Tiucele li nepre devis trabicikli Dunkirkon. Antaŭ ol eniri la urbon, li unue debicikliĝis por urinsimuli ĉe palisaro, kaj, de tie, observis la akcizejon, atendente taŭgan okazon.

Ĝi ne malfruis. Longa vico da aŭtomobiloj estis ĵus transpasintaj; la oficisto reiris en sian dometon por iom ŝirmi sin kontraŭ la pluvo. Tuj Silvano surseliĝis, impete pedalis, kaj rapidegis kiel sago preter la dometon.

Jen la unua obstaklo venkita !

Poste, kun la manoj supre de la stirilo, Silvano senhaste rajdis longan momenton, rigardante dekstren kaj maldekstren, aspektante gapvagi. Tamen, nenio eskapis al liaj okuloj; li bone vidis du virojn vestitajn per eluzitaj pluvmanteloj, kun la kruroj en

---

<sup>12</sup> Mardyck : vilaĝo tuj apud Dunkirko.

gamaŝoj<sup>13</sup>. Ambaŭ atendis ion, sin apogante sur la framo de la biciklo, kiun ĉiu tenis malantaŭ si.

Pro singardemo, Silvano elektis ĉirkaŭvojon, laŭirante alian straton. Dum li rajdis en la urbocentro, apud la stacidomo, estus facile fuĝi. Li povus senpene enŝovi sin en la stratlabirinton kaj devojigi siajn postkurantojn. Tiele li evitis du pliajn lokojn kun «negroj». Jam de la stratkomenco, li kapablis rekoni ilin. Familian similecon li trovis en ili, pro iliaj pluvmanteloj, gamaŝoj kaj kaskedoj aŭ molaj ĉapeloj. Ĉiuj sammaniere starigis sian biciklon malantaŭ si, apogis sin duonsidante sur la framstango, kaj atendis, ĉiam ĉe la angulo de du stratoj. Ili levis la nazon, ŝajnis serĉi numeron de iu domo. Tiam Silvano ĉirkaŭvojiris kaj evitis la baraĵon per elekto de alia strato.

Tiel li bicikladis sur pluraj ĉirkaŭvojoj, laŭ la strato Marŝalo Foch, la strato Jean-Bart kaj la placo Johanino d'Arko. Finfine li revenis sur la Parizo-strato, kiun li devis sekvi de komenco ĝis fino por trairi la urbon. Ĉe la enirejo de la ĉefvojo, li refoje haltis sur la ponto, kaj, antaŭ ol bicikli plu, li longe ekzamenis la situacion. Tiam, tre malproksime, sur la vojkruciĝo ĉe la Lillo-strato, li rekonis Lurĵon, kiu atendis kun alia «negro».

Silvano ne povis erari. Por diveni tiajn ulojn, li havis neeraripovan antaŭflaron. Je la unua rigardo, jam lin okulfrapis la masiva silueto de Lurĵo; li estis certa pri tio.

Lurĵo staris tie jam ekde tagiĝo. De pluraj tagoj, li venis posteniĝi en tiu loko, ĉar oni atentigis lin pri suspektinda kontraŭleĝa komerco per bicikloj aŭ aŭtomobiloj en la ĉirkaŭaĵoj de granda kabaredo, kiun li obstine prigardis kiel farus buldogo.

Seninterrompe de matene ĝis vespere, li ĉeestis tiun spionadejon. Li tagmanĝis per sandviĉo, kiun lia kamarado iris aĉeti por li. Stoike, li lasis sin trasorbigi de la pluvo. Malseka, frostiĝinta, ĝismorte tedigita, li tamen arde persistis. Li koleris ĉar verŝajne nur fabelojn li aŭskultis; li tute ne konsentis, ke oni povus

---

<sup>13</sup> Gamaŝo : senplanda piedvesto, uzata por ŝirmi la supron de la ŝuo kaj la malsupran parton de la kruro.

trompi lin tiagrade. Je la malespero de sia kamarado, li jam maltrafis bonajn okazojn - estintus interese sekvi suspektindajn ulojn por ekscii kien ili iras, kion ili enhavas en sia pakaĵo. Daŭre li obstinis : tiun lokon li forlasos nur kiam lia certeco iĝos definitiva.

Nun, je tricent metroj de tie, ankaŭ Silvano gvatias lin. Kelkajn minutojn li atendis. Kaj ne ekvidante ian movon, li sciis, ke Lurĵo esplorigardas.

Al Silvano eblis elekti alian irvojon. Sed dekstren, li devus tre longe ĉirkaŭbicikli por eviti alian suspektindan grupon, kiu baris la vojon al Fort-Ludviko. Kaj flanke de la stacidomo, maldekstren, ne estus eĉ aŭdacinde. Tie kiel formikoj svarmis doganistoj : tuj li estus arestita ĉar li tute ne povus fuĝi, meze de la tro densa trafiko. Li devos do nepre pasi antaŭ Lurĵo.

En tiuj malfacilaj situacioj, Silvano havis sian propran taktikon, kiu jam multfoje sukcesis. Ĝin li decidiĝis refoje elprovi. Li stariĝis trotuarrande, kaj sidante sur sia selo, kun unu piedo sur la pedalo, tutpreta por impeti, li atendis.

Ĉirkaŭ li pasis homoj : laboristoj, burĝoj, sinjorinoj kaj popolvirinoj. Ĉiuj kviete iris al siaj aferoj aŭ plezuroj, plentrankvile kaj plensekure. Neniu supozis, ke la viro, kiun oni preterpasas tie, kaj kiu ŝajnas tiel kvieta kiel iu ajn, fakte estas viro gvatata, persekutata, atendata, kaj ke lia simula indiferenteco fakte kaŝas internan preskaŭ dolorigan streĉon. Antaŭ li, vice pasis aŭtomobiloj, luksaj veturiloj kaj motorpenantaj kamionoj. Nenio el tio taŭgis al Silvano. Tiuj veturiloj iris aŭ tro rapide aŭ tro malrapide. Li plu atendis. Al li taŭgis tiaj kamionetoj, kiajn ofte stiras biervendistoj, « Ford » aŭ « Chevrolet », malpezaj kaj rapidaj veturiloj, kiuj ruliĝas proksimume po kvardek kilometroj hore. Malantaŭ tiaj aŭtoj, Silvano povos rapidege bicikli kaj trapasi la baraĵon.

Li finfine ekvidis, elvenanta el la strato Alberto la Unua, la veturilon, kiun li esperis : kamioneton « Latil », kies kesto estis

plenplena de karbo. Ĝi preterpasante preskaŭ tuŝis lin. Malantaŭ ĝi, li impetis, pedalante plenforte. Li reatingis ĝin kaj nur kontentiĝis daŭrigi sian rapidon, helpata kaj kuntirata per la aspirado de la aermoviĝo. Tiel li fulmrapide biciklis antaŭ la nazon de Lurĵo. Li aŭdis fajfilosignalon sed ne rigardis returne; plej rapide li rajdis malantaŭ la ŝargâuto.

- Ĉu vi vidis, Désiré ? demandis la « negro » apud Lurĵo.

- Ek ni iru, diris Lurĵo : tuj surbiciklen, rapidu !

Ambaŭ viroj surbicikliĝis kaj impetis post la kamiono.

Sed la veturilo rapidegis. Oni bezonis rajdi po kvindek kilometroj hore por reatingi ĝin. La kolego de Lurĵo, malpli fortika, restis malantaŭe, komence je unu metro, poste je du. Li finfine estis postlasita. Ankaŭ Lurĵo estis forlasonta tiun predon, kiu povus fine prezenti neniun intereson, kiam Silvano, pensante ne esti postkurata, turnis la kapon por rigardi malantaŭ si. Necerta, Lurĵo kredis, ke li ĵus rekonis la viron, kun kiu li interbatalis. Tio multe vigligis lin. Li volis certiĝi. Tiam li furioze klopodegis, li kurbiĝis sur sia maŝino, plenpremis la pedalojn per sia tuta pezo.

Fortikulo estis tiu Lurĵo. Iom post iom malgrandiĝis la interspaco, kiu apartigis lin de la kamioneto. Je dudek metroj, li duonrelevis sin, unumane tenis sian stirilon, kaj, per fingroj en la buŝo refoje fajfis. Antaŭ li, la viro pli kliniĝis sur sian bicikloframon, ne plu rigardis returne. Kaj Lurĵo malakcelis, iom malprogresis. Sed li furioziĝis. Li estis konvinkata, ke Silvanon li postkuras. Antaŭ momento, tiom proksime, li ja rekonis lin. Kaj kial do la viro ne haltis, ne turnis sin posten ? Kulpulo li sendube estis.

Dŭm ankoraŭ du minutoj, buliĝante, kun la premitaj makzeloj, la manoj streĉitaj sur la stirilo, Lurĵo puŝegis sur la pedalojn kvazaŭ li volus ilin dispremi. Li ne progresis, nur sukcesis konservi la interspacon.

Tro neegala estis la lukto. Silvano, kuntrenata, aspirata de la aerkirlo de tiu kamioneto, devis nur pedali regule, senpene,

senlace. Li eĉ delasis la mantenilojn de la stirilo, kies supraĵon li tenis unumane, kaj rektiĝis por ripozigi sian dorson. Malgraŭ sia energio, Lurĵo perdis kuraĝon. Li tro strebis. Lia klopodo estis tia, kian oni ne longe povas daŭrigi. Li sentis, ke purpuriĝas lia vizaĝo. Ŝvito laŭfluis lian dorson. Por venki la ventoreziston li bezonis ege peni. Tiam li malakcelis kaj vidis Silvanon malaperi post la ŝarĝaŭto, sur la vojo al Kalezo.

Lurĵo returneniris. Li debicikliĝis, kaj por ripozi, piedirante revenis al sia kamarado. Sed li certiĝos, li nepre eksciu per ia ajn maniero, kiu estas kaj kion faras la edzo de Ĵermena.

- Vi ne kaptis lin, ĉu ? demandis lia kamarado.

- Ne. Sed tio baldaŭ ja okazos... Ĉu nenio nova, ĉi tie ?... Nu, bone.

Sub la pluvo, Lurĵo ĝibigis sian larĝan dorson. Apogata sur sia biciklo, persisteme, obstine, li senlace daŭrigis sian senfinan gardostaradon fronte al la suspektinda trinkejo.



## NAŬA ĈAPITRO

Dum la sekvanta periodo, Ĵermena pli ofte vizitis la domon de S-ino Johanino. Sen precize konfesi tion al si, ŝi svage esperis revidi Lurĵon. Ŝin interesis tiu viro. Sub la banala konversacio, kiu okazis inter ili, ŝi ja sentis ion pli gravan, ian silentan simpatifluon, kiun povas tamen diveni virino kutiminta al tiaj amaventuroj. Ŝi sciis, ke tiele komenciĝas koraferoj.

Ĵermena ja ŝatis Silvanon. Li donis al ŝi multe da mono kaj lasis ŝin tute libera. Ŝi havus grandajn skrupulojn kokri lin. Eĉ ne celante tion, tamen oni ja rajtis ekprovi nekonsekvencan amafereton. La honesta virino, kia ŝi fariĝis, komencis tediĝi pro tiel longa bona konduto. La aventurojn de sia ĉiesulina freneza vivo, ŝi iam bonvole rezignis. Pri ĉio ŝi estis tiam laca, do ĝoje akceptis la seriozajn proponojn de Silvano. Sed nuntempe, kiam la bonaj flankoj de ŝia kvieta edzin vivo ne plu ŝajnis tiel klaraj, ĉar malgravigitaj pro vivaranĝoj, ŝi kelkfoje sopiris al la ĉarmoj de sia antaŭa vivo. Ŝi eĉ forgesis ties malfacilaĵojn kaj mizeron, nur memorante ties plaĉajn aspektojn. Ŝajnis al si malfacile rezigni ĉiujn aventurojn, ĉiun ekscitan allogon de koraferoj, dum ŝi estis apenaŭ tridek-jaraĝa. Ŝi ne intencis adulti je Silvano : ŝi esperis ankoraŭfoje regi amuzan amafereton ; ŝi ja scios malebligi, ke ĝi fariĝu seriozaĵo.

Finfine, iun posttagmezon, ĵus kiam ŝi eniris en la domon de S-ino Johanino, ŝi renkontiĝis kun Lurĵo, kiu jam alvenis tien antaŭ duonhoron.

De sia renkonto kun Ĵermena, ankaŭ Lurĵo konservis daŭran memoraĵon. Ŝi vere impresis lin. Li opiniis, ke ŝi estas linda virino. Kaj li dezirus brili antaŭ ŝi per sia plej favora flanko. Bedaŭrinde liaj debutoj fuŝis pro tiu stulta provoko, kiun li malprudente direktis al la edzo. Pro sia malvenko, la doganisto daŭre sentis fortan rankoron kontraŭ tiu Silvano.

Pliaj incidentoj tiun vesperon, la suspektinda kamaradeco de

Silvano kun Cezaro, kaj precipe tiu hazarda renkonto, kelkajn tagojn poste, ĉio vekis la nefidon de la doganisto. Li ja certis, ke li rekonis Silvanon sur la biciklo. Kaj la sinteno de la viro, kiu fuĝis plenrapide anstataŭ akcepti inspekton, ŝajnis al li vere dubinda. Li ekopiniis, ke Silvano povas ja havi la saman profesion kiel tiu delonge bonkonata Cezaro. Tial li ekplanis gvatsekvi tiun suspektan ulon por akiri certecon pri tiu demando, kiu ekpasiigis lin. Pri tio, li unue enmetis sian profesion memestimon. Pro sia pasinta malvenko, li ankaŭ deziris, ke lia venkinto pagu. Fine, li opiniis, ke tia sukceso povus nur servi liajn interesojn rilate al la bela Ĵermena.

Pripensinte, Lurĵo opiniis, ke la plej bona rimedo por akiri informojn pri Silvano, estas interparoli kun S-ro Henriko, kiu ŝajnas amike rilati kun siaj klientoj. Pro multaj kialoj, li ne malakceptus tiun etan servon al sia amiko Lurĵo.

Tial Lurĵo vizitis la domon de S-ino Johanino tiun tagon.

Ekvidante Ĵermenan en la kafejo, li malfacile kaŝis sian internan feliĉon. Tamen, li restis senemocia, alproksimiĝis al la verŝotablo kaj salutis ŝin per afekta ĝentileco. Dank' al sia sperta rigardo el virinŝatanto, li komprenis, ke Ĵermena estas samtempe emociata kaj kontenta, ke ŝi revidas lin.

- Ĉu vi fartas bone ? li demandis.

- Jes, diris S-ro Henriko.

- Ĉu kvieta la komerco ?

- Kiel ĉiam dumtage. Sed oni ne plendas, ĉar tio ripozigas la cerbon.

Kaj S-ro Henriko karesis sian frunton, kvazaŭ li estus zorgpremata homo.

- Kio pri vi ? li aldiris. Ĉu ĉio glatas hodiaŭ ?

- Iele iome. Ĉar mi ferias hodiaŭ, mi pripensis, ĉu mi pasigos unu horon ĉe tiu brava Johanino. Tute taŭgas, ĉar oni estas kvieta kiel en familia rondo, ĉu ne ?

- Jes. Jen bona ideo.

- Nu, ni trinku vinon ĉiuj kune. Mi volas ne enui.

- Johanino ! laŭtpetis S-ro Henriko. Iru por serĉi botelon de Heidsick. Nu, veran ĉampanon, ĉu ? !.. Ni eniru la salonon, tiel ni estos kvietaj se alvenos klientoj.

Dum tiu konversacio, Ĵermena silentis. Ŝi ne sciis, kian sintenon havi. Lurĵo parolante rigardis ŝin, ŝajnis alparoli ŝin, sed ŝi ne eltrovis favoran okazon por respondi. Ŝi sentis sin ĝenata, kiam S-ro Henriko proponis eniri la salonon. Ŝi ne sciis, ĉu ankaŭ ŝi estas invitata. Sed Lurĵo divenis ŝin kaj aŭdacis demandi :

- Kompreneble, la Sinjorino venas kun ni, ĉu ?

- Sed...

- Ne afektu, Ĵermena, diris S-ro Henriko. Oni ne povas malakcepti glason da bona ĉampano !

Li rapidegis al la kuirejo, kaj ankaŭ invitis sian edzinon, kiu ĵus kunportis la ĉampanon el la kelo. Ĉar plaĉis al li, ke Johanino profitu de tiaj surprizaj oportunoj.

En la ĉambreto meblita per ruĝaj foteloj, unupieda tableto kun marmora supraĵo, kaj piano pri kiu fieris Johanino, oni babiladis. Ĝoje oni bagateladis ĉirkaŭ la botelo. Lurĵo volis brili, klopodis ŝajni sprita kaj delikata. Kiel kutime, S-ro Henriko estis solena ; S-rino Johanino, bulforma kaj senafekta. Rilate al Ĵermena, estis neutile, ke Lurĵo strebu por aspekti spritega antaŭ ŝi : lin ŝi ne aŭskultis. Ŝi kontentiĝis mute rigardi lin. La virojn ŝi taksis per siaj okuloj. Mole sidante sur la kanapo, kun la dorso komforte apogata kaj la kapo laca, ŝi sentis sin bone.

De tiu makulita lukso kaj tiuj falsaj splendaĵoj de malsupera domo, ties mizeron ŝi ne vidis. Tiujn aĵojn, ŝi admiris ; ŝi ekvidis nek la makulojn sur la silkaĵoj, nek la skrap-difektaĵojn sur la mebloj, nek la eluziĝon de la tapiŝoj. Estis por ŝi agrable sidi inter tiuj riĉaĵoj.

Dum Lurĵo parolis, ŝi rigardis lin. Freŝajn dikajn lipojn li havis.

Densaj lipharoj vigle baris lian vizaĝon. En la lumo, liaj tinkturitaj haroj aspektis pli naturaj. Kiam li ridis, li montris siajn belajn dentojn. S-ino Johanino diris, ke li estas virinŝatanto ; estas evidente : valora li estas, kaj ĉiuj virinoj certe freneziĝas por li. Oni ankaŭ diris, ke li estas malavara, ke multe da mono li perlaboras.

Lurĵo sentis tiun rigardon sur si. Li opiniis esti aŭskultata kaj tio vigligis lian memfidon. Li divenis la intereson, kiun li ricevis.

Ankaŭ S-ro Henriko ja antaŭflaris ion. Por ĉio koncerne sian komercon, li havis mirindan sagacon. Li ekkonsciis jam la unuan fojon, ke inter Ĵermena kaj Lurĵo estiĝas ia mistera simpatifluro, kiu komencas « korinklinojn ». Hodiaŭ, ŝajnis evidenta tiu sento. Dank'al tiu senduba antaŭvido, kiun li ŝuldis al sia kutimo pri tiaj amaferoj, li tuj antaŭflaris por si la tutan avantaĝon, kiu rezultos de eta amrilato inter Lurĵo kaj Ĵermena. Sciante tiun aferon, li povos regi ilin ambaŭ. Lurĵo devos esti afabla kun li. La doganisto ne plu rifuzus al li ajnan bonfaron, kiun li okaze bezonus. Konkordi kun la publikaj instancoj, tio estis la plej grava principo de S-ro Henriko.

Krom tio, kiom da pluaj etaj gajnoj ! Rendevuoj, renkontoj, leteroj : ĉio okazos ĉi tie, interŝanĝiĝos ĉi tie. Jen fonto de sufiĉe gravaj profitoj.

Tial, S-ro Henriko, kiu okaze sciis semi malavare por rikolti plimulte, petis duan botelon da vino. Kelkajn minutojn poste, li pardonpetis, pretekstante farendajn preparojn por manĝo, kiu okazos tiun vesperon. Kaj li foriris por helpi sian edzinon, kiu jam laboris en la kuirejo.

Pro tio ĝojis Lurĵo. Ĵermena sentis tiom da antaŭtimo, kiom da scivolemo pri kio estis okazonta.

- Estas strange, komencis Lurĵo. Mi ne plu renkontis vin ĉi tie ekde la alia tago.

- Tamen, mi ankoraŭ ofte venas, diris Ĵermena.

- Ĉu de longe vi konas S-inon Johanino ?
- Ho jes ! Ĉi tie mi loĝis antaŭ mia edziniĝo.
- Tio memorigas al vi tristajn tagojn, ĉu ? ŝercis Lurĵo.
- Tute ne. Mi ne povas plendi. Silvano estas bona edzo.
- Tamen, malofte oni ne sopiras pri tiaj aventuroj.
- Jes, reveme diris Ĵermena. Kompreneble, nun tio ne estas plu la libero.

- Nu, aŭdacis Lurĵo, bedaŭrinde, mi ne venis en la kafejon de Henriko en tiu tempo. Mi opinias, ke ambaŭ ni bone akordintus. Nu, mi ne scias kial, sed estas vizaĝoj, kiuj plaĉas al mi.

Ĵermena ridis.

- Mi certas, ke vi estis bona fraŭlino, ĉu ne ? reparolis Lurĵo.
- Jes ja ! Tion ĉiuj diris.
- Kaj vi certe ne ŝanĝiĝis...
- Ne tro. Kondiĉe, ke oni ne tedas min, neniuj estas pli bona ol mi.
- Tion mi jam rimarkis. Tia virinspeco plaĉas al mi. Mi malŝatas la prudajn aĉulinojn, al kiuj oni eĉ ne povas diri unu vorton...
- Ankaŭ mi. Oni povas esti edziniĝinta kaj samtempe honesta ; iom bagatele ŝerci ne signifas senhonorigi sin, laŭ mi. Sen ia malbona intenco, ĉu ?

- Kompreneble, aprobis Lurĵo, kiu tamen konsentis kun tiuj ĉi lastaj paroloj ne senrezerve. Nu, oni amuziĝas. Sed mil diabloj ! refoje mi bedaŭras, ke ni ne interkonatiĝis antaŭe. Ni ambaŭ multe ridintus ! Mi opinias, ke malofte ni kverelintus.

- Tia estas la vivo, diris Ĵermena, kiu ŝatis tiajn neprecizajn respondojn facile eltroveblajn pro sia malvigleco.

- Ne gravas. Ni plu revidos nin, estante geamikoj de la kafejestroj. Ĉiam kun plezuro mi invitos vin kuntrinki glason.

Li serĉis artifikon, diskretan rimedon por aranĝi rendezvuon kun

preciza dato.

- Ĉu vi ofte venas ĉi tien ? li finfine demandis.

- Ĉiusemajne.

- Ĉiam jaŭdon ?

- Jes, diris Ĵermena, kvankam ŝi ne havis regulan vizittagon.

Sed tiel, ŝi estis certa, ke venontan semajnon ŝi revidos Lurĵon. Fakte, ŝi ja komprenis la kialon de lia ŝajne indiferenta demando.

- Ĉu vi devas jam foriri ? ŝi demandis, vidante Lurĵon stariĝi.

- Jes. Ĉar mi deĵoras.

Ĉar nun ili senvorte interkonsentis, Lurĵo opiniis, ke li povos foriri.

Li duonmalfermis la pordon de la kuirejo, laŭte vokis :

« Ej ! Henriko, ĉu vi enpoŝigu la monon por la botelo ? »

Kaj li paŝis en la kafejon, kien S-ro Henriko reiris kun li.

- Kiom ?

- Kvardek.

Lurĵo pagis. Kaj li kliniĝis al la kafejestro por mallaŭte demandi :

- Nu, diru ! Ne rakontu sensencaĵojn. Kion li faraĉas, ŝia edzo ?

- Kies ?

Lurĵo kapsignis en la direkto al la salono.

S-ro Henriko admirinde ludis sian rolon.

« Mi ne scias, li diris. Ŝakradon... »

Li ne plu memoris, kion li iam diris al Lurĵo pri tio, kaj la malpreciza vorto

« ŝakrado » ne estas kompromit-veka.

Sed Lurĵo ne lasis sin « dormigi », kiel li kutime diris.

- Nuuu ! Ĉu vi opinias min ŝtipkapulo ? Mi gvatsekvis lin, la

pasintan tagon. Li ja fraŭdas.

- Ne estas maleble, sed tion mi neniam vidis.

- Nu, diru, vi ŝercas ! Ulo kiel vi ja konas la klientojn, kiujn li akceptas. Ne de hieraŭ venas tiu Silvano ĉi tien. Do ne rakontu al mi stultaĵojn. En via propra intereso, plej bone estus, ke vi akordiĝu kun mi.

- Mi scias.

- Parolu, do. Tion vi ne bedaŭros. Li ja fraŭdas, ĉu ?

- Laŭ mia opinio.

- Kun kiu li laboras ?

- Kun ĉiuj. Li precipe revendas.

- Ĉu li kelkfoje venas kun tabako ĉi tien ?

- Malofte. Sed vi ne povas aresti lin ĉi tie, Lurĵo. Mia komerco... la skandalo... mia bonfamo...

- Kiu diras, ke mi volas aresti lin ?

- Nu, vi estas ruza, sed mi ne estas stulta.

Kaj S-ro Henriko ekridis.

Ankaŭ Lurĵo malforte ridis.

- Bone. Ni ne plu parolu pri vi. Mi lasos vin trankvila, ĉar estas konsentite, ke ni laboru kune. Do... kie li aĉetas ?

- Hm..., diris Henriko, gratante al si la kapon, mi aŭdis, ke li multe aĉetas ĉe l' alta Fernando.

- Ĉu temas pri tiu Fernando, kiu loĝas ĉe la Kajo Leughenaer ?<sup>14</sup>

- Jes.

- He he... tiu fripono Fernando ! Nu, bonege ! Ĉio glatos. Ĝis venonta semajno, Henriko. Mi opinias, ke vi aŭdos pri mi.

- Ni silentu, ĉu ?

- Ni silentu.

---

<sup>14</sup> Leughenaer : prononcata [lɔg'nar] en Dunkirko (« mensogulo » en la flandra lingvo).

Kaj post tiu promeso Lurjo foriris.



## DEKA ĈAPITRO

Unu el la ĉefaj kialoj de la forto de Lurĵo estis lia aŭdaco por veni alfronti en ilia rifuĝejo la friponojn kaj la fraŭdulojn, kiujn la polico kaj la dogano plej timis. Sed tiujn suspektindajn kvartalojn, tiujn domojn kun famo de rabmurdejoj, Lurĵo vizitis sen malkvietiĝi.

Tian memfidon li konservis de sia junaĝo. Ĉar Lurĵo travivis tumultan pasintecon. Li mem kulpis pri kelkaj « fraŭdheroaĵoj », pro kiuj fieriĝus eĉ danĝera kontrabandisto. Li fariĝis saĝa ĉar li komprenis, ke pli valoras stari flanke de la plej fortaj. Kaj, finfine dungita en la lokŝanĝa doganbrigado, li iĝis fama en la rondo de fraŭduloj, per sia nekredeble riskema sinteno kaj per la ŝanco, kiun li havis por sukcesi en pluraj gravaj arestoj.

Nun tre utilis al li tiuj pasintaj rilatoj kun la friponaro. Li konis ties morojn kaj pensmanieron. Li konis ĉiujn artifikojn kaj ruzojn de tiu senfina gerilo, kiu kontraŭstarigas la doganistojn kaj la fraŭdulojn. Per siaj vizitoj al la mizerejoj kaj de la suspektindaj kabaredoj, plej bone ol ĉie ajn, li eksciis altvalorajn informojn.

Krom tio, li persone ŝatis tiun medion. Al li, ĝi rememoris lian junecon, la heroan tempon, kiam li situis aliflanke de la barikado. Kaj li ŝatis virinojn. Plaĉis al li eniri tien, kvazaŭ mastro, kaj imponi al ili per sia reputacio de sentima viro. Tiamaniere, li forĝis al si renomon de Donjuano, kiu altiris sur lin samtempe konsideron kaj insidajn malamojn.

Estis tre riskeme por li tiel provoki en ilia medio tiujn, kontraŭ kiuj li batalis. Sed, sciante pri la danĝero, li spitis ĝin kun la senzorgeco de kuraĝulo, kiu fidis siajn muskolojn kaj memregon.

Tiun tagon, ne bezonante pliajn klarigojn, li iris do al l'alta Fernando, kiun de longe li jam konis kiel gravan fraŭdestron.

Li sciis, kie situas la domo de tiu kanajlo : Kajo Leughenaer, tuj apud la haveno. L'alta Fernando maskis kontrabandon per eta

komerco de hakita ligno. Estis proksimume tagmezo kiam Lurĵo, sen frapi nek sonorigi ĉe la pordo, eniris tra mallarĝa portalo en nigran kaj tristan korteton, troplenigitan de ligno el malkonstruaĵo. Tie salutis lin gorgĥpremita kaj furioza bojado de griza hundego, kiu feliĉe estis alligita. Tiuj kriegoj venigis sur la sojlon de la kuirejo virinon en ŝia kvara jardeko, kun flava vizaĝkoloro.

Lurĵo aliris al ŝi, tre proksime ; demandante ŝin : « Ĉu ne ĉeestas Fernando ? », li samtempe kaj sentime enŝovis sian kapon en la kuirejon. Tio sendevigis la virinon respondi. Ĉar fakte ĉeestis Fernando, kiu finmanĝis sian teleron da supo.

« Ah ! », li diris kun ĝena mieno, ekvidante Lurĵon.

Kaj sen atendi inviton, Lurĵo eniris.

- Kiel vi ? li demandis kun ŝajna afableco.

- Bone, respondis la viro iom maltrankvile. Ĉu vi bezonas min ?

- Jes.

- Sidiĝu.

Lurĵo prenis seĝon. La edzino de Fernando komprenis la okulsignon de sia edzo, tial ŝi plenigis teleron per supo por la vizitanto. Lurĵo senafekte altabliĝis apud la fraŭdmajstro kaj ekmanĝis.

- Mi venis por demandi al vi etan helpon, li diris dum li malplenigis sian teleron.

- Kian ? demandis l'alta Fernando, iom trankviliĝinta pro la kvieta aspekto de sia vizitanto.

- Tion mi diros poste. Necesas esti kvietaj.

Dum momento, l'alta Fernando demande rigardis Lurĵon, per siaj grandaj kaŝtankoloraj okuloj ruĝe filigranecaj. Li povis legi nenion sur la senemocia vizaĝo de la doganisto. Turnante sin al la virino, li petis :

- Ĉu vi ne devos iri al la butiko, Melia ?

- Ne.

- Nu. Iru do por aĉeti litron da bier' !

Kaj Melia foriris. Fernando denove turnis sian longan malgrasan vizaĝon al Lurĵo.

« Nu, li diris, ni 'stas solaj nun. Pri kio temas ? »

Lurĵo, kiu ĵus finmanĝis sian supon, flanken ŝovis la teleron, formovis sian seĝon el la tablo, kaj turnante sin al Fernando, fronte rigardis lin kaj severe anoncis :

- Nu, knabego, mi ne volas perdi mian tempon. Mi scias pri via ŝakrado...

- Ĉu ŝakrad' ... ?

Fernando paliĝis. Sub liaj malgrasaj vangoj vidiĝis kontraĥiĝo de la makzelmuskoloj. Kaj la falto de liaj naztruoj premiĝis, blankiĝis. Li tamen regis sian emocion kaj demandis :

- Kia ŝakrad' ? Mi ne komprenas.

- Ne estu do ansero, krude respondis Lurĵo. Fraŭdul' vi estas, amiko ! Ne indas nei ! Nur sufiĉas al mi traserĉi vian domon, kaj vi estos kaptita.

- Ne 'stas vere, denove neis Fernando sen memfido.

Lurĵo levis la ŝultrojn.

- Mi opiniis vin pli inteligenta. Estas stulte tiel obstini. Vi devus tamen kompreni tion : se mi dezirus turmenti vin, mi ne amike avertus vin kiel mi faras nun. Ĉu utilas, ke vi agas kvazaŭ vi ne komprenas ? Estus tiel simple diri al mi : « Jes, kara Lurĵo, mi estas fraŭdulo ; ĉu mi povas helpi al vi ? ».

- Vi mokas min, ĉu ? demandis l'alta Fernando, ne komprenante kion celas la tuta konversacio.

- Ne, tute male : mi estas tre serioza. Mian tempon, ne pli ol vi, mi volas perdi. Ĉiuj tiuj petolaĵoj estis nur por diri al vi, ke mi scias pri via finegoco. Ĉu konsentite pri tio ?

- Nu, ni supozu, koncedis la fraŭdestro.

- Bone, daŭrigis Lurĵo, sen plue insisti. Nu, vi ne estas ruze lerta. Kiom da mono vi lukras per ĉiu kilogramo ?

- Kiom... ? demandis Fernando, konfuzita. Kiom mi... ? Vi...

- Ĉu ok ? Naŭ frankojn ? Ni diru dek. Nu, sur via loko mi ja lukrus multe pli ol vi !

- Kiel do, he ?

- Tio interesas vin, ĉu ne ? mokpikis Lurĵo. Per la makleraĵoj, diable ! Vendu vian tabakon, honeste, je bona prezo, kontante pagitan. Samtempe avertu min, kiam oni venas por aĉeti ĝin. Kaj ni dividus la makleraĵon.

- Mi ne 'stas tia perfidul' , Lurĵo, diris Fernando plu paliĝante.

Kaj li leviĝis, abrupte forpuŝis sian seĝon.

Lurĵo siaflanke daŭre sidis, konservante sian ironian kvieton. Li supren rigardis al Fernando :

– Vi stulte decidas, Fernando, vi stultas. Tamen eblus al vi pli facile perlabori vian panon. Sed pro via rifuzo, sciu, ke mi ne plu povos indulgi vin. Lojala mi ja estas ĉar mi avertas vin. De nun, eĉ tabakeron ne plu venigu ĉi tien. Malplenigu vian domon, purigu ĝin de subtegmento ĝis kelo, ne konservu eĉ unu cigaredon. Ĉar, de hodiaŭ, ne ĉesos la traserĉoj, vizitoj, enketoj kaj tiel plu. Kaj ne forgesu, tion mi diras al vi, Fernando la moralisto : se malfeliĉe vi havos en via butiko peceton da tabako tiel grandan kiel cigaredstumpo, nur unu cigaredon, tion mi scios. Kaj al vi tio multe kostos. Vi ja konas Lurĵon, ĉu ne ? Kiam li volas aresti iun, tion li faras. Ĉu vi komprenis ?

Estis peza silento.

- Kiom havos mi ? finfine demandis Fernando.

- La duonon de mia gajno, krom via parto de la kaptajĵo.

- Bone, diris la fraŭdestro ree sidante.

- Ĉu konsentite ?

- Ne 'stas elekt'.

- Kion vi nuntempe preparis ?

Fernando plu hezitis.

- Ne estu stultega !... ĉar ni ja interkonsentas.

Pene, Fernando decidiĝis paroli :

- Unu aŭto transpasos la limon morgaŭ, li diris.

- Kie ?

- En Hondshoote<sup>15</sup>, ĉe la Pont' de l' Cervo.

- Bone. Ni lasos ĝin pasi. Al kiu vi vendos la varon ?

- Al Parizanoj. Ili devos preni ĝin merkredon matene. 'Havas kamioneton.

Lurĵo ĉion skribis sur sia notlibreto.

- Pli bone, ke ili ne 'stu arestitaj tro proksime, diris Fernando. Tio povus noci al mi.

- Kompreneble. Oni sekvos ilin per aŭto. Nur pli fore oni arestos ilin, survoje. Kiel promesite, duono por mi kaj duono por vi. Ĉu estos ia danĝero ?

- Ne. Nur 'stos unu : tiu kiu stiros... L' aliaj timos kaj lasos sin kapti senprotest'.

- Bone ! Sed ne sufiĉos.

- Jes, sufiĉos, asertis Fernando.

- Por vi, sed ne por mi. Ĉu vi konas iun Silvanon ? Ne utilas nei, tion mi scias.

- Ĉu 'stas grave por vi ? Multe d' aliaj mi konas.

- Pri la aliaj mi fajfas. Interesas min tiu Silvano.

- Kial ?

- Ĉar lin mi volas kapti.

---

<sup>15</sup> Hondshoote (prononcu [ɔns'kɔt]) : franca urbeto tuj apud la landlimo kun Belgio, je proksimume 15 kilometroj de Bray-Dunes, 20 km de Dunkirko.

- Ĉu li suferigis vin ?
- La kialojn mi konas... Nu, li venas ĉi tien, ĉu ne ?
- Kelkfoje.
- Li vendas tabakon, ĉu ?
- Jes.
- Ĉu li ne iras al Belgio ?
- Malofte. Li aĉetas precipe en Francio, ĉi tie kaj aliloke.
- Bone. Se vi lasos min kapti lin, mi donos al vi la tutan parton de mia premio.
- Ne plaĉas al mi, sciu. Afabla knab' li 'stas, bon' amiko. Ĉu ne prefereble alia, iu ajn ?
- Silvanon mi volas preni. Ne utilas serĉi evitilon. Sentimenton mi ne konas. Ĉu piede li venas ĉi tien ?
- Aŭ bicikle.
- Li avertas vin, ĉu ?
- L' antaŭtagon li petas, ĉu mi havas tabakon.
- Do vi ĉiufoje antaŭscias. Nu, bone. Kiam li avertos vin, ke li venos, tuj informigu min. Estu trankvila, mi scias silenti.
- Pli bone 'stas, ke oni ne kaptos lin ĉe mia pord', ĉar certe l' aliaj min turmentos. Mian vivon mi devas perlabori, ĉu ne ?
- Kompreneble. Sed trankviliĝu, vi trovos nur profiton de tiu afero.

Lurĵo leviĝis.

- Ĉu vi ne atendos mian edzinon ? demandis l'alta Fernando, pli komforta nun. Vi ja trinkos glason da bier'...
- Dankon, sed post la supo, prefereble ne.

Lurĵo eliris enirante la korton. La fraŭdestro akompanis lin ĝis la strato. Sur la sojlo, ili manpremis.

- Vi ne forgesos, ĉu ? refoje demandis Lurĵo, kun rigardo kie

vidiĝis malkaŝa minaco.

- Vi povas 'sti trankvila.

Kaj post tiu promeso, Luĵo forlasis l'altan Fernandon, kiu sen bedaŭro vidis lin foriri.

## DEK-UNUA ĈAPITRO

« Lasu, sinjorino, proponis Silvano, tion mi mem tuj faros anstataŭ vi. »

Kiam li eniris la malnovan kabaredon, la olda onklino de Paskalina estis tondanta la harojn de sia edzo, delikate manipulante la tondilon ĉirkaŭ la orelojn de la maljunulo.

- Ĉu ankaŭ tion vi scipovas fari ?

- Vi ja scias, ke ĉion mi scipovas fari, ridante respondis Silvano.

Kaj li deprenis de ŝi la tondilon, kaj ektondis la malsuplan blankan barbon.

Li fariĝis nun intimulo en la domo. Neniam li venis en Belgion sen pasigi la tagon tie. Li nostalgie enamiĝis al tiu perdita loko. Li havis la impreson, kvazaŭ li jam vivis tie. Tie logike devintus okazi lia ekzistado, se la eventoj estus, kiel ili devus esti. Tie li estis hejme. De tiu verda landaro izolita en la erikejo, al li plaĉis ĉio : la arboj, la ĝardeno, la kanalo, la domo. Kiam li alvenis tien, ŝajnis al li kvazaŭ li reirus en la pasintajn jarojn. Li ne plu estis Silvano la fraŭdulo. Li eĉ ne plu pensis pri sia okupo, pri ĉio, kion li lasis malantaŭ si, tie for, kaj kion li retrovos vespere. Li sentis, kvazaŭ li refariĝus la Silvano de siaj dek kvin jaroj, la kuraĝa kaj ankoraŭ honesta Silvano, kiu naive esperis trovi la feliĉon en vivo de paca laboro. Ĉi tie, la aferoj ŝajnis pli simplaj, kvazaŭ senigitaj de tiu komplikeco, kiun li ĉie renkontis pro sia danĝera okupo. Estis unu el la maloftaj lokoj, kie li sentis sin sekura, kie li ne timis subite senti sur sia ŝultro la brutalan pojnforton de la polico. Oni parolis nek pri tabako, nek pri dogano en la malnova gastejo. Tiuj aferoj ne plu ekzistis. Estas nur iu Silvano gaja kaj ĉiam kontenta, kiu retrovas kun nedirebla feliĉo la vivspecon, por kiu, nesciante tion, li ekzistas.

- Vi tondas kiel vera barbisto ! ekkriis la maljuna virino.

- Atendu, ĝis mi finos, diris Silvano; vi ne plu rekonos lin.



Lerte, li fortendis la longajn barb- kaj harfasketojn. La blankaj rigidaj haroj falis en la tualettukon, kiun Henrieta nodintis kiel barbiro-mantelon ĉirkaŭ la kolon de sia edzo. Tiu ĉi antaŭe demetis sian kaskedon, kiun li lasis kune kun siaj okulvitroj sur seĝo apud li. Kun la okuloj fermitaj, li restis senmova ; kun lia neĝblanka ĉirkaŭmentona barbo, lia granda nuda frunto kaj la fiera kurbo de lia nazo, oni kredintus vidi kapon de Kristo, maljuniĝintan kaj dolorplenan. Inter polekso kaj montrofingro, Silvano kaptis tufon da haroj. La tondilo klakrefermiĝis. Kaj nova breĉo aperis en la blanka amaso, kiu kovris la maldikan kaj ĉifitan haŭton de la kranio. Silvano levis la mentonon de la oldulo, zorge metante unu manon malantaŭ lian nukon por subteni la lacan kapon. Kaj li tondis la longajn malmolajn harojn de la gorgo, delikate, singarde, por ne enpreni inter la klingojn de la tondilo la molan kaj falditan haŭton.

Kiam la tasko estis farita, la onklino singarde malnodis la grandan tualettukon, ĝin duoble faldis por elskui la harojn ekster la domo. La maljunulo reprenis siajn kaskedon kaj okulvitrojn kun kontentega mieno. Kaj tre lacigita pro tiuj prizorgoj, li iris sidiĝi en sian fotelon ; kaj de tempo al tempo, kun kontento li heziteme karesis siajn vangojn kaj mentonon.

- Li rejuniĝis je dek jaroj ! ekkriis Henrieta revenante en la domon.

- Ĉu ne ? diris Silvano. Pri kio mi okupiĝos nun ?

- Pri la ĝardeno, se vi bonvolas, proponis la onklino.

Kaj Silvano preninte ŝpaton foriris al la ĝardeno.

Plurajn metiojn li faris nun en la malnova domo. Tio komenciĝis per etaj servoj, helpoj kompleze proponitaj por iom senŝarĝigi la malfortajn brakojn de la du maljunuloj aŭ la delikatajn manojn de Paskalina. Pumpi akvon, haki lignon, ŝpati teron, por tio pli bone taŭgis Silvano ol la gastigantoj. Kaj tiel okazis, ke oni iompostioe alkutimiĝis vidi lin labori, fari malfacilajn taskojn kvazaŭ li estus la domestro. Ĉu estis fuŝita seruro, rompita vitro aŭ

falintaj tegoloj, oni atendis la alvenon de Silvano por la riparo. La onklino Henrieta iom post iom kutimiĝis diri : « Tion faros Silvano », kiam ŝi trafis taskon super siaj fortoj. Kaj ŝia fido al Silvano, neniam trompita, kreskis post ĉiu sperto. Silvano scipovis ĉion fari : ripari la pumpilojn, reveldi la defluilojn, cementi ŝtonan plankon, malmunti horloĝon. Li fariĝis la viro de la domo, li iom post iom anstataŭis la eluzitajn fortojn de la maljuna Samuelo.

Dum tiu sezono, oni vidis lin ĉie, en la mil kaŝanguloj de la malnova domo ; li purigis la ĝardenon, segis kaj ordigis la lignon. Dank'al li, la onklino Henrieta povis plani kaj fari taskojn, kiuj antaŭe teruris ŝin. Estis Silvano, kiu refaris la tutan ŝtonan plankon de la gastejo, kiu firmigis la ĉarpentaĵon de la tegmento, kiu rekunigis ties tegolojn. Krom tio, sagace eltrovema, kutimiĝinta elturniĝi per hazardaj rimedoj, li akiris al si la sinjorinan simpation, des pli grandan, ke ŝi ne ŝatis elspezi monon. Tial ŝi vere laŭdis lin.

Sed kio plej plaĉis al li - kaj tion li daŭre diris al si laŭirante la aleojn, kun sia laborilo surŝultre - tio ja estis labori en la ĝardeno. Tie li sentis sin trankvila. Tiu kvieta kaj ŝatata okupo akaparis liajn pensojn, ne tirane kiel zorgo aŭ ĉagreno, sed sen perforto, nur instigante al li ripozigan revadon, dum li enterigis la semojn kaj sarkis la aleojn.

Tiun tagon, li priklis poreojn. Li nombris ilin dum li samtempe enterigis la blankajn radikojn. Kaj li ne enuis. Tiam li pensis pri nenio krom sia laboro. Sed tiu vegeta vivo, tiu enpenŝiĝo kvietigis lin, liberigis lin de la senfina ĉiutaga streĉo. Kiam li finis sian poreobedon, li kuŝis sin sur la herbon, piede de unu el siaj amikoj la altaj arboj, kaj ne plu moviĝis. Li lasis siajn pensojn kuri post la grandaj nuboj el vato, kiuj distranĉis el la vigla bluo de la ĉielo la blankon de siaj neĝpintoj. Ĉirkaŭ li, la amaso da arbofoliaro pulsas pro tremetanta vivo. Kiam oni fermis la okulojn, la daŭra kanto en la frondaro similis la flustradon de ondoj. La vento enkorpiĝis kaj tremetis trairante la foliaron. Oni vidis ĝin pasi de unu arbo al alia, ŝanceli ilian senmovecon, enmeti kvazaŭ vekmurmuron. La

branĉoj milde kurbiĝis. La folioj flustris, sin tuŝetis kun dolĉa kaj forta ĉifbruo. Oni vidis ilian amason ondobrili kun plej helaj nuancoj, pro la strebo de la venteto, kiu levis ilin dum lumludis la suno. Longa regula balancado kiel kvieta hulo lulis la tutajn arbotufojn. Oni vidis ilin unu post la alia dolĉe kliniĝi kaj restariĝi, kvazaŭ ili transdonus al sia najbaro la ŝarĝon, kiu klinis ilin. Kaj tio ankaŭ memorigis la maron, la barkojn, kiuj laŭvice salutas la venteton per sia peza riverenco. Tiu senfina lulmovo dormigis Silvanon, forprenis lin tre malproksimen, malplenigis lin de ĉiuj liaj pensoj kaj lasis lin perfekte feliĉa en tia torporo de cerbo. Li perdis sian orientiĝokonscion, li ne povus diri, je kia rapida aŭ lanta kadenco fuĝas la tempo. Li forgesis la ĝardenon, la gastejon kaj la mondon...

Paŝoj revokis lin al la realeco. Li stariĝis, kun peza menso kaj kapturino pro la tuta sango, kiu amasiĝis tie. Tiaj momentoj estis doloraj. Sed li rekonis Paskalinan kaj estis kontenta. Ŝi kunportis libron por ripozi en la ombro.

- Ĉu vi jam finis ? ŝi demandis.

- Jes ; mi estas pigra hodiaŭ.

- Mi ĉiam estas, ride diris Paskalina. Tion jam diris al vi mia onklino, ĉu ne ? Sed estas tiel agrable !

- Jes, diris Silvano. Mi ŝatus pasigi mian tutan vivon tiel...

- Ankaŭ mi. Tio estas, tamen ne mian tutan vivon. Nur de tempo al tempo.

- La tutan vivon, miaflanke, asertis Silvano. Ĉu vi ne opinias, ke alimaniere la tempo pasas tro rapide ?

- Ne, konfesis Paskalina.

- Jes ja. Vi vidos. Oni ne vidas sin vivi. Kaj kiam mi pensas pri tio, mi senkuraĝiĝas. Oni tiel forte klopodas fari al si belan vivon, ke oni fuŝas ĝin sen ekkonscii pri tio. Por vere profiti el ĝi, necesus ĉiam esti, kiel mi ĵus estis antaŭe, pensante pri nenio, senti sin nur vivi. Tiel, oni ne perdus sian tempon.

- Vi estas stranga...

- Jes. Antaŭ ol mi venis en tiun ĉi domon, mi neniam pensis pri tio. Kaj nun, mi opinias, ke mi vere vivas nur ĉi tie. Aliloke, mi atendas...

- Kion ?

- Esti ĉi tie. Ŝajnas, ke mi ekzistas nur por vivi en tiu ĉi loko. Apenaŭ mi alvenis, mi tuj sentas min kvazaŭ en mia domo. Mi ne plu petas ion. Nenio plu mankas al mi. Tion mi sentis la unuan fojon, kiam mi venis al via domo...

- Eble vi ŝatintus esti ĝardenisto ?

- Ja eble.

Silvano reprenis sian ŝpaton, kun bona rideto rigardis Paskalinan. Kaj li foriris por ekŝpati novan bedon per malrapidaj gestoj.

Paskalina rigarde sekvis lin. Tiu konversacio eklaborigis ŝian menson. Ŝi alproksimiĝis Silvanon kaj denove pridemandis lin, esplorante lin per sia sincera kaj naiva rigardo, antaŭ kiu Silvano sentis sin sen forto, nekapabla je trompkaŝo.

- Kaj kial vi ne faras tion ?

- Kion ?

- Nu, la metion de ĝardenisto ?

- Ha, vi ankoraŭ pensis pri tio. Ĉar... Ĉar... fakte, ĝi ne tiom plaĉas al mi.

- Kial do vi ne estas kontenta ?

- Ĉar nur ĉi tie mi ŝatus esti ĝardenisto, kiel vi diras. Estas strange, sed aliloke tio tute ne plaĉus al mi.

Kaj Silvano ridis, iom konfuza pro tiele devi vortigi aferojn, kiujn li mem ne tre klare komprenis. Li bedaŭris nun tioman konfidencon. Li dezirus repreni siajn parolojn. Sed kun sia junulina simplanimeco, ŝi senkompate daŭris sian inkvizicion.

- Ĉu estas nia domo, kiu plaĉas al vi ? ŝi demandis.
- Estas ĉio, diris Silvano.
- Ne estas tiel bele ĉe vi ?
- Nenie.

Li denove malprenis sian ŝpaton.

- Mia vizito ĉi tie ja ŝanĝis min, fraŭlino Paskalina. Vi ne povas kompreni tion, ĉu ne ?

- Ne, ŝi respondis.

- ... Sed mi trovis ion, kio mankis al mi, kio ne ekzistis en realo, tion mi pensis. Ofte pri tio mi revis. Sed mi opiniis neeble ĝin eltrovi.

- Kaj pri kio vi revis ? demandis Paskalina.

- Pri ĉio, kio estas ĉi tie : pri tia ĝardeno ; altaj arboj ; maljunuloj, kiuj ne estus malbonaj ; pri junulino kiel vi, kun kiu mi povus paroli kiel ni parolas nun...

- Ĉu tio estas ja tiel malofte ?

- La homoj, kiujn mi renkontis ne estas kiel vi. Bedaŭrinde. Sed estas jam malfrue, ĉu ne ?

- Jes, diris Paskalina, sen kompreni.

- En la vivo, oni tiele preterpasas multajn aferojn...

Estis longa silento. Silvano plenigis siajn okulojn per la densa kaj ĉarma dekoracio, kun la domo kaŝita malantaŭ la frambujoj, la perspektivo de la gigantaj arboj, kiuj disvolvis sian faskon tre alte, kaj la pura fono de la blua ĉielo.

- Vi ne estas gaja hodiaŭ, murmuris Paskalina. Kutime vi estas tiom gajiga !

- Vi ne povas scii... Kelkfoje, sciu, mi diras al mi, ke mi ne plu devus reveni.

- Sed vi ĉagrenus ĉiujn el ni.

- Aŭ ĉu nur poste mi revenu, kiam mi povos ?... Sed tiam estos tro malfrue... Necesus ĉion rekomenci, ĉu ne ?

- Oni povas ĉiam rekomenci, flustris Paskalina kvazaŭ por si mem.

Silvano levis la okulojn sur ŝin, rigardis ŝin kun malkvieta atento. Ŝi fariĝis serioza. Tio ŝanĝis ŝian infanan mienon, pli aŭdacigis ŝian bluan rigardon ; flankeniĝis la knabineto. Malantaŭe travidiĝis la virino, maturigita, transfigurita pro la soleneco de la momento. Ŝiaj rufaj haroj flugis ĉirkaŭ ŝia vizaĝo, sed ŝi eĉ ne pensis religi ilin. Fronte al la vento, kiu blovis sur ŝian frunton, ŝi ŝajnis silente pridemandi la malproksiman horizonton de la dunoj, unuafoje serĉi en ĝi la klarigon de sia destino.

« Ĉu tion vi kredas ? demandis Silvano per obtuza iom tremanta voĉo... Ĉu tion vi ja kredas ? »

Kaj nekonsciente pri tio, ŝi kunigis siajn manojn kvazaŭ por preĝo.

« Oni ĉiam povas », rediris Paskalina.

Emocio ŝveligis la koron de Silvano, dolĉa ekzaltiĝo alvenigis larmojn ĉe la randon de liaj palpebroj.

« Do mi provos », li mallaŭte diris.

Kaj tio estis ĉio. Neniam estis io ajn plu inter Paskalina kaj li.

## DEK-DUA ĈAPITRO

Silvano promesis al l'alta Fernando, ke li iros al lia domo por aĉeti dek kilogramojn da tabako la venontan semajnon. Klientojn li devis provizi apud Loon<sup>16</sup>. Li pripensis, ke li biciklos tien, iel alivestita, kiel li kutimis. Sed la antaŭan vesperon, revenante al Ĵermana, li falis de sia biciklo kaj dolore kontuzis sian genuon. Neeblos do, ke li foriros al Loon la morgaŭan matenon.

Tial li sendis Ĵermanan tuj apuden por venigi Cezaron. Ili interkonsentis : kontraŭ partigo de la gajno, Cezaro bonvole akceptis la proponon, ke li anstataŭos Silvanon. Tiu ĉi lasta zorge indikis al li la klientojn, kiujn li vizitu, kaj la kvantojn da tabako, kiujn li liveru al ili. Kaj la sekvan matenon, Cezaro komencis sian mision.

Li foriris piede. Li ne plu estis tiel forta kiel antaŭe, kaj bicikli postulas pli da spir-kapablo ol li ankoraŭ havis. Alkoholglasetoj, virinoj kaj fumado jam « tranĉis al li la krurojn », kiel li diris. Tial li planis piediri al l'alta Fernando. De tie, li prenos la tramveturilon tiom longtempe kiom li povos en la direkto al Loon. Estis pli danĝere, tion li sciis. La leĝo tiele fundas subtilajn distingojn inter pieda fraŭdo kaj fraŭdo per veturilo : ĉarumo kaj biciklo apartenas al la unua grupo, dum vagono, tramo kaj aŭto estas klasifikitaj en la dua.

Sed Cezaro ja esperis, ke li ne estos kaptita. Li kunprenis grandan korbon, kien li enmetos la tabakon. Ĝin li lasos sur la platformo, en angulo de la tramveturilo. Kaj se okazos, ke iu ajn doganisto lin pridemandos, li ludos la senkulpulon, li ja tutforte neos, ke la korbo estas lia posedaĵo. Jam unu fojon li sukcesis per tia ruzo.

Je la naŭa, kun sia malplena korbo sub la brako, Cezaro alvenis antaŭ la domon de la fraŭdestro. Antaŭ ol eniri la korton, pro singardemo li longe ekzamenis la straton, sed ne vidis ion

<sup>16</sup> Loon : (= nun Loon-Plage) urbeto ĉe la marbordo, inter Dunkirko kaj Kalezo.

nenormalan.

La viro estis hakanta lignon en sia korto.

« Saluton, hej ! », diris Cezaro.

L'alta Fernando rigardis returne.

- Nu, jen Cezar' ! Ĉu novaĵoj ?

- La novaĵoj 'stas bonaj. Vi havas mian tabakon, ĉu ?

- Kian tabakon ?

- La tabakon por Silvano.

- Ĉu li ne venos mem ?

- Ne. Hieraŭ li vundis sin ; li falis de sia biciklo.

- Ha ! diris Fernando. Kia malfeliĉ' !

- Jes ja. Sed ni elturniĝis. 'Stas mi, kiu portos por li.

L'alta Fernando aspektis ĉagrenata. Li skrapis sian nazon, ŝajnis pripensi pri io.

- Ŝajnas, ke tio turmentetas vin, ĉu ?

- Mi ! ? Ne... Ne 'stas tio. Mi pensis pri io.

- Pri kio ? demandis Cezaro, kiu ne kapablis esti diskreta

- Neni'... Nu, vi volas vian tabakon, ĉu ?

- Jes ja, mi ĝin volas ! Intence mi venis tiucele !

- Eniru.

L'alta Fernando antaŭiris Cezaron en la kuirejon, eniris sian subtegmenton por preni kvardek paketojn de duonfunto da tabako, kaj enmetis ilin funden de la korbo de Cezaro. Per tavolo de hakitaj lignopecetoj li kovris ilin.

- Jen ĝi, diris Cezaro.

- Dek kilogramoj po dudek kvin frankoj. Tio 'stas ducent kvindek frankoj.

- Ĝuste tio.



Cezaro pagis kaj surŝultren metis la korbon. Li premis al l'alta Fernando la manon, kaj post lia elkora « bonan ŝancon ! », li eliris en la korton. Sur la trotuaro, la edzino de Fernando antaŭiris lin kaj atendis, ĝis alvenu tramveturilo. Kiam ŝi vidis unu alvenontan, ŝi alvokis Cezaron, kiu atendis en la korto. Kaj Cezaro eliris, saltis sur la antaŭan platformon kaj foriris.

Tiam la virino reiris al sia domo.

- Malbela afer', ŝi diris.

- Jes, grumbletis Fernando. M' min demandas, kion diros Lurĵ'.

- Ne 'stas via kulp', aparte dirite.

- Ne, sed tion li ne komprenos kiel vi. Silvanon li volas, Cezaron ne bezonas.

- Nu, restos al li rekomenci. Ĉu ne ?

- Kaj tio 'stas via opini' ? Post l'arest' de Cezar', Silvan' malfidos !

- Sed Lurĵ' ne arestos Cezaron, ĉu ?

- Ne Lurĵ', sed la negroj. Ne 'stas Lurĵ', kiu gvatas. Du kolegojn li deĵorigis. 'Stas mi, kiu konsilis tion. Ĉar Silvan' ne 'stas facila ul'. Se li havas venĝemon kontraŭ Lurĵ', li ne lasus sin preni. 'Stus granda fuŝ'.

- Do, 'stas nun por Cezar' lia fin', ĉu ?

- Lia fin'. Kaj m' imagas la vizaĝon de Lurĵ', kiam oni alportos al li birdon, kiun li ne atendas. Ni 'stas nun en malbona situaci' pro la tut' afer' !

- Eble Cezar' ne lasos sin preni, ĉu ?

- Li ja ne povos ne 'sti prenita. La du negroj atendis lin en la drinkej' tuj apud. Ili saltis en la saman tramon kiel li. Mi vidis ilin.

- Kaj li mem ne vidis ilin, ĉu ?

- Ne. Ili eniris ĉe la malantaŭa part', ĉe l'altra flank'. Nu, ne 'stas nia kulp', tion ni diros.

Dume, per la tramo, Cezaro rapidveturis al Loon. Konforme al sia taktiko, li estis metinta sian korbon en angulon de la ekstera platformo. Tuj apud la ŝtupareto, li kviete fumis sian cigaredon, rigardante la domojn, kiuj defile kuris antaŭ li. Tiam malfermiĝis la pordo al la interna kupeo. Du viroj eliris. Rigardinte returne, Cezaro instinkte antaŭflaris, ke ili estas negroj.

Estis kvin aŭ ses homoj sur la platformo. La negroj rigardis la korbon, okulserĉis Cezaron inter tiuj personoj. Ili rekte alparolis al li :

- Kies korbo estas tio ?
- Mi ne scias, diris Cezaro.
- Ne indas simuli stultulon, krirespondis unu el la doganistoj. Ni vidis, ke vi enveturiĝis kun ĝi...

Li kliniĝis, priserĉis en la korbo. Senhezite, Cezaro profitis tiun momenton por agi. Li puŝpelis maljunan viron, kiu baris lian antaŭan irejon. Li eksaltis sur la ŝtupareton, kliniĝis eksteren, kaj saltis sur la pavimitan vojon. Ĝus tiam li ricevis fortegan baton malantaŭ la kapon. Kaj li falegis. Ŝajnis al li, ke li sinkas en grandan kvanton da akvo, kiu plenigas liajn orelojn, subakvigas lin, dronigas lin per ŝaŭma inundo. Li malklare aŭdis el ĝi kvazaŭ intestobruon. Tiu laŭta zumado kovris ĉiujn bruojn ĉirkaŭ li.

Poste, ŝajnis al li, ke li lante elakviĝas. La ŝaŭmbroo fariĝis pli mallaŭta. Voĉflustradoj aŭdebliĝis, plilaŭtiĝis. Kaj kiam Cezaro retrovis sian konscion, li vidis, ke li sidas sur trotuaro, kun ŝtalmankatenoj ĉirkaŭ la pojnoj. Li suprenrigardis, revidis la du negrojn kaj tuj rememoris ĉion.

« Ha, ha ! Vi ja pensis, ke vi sukcesos pafrapide eskapi, fanfaronis unu el la doganistoj. Sed ĉifoje vi havas aferon ne kun la ŝtipkapuloj de l'alia tag', sciu ! Nu, stariĝu Silvan' ! »

Cezaro komprenis, ke la negroj kredis aresti lian kamaradon. Li tamen ne donis klarigojn. Krome, lia kapo doloris. Li kontentiĝis obeeme sekvi ambaŭ homojn ĝis la ĝendarmejo. Laŭirante, li

kunpremiĝis kontraŭ unu el la doganistoj, ĉar li malŝatis trairi la urbon tiele mankatenita kun la interĉeno.

En la ĝendarmejo, Lurĵo estis atendanta. Kun granda konfuzo, li vidis aperi Cezaron anstataŭ Silvano. Li ne povis ne ekkrii :

- Sed ne 'stas li !

- Ĉu ne li ? diris unu el la negroj. Jes ja ! Ni senĉese gvatis kaj sekvis lin.

- Mil diabloj ! sakris Lurĵo. Kia fuŝ' !

Cezaro ekkomprenis.

- Se ne 'stas mi, do lasu min iri, li pikdiris.

- Fermu vian buŝegon, kreten' ! Krome, vin oni jam tenas ! 'Stas bona via afer' !

- Li pagos por l'aliul' , aldonis unu el la negroj.

La ĝendarmoj estis komisiitaj por enŝlosi Cezaron en la ĝendarmejon. Kaj tie, li havis multan tempon por pripensi. La perforto dum lia aresto, la paroloj de la doganisto, kiu nomis lin Silvano kaj elvokis la pasintan interbatalon, la ekkrio de Lurĵo... ĉio elmontras, ke Silvanon oni atendis. Krom tio, estas ja Silvano, kiu estintus arestita, se ne okazintus tiu malhelpo. Oni ja sciis, ke li planis viziti Fernandon. Tiam Cezaro rememoris la elrevigitan mienon de la fraŭdestro, kiam li vidis lin alveni.

« Tiu fiulo, li pripensis. Li denunciis min. »

De tiam, unu solan penson li havis : atentigi Silvanon kaj la amikojn, ke Fernando perfidas, ke li estas nur fiviro.

Je proksimume la unua, oni malfermis la pordon. Du ĝendarmoj elirigis lin.

- Kien ni ?

- Al l' malliberej'.

Ili eliris, Cezaro inter la du ĝendarmoj.

Vojirante ili parolis. Cezaro rakontis, kiel li estis kaptita, kaj tio

multe amuzis la ĝendarmojn. Ĉar neniu doganisto priserĉis lin, li ankoraŭ portis sur si, inter ĉemizo kaj veŝto, tridekon da cigaredpaketoj. Po du paketoj li donis al ĉiu el siaj gardantoj. Kaj li petis ilin preni etan ĉirkaŭvojon proksime al la policejo, kie deĵoras lia kamarado Julio.

Tie, ili eniris etan trinkejon kaj vokigis Julion. Li alvenis.

- Vidu, li senmire diris ! Mi ja daŭre diris al vi, ke oni rekaptos vin.

- Nu, mi ne vokis vin por moraladmon', respondis Cezaro. Ĉu vi transdonu mesaĝon al mia edzin' ?

- Jes.

- Diru al ŝi, ke oni prenis min, ke ŝi forlasu tian laboron. Ŝi reiru por rikolti cikorion. Tio pli indos ol rekuniĝi kun mi en prizanon.

- Vi 'stas edziĝinta, ĉu ? demandis unu ĝendarmo.

- Jes.

- Petu alporton al ŝi de la cetero de viaj cigaredoj. Tio eblos al ŝi kelktempe havi iom da mon'.

- Dankon ! diris Cezaro.

Kaj al Julio li transdonis siajn paketojn da cigaredoj.

- Ne 'stas ĉio, li aldonis. Vizitu Silvanon. Diru al li, ke li ja nepre danku al l'alta Fernand' pro tio, kion li faris por mi. Ĉu vi bonkomprenis ?

- Jes.

- Ha ! Ankaŭ diru, ke mi donas Tom al li. Tro kostos al mia edzin' por nutri ĝin nun. Oni nepre ne mortigu Tom, ĉar ĝi estas bona hundo.

- Vi ne scias, kiom longe vi restos en prizon', ĉu ?

- Ne, amiko. Sed tro da stultaĵoj mi jam faris. Ili ne lasos min foriri baldaŭ, ĉifoje.

- Nu, vidu, se vi estus min aŭskultinta...

- Nu, bone, sufiĉas...

Li ankaŭ eltiris sian biletujon, enserĉis, hezitis.

« Nu, des pli malbone. Vi ankaŭ donos al ŝi tridek frankojn. Tie for, mi ne bezonos monon. Mi faros florkronojn, ĉu ne ? »

Ambaŭ ĝendarmoj ekridis.

- Nu, demandis unu el ili. Ĉu ĉio ?

- Jes, ĉio.

- Ĝis baldaŭ, Cezaro, diris Julio.

- Ĝis, amiko !

Julio pagis la trinkaĵojn. Cezaro stariĝis, kaj daŭre inter siaj du gardantoj, li foriris. El la pordosoĵlo, Julio lin rigardis iri. Nun, kiam Cezaro opiniis, ke neniu rigardas lin, li mallevis la kapon kaj, dorskurba, malfortigita, kun trista mieno, li aspektis malgranda inter siaj gardantoj.

« Ha ! Kia... », serĉis Julio, ne trovante taŭgan vorton, kiu akordigu liajn amikecon kaj malaprobon.

Kaj, kun peza koro, kun trista graveco, li iris por plenumi la volojn de Cezaro, kvazaŭ temus pri tiuj de mortinto.

## DEK-TRIA ĈAPITRO

Kiam Silvano eksciis pri la aresto de Cezaro, lia unua penso estis fortega deziro pri venĝo. Tute ne kontraŭ Lurĵo. Same kiel Silvano, li praktikis sian profesion por perlabori sian vivon. Sed tio, kion Silvano tute ne pardonis, estis la rolo de l'alta Fernando, la fraŭdestro. Fakte, Silvano tuj komprenis kaj klarigis al Julio, kion signifas la paroloj de Cezaro : « Dankon al Fernando pro tio, kion li faris al mi. » Sen ia eksterordinara hazardo, pro la perfido de tiu ulaĉo, Silvano estintus kaptita de la doganistoj. Kaj li ne sciis, ĉu li ĝoju aŭ tristiĝu pro sia forsavo, ĉar li anstataŭe sendis sian plej bonan kamaradon - la solan, kun kiu li ĉiam plenfide laboris ; la solan, kiu sentis por li veran amikecon. Kaj la justica dosiero de Silvano daŭre estis virga. Male, Cezaro havis ja pezan pasintecon kaj sennombrajn ĉiuspecajn kondamnojn. Kun iom da malbonŝanco, tiuj ĉi povis okazigi lian enkarcerigon. Por li, de longe ne plu eblis prokrasto de la puno.

Kvar tutajn tagojn, li gvatadis apud la domo de Fernando. Fortega kolero lin vigligis. Se li renkontus la fraŭdestron, la afero tutcerte fariĝus perforta. Cezaro estis ĉio por Silvano. La admonoj de la policisto Julio tute ne efikis kontraŭ tiun koncentritan furiozon.

Feliĉe, Silvano ne renkontis Fernandon. La ulo sin kaŝis. Sendube, Julio timis la sekvojn, kiujn tiu disputo povus okazigi, kaj sentante, ke lia rolo en la afero povus altiri la severecon de lia ĉefo kontraŭ li, sekrete avertis la fraŭdestron. Tion suspektis Silvano poste. Sed li ne havis venĝemon kontraŭ Julio, kiu laŭeble plej bone agis por ĉiuj.

Ĉiel, post kvar vanaj atendotagoj, Silvano devis provizore forlasi la esperon batali kontraŭ la fraŭdestro. Malkiel lia pacienco, liaj monrimedoj elĉerpiĝis. Li nepre devis labori.

Ĵermena jam ekplendis, ke ŝia monujo iĝas malplena.

Tiam Silvano faris decidon. La fraŭdadon li ne plu eltenis. De longe estis al li peza tiu senfina danĝera vivo. Ne estis deca ekzistado, tiele vivi, persekutita kiel bandito, inter la aliuloj tiel kvietaj, tiel trankvilaj sub la leĝoŝirmo. Fatale, oni iam arestos lin. Ĉu ne pli indus tuj ĉesi, kiam ankoraŭ ne estas tro malfrue ?

Krom tio, lin zorgigis la promeso, kiun li faris al Paskalina. « Mi provos », li diris. Bona estis tiu ĉi okazo : nun aŭ neniam. Kaj sen konfesi tion al si, li sentis en si la esperon, la deziron por elaĉeto. Kiel ? Tion li ne sciis. Li ne volis vortigi la nesolveblajn problemojn, kiujn starigis tiu espero. Estis lia pasinteco ; estis Ĵermena, kiu ligis lin al lia antaŭa vivo. Sed li ne volis pensi pri tio. « Oni povas ĉiam rekomenci », diris Paskalina. Kaj li ne deziris vidi trans tio. Li deziris fari lojalan kaj plenan klopodon, kiun nenia dubo malvigligus.

Li serĉis laboron, petis dungadon ĉe dokistoj\* por firmao de ŝipmalŝarĝado. Lia forto ebligis al li elekti tian profesion, timindan por malpli fortika viro. Jam pli da malfacilaĵoj li travivis, kiam li rapidiris tra kampoj kun grandega pakaĵo da tabako surdorse.

Laŭ la kutimo, dum la unuaj tagoj, liaj laborkamaradoj elprovis lin. Ili lasis por li la plej aĉan taskon kaj laboradis laŭ rapidega ritmo. Ili provis lin ebriigi, celante vidi lin krure malfortiĝi kaj febliĝi dumlabore. Laboraĉon, pezegajn ŝarĝojn, elprovojn pri sia rapideco, glasetojn da alkoholo : ĉion Silvano suferis kun la indiferenteco de nelacigebla vikleco. Ekde tiam, li estis akceptita en la timindan dokist-konfederacion.

Multan monon li perlaboris. Kompreneble, malpli ol kiam li estis fraŭdulo, sed ja sufiĉe por vivi komferte kaj ŝpari monon. Ĉiusemajne, li donis tricent frankojn al Ĵermena. La troaĵon li konservis por fari al si etan ŝparaĵon. Por kia celo tio estos ? Li ne sciis. Estis nur ero de lia programo.

\* Dokisto = laboristo ĉe doko, deŝarĝisto.

Dua avantaĝo rezultis el tiu profesio : ĝi lasis al li multe da libertempo. Estis ne ĉiam malŝargendaj ŝipoj. Kaj vespere, oni elturniĝis por frue fini la taskon. Preferinde estis labori tre frumatene, kiam la varmego malpli sufokigas.

Tio bone taŭgis al Silvano. Tuj post la laborfino, kiam li havis kelkajn horojn da libero, li zorge lavis sin, surmetis puran jakon, kaj fulmorapide biciklis al Furnes.

Kiam komenciĝis tiu nova vivo, Ĵermana tute ne ŝajnis entuziasma. Po tricent frankoj semajne, tio estis ja bone. Multaj virinoj kontentiĝus per tiom. Tamen, tio ne sufiĉis por retrovi la facilan vivon, al kiu ŝi estis alkutimiĝinta. Fakte, de kelka tempo, per sia neerarema virinintuicio, Ĵermana antaŭflaris profundan ŝanĝon ĉe Silvano.

Estis vere. Silvano devis ja konfesi tion al si : li ne plu havis por sia edzino la samajn sentojn, kiujn li havis antaŭe. Longe, li kredis, ke li eĉ vere amas Ĵermanan. Ankoraŭ tre juna li estis, kiam li renkontiĝis kun ŝi. Lian naivecon ŝi forprenis. Lia iniciatinto ŝi fariĝis. Kaj la fortegaj karnligoj alligis lin al ŝi. Krom iaj maloftaj diboĉoj kune kun liaj kamaradoj, ŝi daŭre restis lia unusola amsperto. Longe, li estis al ŝi dankema por la plezuroj, kiujn ili kune spertis. Pro tio, tuj post kiam naskiĝis tiu korinklino, li postulis, ke ŝi foriru el la domaĉo de Sinjorino Johanino.

Tamen, tiaj aferoj eluziĝas kun la tempo. La rutino senĉarmigas la plezurojn, kiam temas nur pri amoro. Kaj Silvano ekkonsciis pri tio, tuj post kiam li renkontiĝis kun Paskalina. Ekde kiam eniris en lian menson tiu pura kaj freŝa afero, aperis pensoj kaj memoroj, kiujn li dezirintus elŝiri el sia animo. Ĵermanan li ne plu povis ami. Estis inter li kaj ŝi tro da hontindaĵoj, tro da malpuraĵoj. La penso pri ĉio, kion ili kune faris, kelkfoje revenis al lia memoro kaj naŭzis lin. Ŝi sciis ebriigi lin per siaj karesoj; de sia antaŭa profesio, ŝi konservis la hontindan konadon de viroj, ties deziroj, ties masklofantaziaĵoj. Ŝi antaŭiris la dezirojn de Silvano; kvazaŭ malsatega monstro, ŝi elĉerpis lin, malplenigis lin, sorbis liajn fortojn, kaj ŝi lasis lin volupte mortantan sed ankaŭ tute naŭzitan.



De longe li pardonis ŝin, sed li tamen diris al si, ke li fariĝis Silvano la fraŭdulo pro ŝia kulpo. Por ŝi, li rezignis la bokson, sian pasion por la sporto, kiu eble farintus el li ĉampionon. Ĵermena tute ne ŝatis tion. Al virino plaĉas, ke la viro, kiun ŝi amas, restu proksime al ŝi. Instinkte, ŝi ĵaluzas ĉiujn virpasiojn, kiuj ne direktiĝas al ŝi. Ŝajnas, ke oni ŝtelas de ŝi... Plue, se Silvano nur praktikintus malpli danĝeran sed pli elegantan sporton ! Sed la bokso riskas difektigi, malbeligi vin. Kaj Ĵermena trovis Silvanon tre bela. Por ŝi multe gravis lia eksteriĝo. Li iom similis filmakoron. Ŝi ne volis, ke li daŭre boksu, ke li iam revenu kun premita kaj monstra nazo. Ĉar ŝi estis aĉetema, kaj pro la fakto, ke Silvano ne plu konsentis dividi ŝin kun aliaj, li devis nepre serĉi pli lukran laboron. Sed neniam sen dolora korpremo Silvano retrovis sur ĵurnalo, aŝiŝo aŭ programo, la nomon de iu ekskamarado el tiuj gloraj tagoj.

Sen konfesi tion al si, li konservis obtuzan rankoron kontraŭ Ĵermena.

Sed la granda, la vera kialo de lia senintenca sintenoŝanĝo estis lia kreskanta pasio por Paskalina. Tiu forta kaj sekreta sento, kiu ĉiutage pligrandiĝis en li, kvazaŭ kaŝita fajro, sen ke li konsciis, fine regis lin tute. Nur de tempo al tempo Silvano ekkonsciis pri tio, per indicoj kiuj mirigis lin, neatendite malkaŝis al li la grandegan ŝanĝon de lia personeco. Sen eĉ esprimi tion, nun li sentis, ke li deziras nur unu aferon : esti kiel eble plej ofte proksime de Paskalina. Li estis feliĉa nur tie. Aliloke li atendis la momenton, kiam li povos tien reiri. Li pasigis tutajn semajnojn atendante tiujn kelkajn horojn. Tiu senpacienco tute malsimilis la febron, kiu iam ekkaptis lin, kiam li iris al rendevuejo de Ĵermena. Nun, estis io multege pli kvieta kaj dolĉa. Li ne komprenis, kial li tiom ŝategis tiujn momentojn en la eta gastejo de Furnes. Kiam li forlasis ĝin, li ne kapablis diri, kiamaniere pasis la horoj, kiuj fuĝis en la malnova domo, kiel fuĝas la feliĉaj momentoj. Neniaĵoj, infanaĵoj pri kiuj li iam eklevis la ŝultrojn, sufiĉis por lin okupi tie, kaj eĉ doni al li pacan kaj profundan feliĉon, kiun li ne povis

klarigi al si. Apud Paskalina, senkaŭze, nur pro la ĉeesto de la fraŭlino, Silvano estis nepriskribeble feliĉa. Li sentis neniun deziron, nur kvietan kontenton de l'animo, kvazaŭ ĉiuj deziroj estus plenumitaj. Neniam li sentis apud Paskalina ian konfuzan tenton. Li eĉ ne ekpensis kisi ŝin. Iom infana estis lia tenereco por ŝi. Neniam li spertintis ion similan.

Okazis, ke li amuziĝis kun la fraŭlino per aferoj, kiuj antaŭe ŝajnus al li infanaĵoj. En la ĝardeno aŭ dum promenadoj tra la ĉirkaŭa kamparo, ili ambaŭ freneze ridadis laŭvoje. Kial? Tion Silvano sin poste demandis. Neniaĵo, amuza vorto, misparolo, grimaco aŭ eĉ la nekutima arbo-, nubo- aŭ ŝtono-formo: io ajn sufiĉis por okazigi tiujn ridojn, kiuj ŝprucis pro la plej eta preteksto, kvazaŭ la feliĉo de la gejunuloj bezonis korelverŝiĝi kaj komunikiĝi.

Forlasinte Paskalinan, Silvano forgesis la tutaĵon. En lia menso nur restis memoro, radiado, kiu illumina lin tutan estaĵon. Revenante hejmen, li paŝis pli gaje. Li sentis ĝojegon, kiu levis lin, emociigis lin, donis al li kvazaŭ deziron eluzi pliaĵon da fortoj.

Kaj ĝis la tago, kiam li povos finfine reiri tien, li vivis per siaj memoroj. Li kelkfoje ekridis, kiam li memoris pri la paroloj de Paskalina, kiuj amuzis ilin ambaŭ. Kun neesprimebla kortuŝo, li surprizis sin pensanta pri kaveto, kiu desegniĝis sur ŝia vango, kiam ŝi ridis. Li fariĝis nun pudora. Vortoj, kiujn iam li senkonsidere uzis, nun ŝajnis al li maldecaj. Li ne plu aŭdacis diri ilin. Li estis kortuŝita antaŭ spektadoj, kiuj antaŭe lasis lin indiferenta. Kelkfoje, li sentis ridindan kortuŝon vidante filmon, aŭskultante amromancon, rigardante lunlumon aŭ belan pejzaĵon. Siamaniere, li fariĝis poeto, iom koleris kvazaŭ temus pri malforto aŭ humiliga afero, kiun li ne povis eviti. Tute nova respekto por virineco, naiveco, juneco, nun malpermesis al li galantajn ŝercojn, kiujn li iam faris, kiam li renkontis iun fraŭlinon.

Plurfoje li eĉ ploris, pensante pri sia infanaĝo, kiam li ankoraŭ estis tute naiva, honesta kaj meritanta la simplaniman freŝecon de Paskalina.

## DEK-KVARA ĈAPITRO

Kiam Ĵermena rakontis al Lurĵo tiun transformon, li unue rifuzis kredi ŝin. Neniam oni vidis fraŭdulon saĝigi sin, li diris. Denaskan inklinon li havas.

Por pravigi sian opinion, Lurĵo memoris multegajn similajn ekzemplojn. Li ofte vidis tiajn pentojn. Post kruda leciono, ses monatojn en malliberejo, oni kelkfoje ne plu povis elteni tion. Oni revis haltigi sin sur la deklivo, resupreniri, reiĝi homo kiel la aliuloj : libera, protektita anstataŭ persekutita. La edzino kaj la infanoj pelis vin sur tiun vojon. Oni serĉis dungadon kaj kuraĝe eklaboris. Ĉio iris glate unu-du monatojn. Poste, tiu bela fervoro febliĝis. Ne plu envenis sufiĉe da mono. Oni sentis sin laca pro la unutoneco de malfacila tasko malbone pagata. Bona okazo prezentiĝis. Amiko, kliento aŭ fraŭdestro venis al vi. Li bezonis vin. Sendanĝera afero, grandega gajno. Por unu nura fojo, oni cedis al tento. Oni trompis sin mem kaj interkonsentis kun sia konscio. Unu fojon, unusolan fojon. Poste, oni ĉesos.

Kaj ek al nova aventuro !

Se ne okazis la bonŝanco de tuja aresto, jam finiĝis la honesta vivo. Oni refalis sub la influo de sia malvirto. Kaj\_tio ĝis la finofara afero, kiu almetis finan punkton al l'aventura serio : interbatado kun doganistoj aŭ rivaloj, tranĉilpiko aŭ revolverpafo, forpaso aŭ malliberejo. Tiajn pasiojn oni kunportas en sia haŭto, ne plu liberiĝos de ili.

Lurĵo ja sciis tion. Li sciis, ke fraŭdulo ne plu povas labori, ke al tiu ŝajnas stulte elĉerpiĝi kvardek ok horojn semajne por cent kvardek frankoj, dum li povas lukri tiom en unu nura duontago. Kaj li kalkultis je tio, rifuzante kredi, ke Silvano povintus sincere forlasi la fraŭdadon.

Plurajn klarigojn li imagis por pravigi la asertojn de Ĵermena. Eble la virino timis, ke Lurĵo gvatsekvos Silvanon, kaj ŝi provis

forlogi liajn suspektojn. Aŭ eble Silvano mem malfidis sian edzinon kaj ne plu bonvole parolis al ŝi pri siaj aferoj.

Tamen, Lurĵo informiĝis. L' alta Fernando sciigis al li, ke Silvano fakte ne plu aĉetis eĉ unu tabakpaketon de post la aresto de Cezaro. Sed tio nenion pruvis. Eble Silvano malfidis ankaŭ la fraŭdestron kaj provizis sin aliloke.

Sed siaflanke S-ro Henriko asertis, ke Silvano honeste laboras ; al la doganisto li eĉ donis la nomon de la havena entrepreno, kiu dungis lin.

Lurĵo iris promeni en tiu kvartalo kaj antaŭ ne longe, sur la kajoj, ekvidis Silvanon, kiu, kune kun aliaj dokistoj, laboris en la holdo de granda ŝipo, malŝarĝante platojn levitajn per gruo.

Lurĵo devis ja akcepti la evidentecon. Vigla malplezuro naskiĝis en li. Sian venĝon li ja ŝatintus fari. Sed reiĝinte honesta, estis Silvano nevundebla.

Lurĵo tiel pensis kiam novaj indicoj alvenis, por ke li denove dubu pri la vereco de la diraĵoj de Ĵermena. El unu doganejo ĉe landlimo, oni sciigis al li, ke Silvano pasas tien du-trifoje ĉiusemajne por bicikli al Belgio. Unu doganisto, kiu konis lin, rapide rimarkis tiujn suspektindajn vojaĝojn. Ĉar Lurĵo jam rakontis al li, ke Silvano verŝajne estas kontrabandisto, la doganisto ĉiufoje haltigis lin, pripalpis lin de l'kapo ĝis piedoj, detaleme ekzamenis lian biciklon, sed ĉio senrezulte.

Lurĵo tuj certiĝis, ke tio kaŝas novan ŝakradon, malbanalan kombinaĵon, kiun oni nepre malkaŝu. Tiajn suspektojn li konservis por si mem, parolis pri tio nek al Ĵermena, nek al Henriko, kiun li malfidis. Kaj li komencis ellabori planon kun tiu obstino, kiu estis lia forto.

Unue, li devis ekscii precize, kien iras Silvano. La doganisto, kiu rimarkis lin, diris al Lurĵo, ke la eksfraŭdulo regule transpasas la landlimon ĉiun sabaton. Estis logike : Silvano laboris « angla-

semajne »<sup>17</sup>, tial profitis de sia libertempo por aĉeti. Sed estis altvalora la informaĵo. Ĝin Lurĵo uzis por deĵorigi en la doganejo homon en civilaj vestoj. Li ordonis al li, ke, tuj post kiam Silvano estos transpasinta la limon, li diskrete gvatsekvu lin en Belgion, vidu kien li iros, kaj bone notu la domon, tiel ke ĝi estos facile retrovebla.

La sekvantan lundon, la doganisto alvenis al la oficejo de Lurĵo.

- Nu ? li senpacience demandis.

- Mi sekvis la ulon. Li eniris en Belgion. Li biciklis sur la vojo de Dunkirko al Furnes, laŭlonge de la kanalo.

- Kaj poste ?

- Ĉe la eta ponto antaŭ ol alveni al Furnes, li iris maldekstren kaj trapasis la kanalon.

Preninte krajonon, Lurĵo samtempe skribis.

- Kio poste ?

- Li sekvis etan vojeton, laŭ la bordodeklivo. Li alvenis al loko de eksa ponto, kie staras malnova domo, ia kabaredo aŭ io simila. Li eniris tien. Pli ol unu horon mi atendis, sed ne vidis lin eliri. Tiam mi revenis.

- Bone, diris Lurĵo. Ĉu tio estas ja kiel vi klarigis ? Vi ne povas erarigi min ?

- Estas ja neeble.

- Do, mi mem iros tien por vidi. Dankon.

La viro eliris. Lurĵo traserĉis siajn notlibretojn. Li ĉiam kunprenis sur si multvalorajn informaĵojn pri ĉiuj aferoj rilate al sia profesio. Kaj li relegis la tutan liston de la belgaj domoj, kiujn oni suspektis vendi tabakon al la fraŭduloj aŭ nokte ellasi ties hundojn. Kabaredojn, nutraĵvendejojn, farmbienojn, li ĉion relegis. El tiuj domoj, kelkajn li konis ; eĉ pluraj konkorde laboris kun li. Aliajn, li konis nur reputacie ; li sciis, ke estas preferinde

---

<sup>17</sup> Labori « angla-semajne » signifas ne labori semajnfine (sabaton kaj dimanĉon). Tiu « kutimo » komenciĝis en Anglio. Do Silvano estis libera tiujn tagojn.

gvati ilin ; de tempo al tempo, ilin ĉirkaŭvagi en civilaj vestoj ; noti la numeron de la francaj aŭtoj, kiuj haltis tie, kaj demandi informaĵojn pri ties proprietuloj en prefektejo. Per multe da pacienco, kontroliroj, spionadoj, denuncoj kaj perfidoj, pri tiu temo li finfine kolektis dosieron proksimume kompletan, tiom detalan kiom oni esperas.

Sed vane li detaleme faris la inventaron de siaj slipoj. Li eltrovis neniun noton, kiu donas al li klarigon pri la malnova domo rimarkigita de la doganisto.

Tie estis problemo, pri kio Lurĵo komencis pasiiĝi.

« Tion mi mem iros vidi sabaton, » li ekpensis, reenpoŝigante siajn paperojn.

Kiam, la sekvan sabaton ĉirkaŭ la dua posttagmeze, Silvano preterbiciklis la francan doganejon, li ne konjektis, ke malantaŭ la kurteno de la kabaredo de la doganoficisto, Lurĵo vidis lin foriri direkte al Belgio.

Tuj post kiam Silvano estis foririnta, Lurĵo eliris, surbicikliĝis kaj komencis sekvi la fraŭdulon.

Silvano rajdis malrapide. Baldaŭ Lurĵo lin revidis je du-tri cent metroj antaŭ si . Li ne pli proksimiĝis, kontentiĝante konservi la interspacon, okaze ke Silvano rigardus returne. Se la kontrabandisto rekonus Lurĵon, li malfidus. Kaj ĉio fiaskus. Tial Lurĵo laŭiris tuj apud la vojranda fosaĵo, ĉe la kontraŭa flanko de la kanalo, estante preta ĵeti sin inter la veprojn se la sekvato rigardus returne.

Sed Silvano aspektis tre trankvila. Li kviete pedalis, senhaste. Nenio en lia sinteno memorigis al Lurĵo la fraŭdulon, kiu foriras ŝakri. Kaj tia kvieto denove konfuzis la doganiston.

Oni ekzakte laŭiris la vojon, kiun indikis la doganfunkciulo. Sed alveninte al la ponto, tuj post kiam li transiris ĝin, Lurĵo ne iris pli foren. Li kontentiĝis rigarde sekvi Silvanon ĝis la malnova gastejo. Kaj li malsupreniris la deklivaĵon, kiu direktas al la

akvorando, kaŝis sian biciklon inter la herbojn kaj paŝis laŭ la kanalo, certa ne esti videbla de iu ajn el la loĝantaro de la malnova domo. Nur povis vidi lin tiuj, kiuj pasis sur la granda vojo ĉe la alia flanko. Plue, por preventi ian suspekton, Lurĵo paŝante rigardis la akvon, piede sondis la grundon, simule serĉis bonan lokon por fiŝkapti.

Post kelkaj minutoj, li atingis la lokon de la ruina malnova ponto. Li pluiris kvindekon da metroj. Kaj li supreniris, troviĝis tiam je la nivelo de la forlasinta eks-granda vojo.

Ternivele, li levis la kapon supre de la herboj kaj rigardis. Nenion li vidis, krom la tremantajn altajn arbojn, kaj antaŭ si, la fasadon de la malnova gastejo.

Dum momento, li hezitis. Ĉu li montros sin malkaŝe? Ĉu tielmaniere li ne riskos ĉion kompromiti? Tion li opiniis. Li lasis sin denove malsupreniri la deklivaĵon kaj proksimiĝis al la gastejo.

El supre, li ekaŭdis flustradon de voĉoj. Ĉar li kredis, ke oni lin malkovris, li ne plu moviĝis, atendente tion, kio okazos.

La voĉbruo daŭris. Li levis la kapon. Nenion li vidis, krom malaltan heĝon, kiu staris super la kanalbordo. Alvenis al li vortoj; li rekonis la voĉon de Silvano.

Tiam, per lantaj kaj silentaj rampmovoĵoj, li denove supreniris la deklivaĵon. Li atingis la heĝon, sukcesis kroĉi sin al ĝi kaj kaŝiĝi tie. Kaj tre proksime de si, li vidis la kontrabandiston; turnante al li la dorson, li estis en la ĝardeno kaj parolis kun fraŭlino. Silvano mantenis pendantan hakilon, per kiu li ĵus hakis lignon iom antaŭe. Li parolis per vibranta voĉo, pro emocio.

- Jes, estas malfacile, li klarigis. Sed necesas, ĉu? Kaj mi jam spertis pli gravajn malfacilaĵojn.

- Ĉu pri negoco?

- Kvazaŭ, jes. Sed mi ne kontentiĝos pri tio. Mi volas sukcesi pli rapide...

- Senpacienca vi estas...

- Jes. Sed ne por mi. Mi mem estas feliĉa, sciu, kiel nuntempe. Nenion pli mi deziras. Ŝajnus al mi belege, se tio ĉiam daŭrus tiele. Sed estas neeble... Tamen, kun multe da volo... Nu, iam ĉio ŝanĝiĝos.

Lurĵo esperis de la fraŭlino demandon, kiu klarigus la misteron de tiu konversacio. Sed la fraŭlino ŝajne komprenis, aŭ eble timis pridemandi lin. Ŝi silentis ; kun songa mieno, ŝi rigardis la flavajn florojn, kiuj kreskis en la herbo de la aleo, je ŝiaj piedoj. Rilate al Silvano, kiu ĵus ellasis sian hakilon, li nerve krucis kaj frotis siajn fingrojn.

- Oni ne bezonas tiom da mono por vivi, li pludiris.

- Ĉi tie, oni ne multe elspezas. Sed la domo ja ne estas granda.

- Ne pli mi bezonus. Domon kun eta ĝardeno kiel tiu ĉi, kaj mi vetas, ke mi fariĝos tiel maljuna kiel via onklo.

La fraŭlino ridis. Kaj ankaŭ Silvano ridetis.

En sia kaŝejo, Lurĵo komencis kompreni. Li laciĝis, pro sia malkomforta pozicio, sed multe interesiĝis pri tiu konversacio. Malgraŭ la laceco de siaj brakoj, li daŭre kroĉis sin al la heĝo de sambuko. Li koncentris sian tutan atenton por pli bone aŭdi la mallaŭtan voĉflustradon, kiu alvenis al li.

- Ne longe daŭras por sufiĉe perlabori, se oni estas ŝparema, pludiris la fraŭlino.

- Ne. Sed necesas tiom malmulte, por ke ĉio fuŝos... Mi timas malfeliĉon, ĉiufoje kiam mi revenas ĉi tien...

- Kial ? Kian malfeliĉon ?

- Nu, mi ne scias. Sed oni povas nenion fari, ĉu ? Oni bezonas atendi. Kun tempo, oni solvas ĉion. Kaj tamen, se okazus io...

- Kio ?

- Oni neniam scias... Aferoj...

- Nu ?

- Nu, vi ne devus havi vengemon kontraŭ mi...



- Kial mi havus venĝemon ?

- Mi scias, ne estas kialo... Sed kelkfoje... Ĉiuokaze, mi estus ja kontenta, tiam, se mi estus certa, ke vi dirus : li tamen faris kiel eble plej bone. Ĉu ?

- Mi ja vidas, ke vi multe strebas.

- Jes. Do, vi ne havus venĝemon ?

- Neniam mi havus venĝemon kontraŭ vi.

- Dankon. Tiel mi estos pli kvieta.

Lurĵo jam divenis. Li opiniis neutile pluspioni Silvanon, kaj eble kompromiti sian tutan esplorvojaĝeton. Oni povus malkovri lin pro movo aŭ pro kraketo de la branĉoj, al kiuj li kroĉis sin.

Malrapide, li lasis sin gliti sur la herbon, laŭ la deklivaĵo, kaj malproksimiĝis laŭ la akvobordo. Nevidite, li alvenis al la ponto, kiu transpasas la kanalon.

Li retrovis sian biciklon, ekrajdis, kaj, pensante pri la sukceso de sia entrepreno, per bona rapido, tute gaja, li foriris direkte al Francio.

## DEK-KVINA ĈAPITRO

La sekvan jaŭdon, tre frue antaŭ la kutima horo, Lurĵo alvenis al Henriko. Li daŭre renkontis Ĵermenan - ankaŭ tiun tagon. Ĉar li tre regule venis ĉiusemajne, ili fine kamaradis, familiare parolante kaj reciproke rakontante la semajnajn okazaĵetojn.

Lurĵo ne plu estis sekreta nun : li malkaŝe montris sin kvazaŭ ŝian amindumanton, insiste demandis al Ĵermena, ĉu ŝi « ankoraŭ ne decidiĝis por hodiaŭ ». Tion Ĵermena traktis kiel bagatelon, do frivole ŝi respondis ke ne, ke oni ja havas tempon, ke li ne sukcesos per tro urĝema sinteno.

Sed sub tia ŝercado, ŝi ja sentis, ke estas io profunda. Per sia virina antaŭflaro, duobligita de ekspulina malvirto, ŝi konjektis violentan pasion malantaŭ la rideta mieno kaj afableco de Lurĵo. Tiu sovaĝa, vivega pasio kelkfoje neatendite seriozigis lin, kiam li rigardis Ĵermenan per strangaj okuloj, harditaj de deziro. Tio konfuzis ŝin. Ŝi sentis sin kaj flatita kaj timigita. Ŝi samtempe deziris kaj timis, ke « estiĝus io serioza ».

Tiun tagon, kiel kutime, Ĵermena alvenis ĉirkaŭ la tria.

En tiu momento, oni estis trankvila ĉe S-ino Johanino. Nur pli malfrue alvenos la klientoj. La virinoj jam foriris, profitante sian ferian tagon. Post interŝanĝo de kelkaj vortoj kun la paro, S-ro Henriko, kiu klare komprenis la tutan aferon, zorge lasis Ĵermenan kaj Lurĵon solaj en la salono. Li tamen iomete aŭskultis trans la pordo, por ekscii pri la situacio, sed nenion plian li faris.

Jam de longe, Lurĵo ne plu kaŝis al Ĵermena, ke li estas doganisto. Tio multe impresis Ĵermenan same kiel la belstatureco de la viro.

Kaj, se ŝi daŭre restis fidela al Silvano, tio estis pro ia resto de ŝuldosento pro tio, kion li faris por ŝi en la pasinteco. Tamen, precipe ekde kiam li ĉesis fraŭdi, ŝi volonte sin liberigus de tiu sento, por adulti sen ia maltrankvilo.

Ankaŭ hodiaŭ ŝi estis kolerega. Ŝi petis bagatelaĵon, kvardek frankojn por aĉeti al si ĉapelon, pri kio ŝi sopiris. Kaj Silvano strikte rifuzis.

« Ĉiusemajne, mi donas al vi tricent frankojn, li diris. Elturniĝu ! »

Laŭ Ĵermena, li fariĝis fia avarulo. Ĉar ŝi estis kutimiĝinta ĉiam elspezi senkalkule, imponi per sia brila lukso al la najbarinoj kaj ekskamaradinoj, ŝi suferis pro tiu ŝanĝo; ekmanĝis al ŝi eĉ la monataj vivrimedoj. Ŝi multe fordonus, por vidi Silvanon reiĝi kontrabandisto. Li lukrus pli multe. Kaj eble, dank'al iom da bonŝanco, li estus arestita, kaj tiel redonus al ŝi liberecon, kiun ŝi nun plenforte deziris.

- Ĉu glatas ? ŝi demandis alvenante.

- Bonege. Ĉu ankaŭ vi ?

- Jes. Sed mi kverelis kun Silvan'. Eĉ ne volas, ke mi aĉetu al mi ĉapelon je nur kvardek frank' .

- Se vi 'stus pli amika, ne longe vi atendus ĝin.

- Ĉiam vi diras stultaĵojn.

- Do, ne 'stas por hodiaŭ, ĉu ?

- Ankoraŭ ne.

- Tamen, mi venis kun novaĵ' .

- Kio ?

- Mi eltrovis, kial Silvan' ĉesis fraŭdi.

- Kial ?

- Pro ulin' .

- Vi frenezas, ĉu ?

- Mi ja diras, ke li havas fraŭlinon ! Kaj io beleta, ŝi 'stas ! Tut' juna, tut' freŝa, nu : piĉulin' .

- Kie ?

- En Belgio. Kaj 'stas varma l'amafer', sciu, amikin' mia ! Vin, iun tag', li abrupte forlasos.

Kolerego misformis la vizaĝtraĵojn de Ĵermena.

- Ĉi vi vidis ŝin ?

- Samkiel mi vidas vin. Pri virt', pri honestec' ili parolas. Li 'stas returnita kvazaŭ gant'. Ĉarlatanos vin, se tio daŭros. Vidu, kiom malprave vin ĝeni por li.

Eĉ ne unu minuton Ĵermena dubis. La diraĵoj de Lurĵo ja bonege konfirmis ŝiajn proprajn suspektojn. Estis multegaj indicoj, pri kiuj virino ne eraras, kaj kiujn ŝi jam rimarkis de longe. Silvano ne plu drinkis, ne plu ludis. Li fariĝis tiel ŝparema, ke Ĵermena riproĉis lian avarecon. Li ŝajnis ŝanĝiĝinta. Li, kiu iam estis tiom voluptema, tiom malforta antaŭ la karna deziro, nun iĝis pli frida. Li malatentis Ĵermenan ; kelkfoje, ŝajnis, ke la kontakto kun tiu virino, kiun li amis, estigis en li ian naŭzon.

Krome, plej neprecizaj indicoj revenis al la memoro de Ĵermena. Silvano ne plu estis ĵaluza, kiel antaŭe. Kaj li ŝajne fariĝis pli knaba ; okazis, ke infanaĵoj gajigis lin. Aŭ li estis kortuŝita sen kialo. Li ne plu ridis kiel antaŭe, per konfuza rikano, kun fermita buŝo. Li malkaŝe ridis, nun, montrante siajn belajn dentojn, pli sincere, kvazaŭ sen ia kaŝita penso. Fakte, li aspektis rejuniĝinta.

« Nu, demandis Lurĵo, tio decidigas vin, ĉu ? Ĉu por hodiaŭ ? »

Ĵermena levis la ŝultrojn. Ja certe estis nun momento por pensi pri tio !

- Ĉu vi scias, kie ŝi loĝas ? ŝi demandis.

- Jes.

- Bone. Vi min veturigos tien. Mi ja scios, ĉu 'stas vere.

- Kaj, kio se 'stas vere ?

- Oni vidos.

Tiun sabaton, kiel kutime, Silvano jam iris al Furnes. Li revenis relative malfrue vespere kaj, enirante la domon, li ne vidis

Ĵermenan. Sen maltrankvili, pensante, ke ŝi foriris por viziti najbarinon kiel ŝi foje faris, li enlitiĝis.

Nur iom antaŭ noktomezo Ĵermena rehejmeniĝis. Ŝi ne respondis al la demando de Silvano, kiu estis malbone vekita el sia unua dormo. Cetere li reendormiĝis tuj poste.

La sekvantan matenon, li ellitiĝis kaj tuj malsupreniris en la kuirejon. Ĵermena jam estis tie. Tio estis nekutima. Ŝi estis malfruelliĝema, precipe dimanĉon.

« Jam ellitiĝinta ! Vi ne 'stas malsana, ĉu ? »

Ĵermena nenion respondis.

- Kio ne 'stas glata denove ?

- Multaj aferoj.

La nekutima mieno de Ĵermena alarmis Silvanon.

- Kien v' iris hieraŭ ? pludiris Ĵermena.

- Promeni.

- Kien ?

- Kien plaĉis al mi.

- Ja ĝenus vin respondi al mi, ĉu ?

- Min ?

- Jes. Sed n'indas fari. Kien v' iris, mi mem povas diri. V'iris al Furnes por vidi vian ulinon.

Silvano treege paliĝis. Ŝajnis al li, kvazaŭ lia koro frostiĝis en la brusto. Li deziris paroli sed ne trovis eĉ unu vorton. Nenion plu regis lia konfuzita cerbo.

« Ha ha !... Nenion vi povas respondi, ĉu ? rikanis Ĵermena. Mi ja konas vian afereton, mia ul' ! M' iris tien hieraŭ por vidi mem. »

Silvano ekstremis sed daŭre silentis.

« Bonan guston vi havas ! pludiris Ĵermena, ĝuante sian venĝon. Beleta ulin' ! Ŝi 'stis vere mirigita, kiam mi diris al ŝi, ke mi 'stas

via edzin' . »

Silvano relevis la kapon :

- Vi faris tion, li murmuris. Vi aŭdacis ŝin alparoli...

- Nu ! ekkriis Ĵermena, ege ofendita. Mi ja valoras tiun pudorafektan piĉulinon ! Ne mi forprenas l'edzon de aliul' ...

Kaj sur la puran bildon de Paskalina, kiun Silvano konservis en si, Ĵermena sputis torenton da abomenindaj insultoj. Ŝi senbridiĝis. Sian tutan galon, sian tutan ĵaluzon de koruptita kaj defalinta virino, ŝi elkraĉis kontraŭ tiun fraŭlinon, kiun ŝi malamegis, ĉar ŝi divenis ŝin netuŝita. Ŝi estis inteligenta en sia malboneco. Ŝi ja bone komprenis la ekaperon de tenero, kiu certe kreskis en la koro de Silvano por tiu juna fraŭlino, kiu ankoraŭ estis tute simplanima kaj pura. Kun feroca ĝojo ŝi malpurigis tiun freŝecon. Ŝi mokpikis Silvanon per vortoj, kiuj elŝiris lian koron, nudigis kaj ruinigis la esperojn, la revojn, la tutan misteran kaj delikatan ekfloradon de tiu ankoraŭ ne konfesita amo. Ŝia kolerego kreskis kune kun sia parolfluo. La malespera ekkrio de Silvano : « Ĉu vi aŭdacis fari tion ? » profunde vundis ŝin en ŝiaj orgojlo kaj malamoplana envio. Kaj ŝi plu furioziĝis fronte al la sinteno de la viro.

Nenion li plu diris. Stupora, li ĉeestis tiun buĉadon, tiun masakradon de siaj revoj. Pri frapi li eĉ ne pensis. Plori povus iom refortigi lin, sed liaj okuloj daŭre estis senlarmaj kaj brulantaj.

Senspire, Ĵermena finfine ĉesis. Ekestis pezega silento. Silvano ne faris ian geston, ne moviĝis pli ol marmora statuo. Eĉ liaj okuloj restis neŝanĝeble fiksitaj sur io nevidebla. Tio fine timigis Ĵermenan, pli ol la plej fortimiga kolerego.

« Parolu ! Diru ion ! » ŝi fine ekkriis.

Silvano rektiĝis, ŝajnis rekonsciiĝi. Poste, li eliris kaj foriris sen iu vorto.

Nur la sekvan mardon li revenis, ĉirkaŭ noktomezo. Ĵermena, kiu ne plu enlitiĝis de du noktoj, aŭdis tiam hezitantajn paŝojn sur la trotuaro antaŭ la domo. La paŝoj haltis ĉe la pordo.

Anhelante, Ĵermena leviĝis el la seĝo, kie ŝi vigilis. Kun lampo ĉemane, ŝi proksimiĝis al la pordo. Ŝi ne plu aŭdis ion.

« Ĉu 'stas vi, Silvan' ? » ŝi angore demandis.

Kaj, ekstere, estiĝis lamento, ĝemado, kiu ŝajnis enhavi la tutan humanan mizeron, kaj kiu tremigus vin. Ĵermena malfermis la pordon. Silvanon ŝi rekonis antaŭ si.

Li fariĝis terura vidaĵo. Hontinda, malpurega, kun disŝiritaj, kotmakulitaj vestoj, grizaj pro polvo, li kunportis sur si la spurojn de ĉiuj fiaj lokoj, kien li vagadis dum tiuj du tagoj. Unu el liaj piedoj estis senŝua. Kaj la nuda piedo trapasis la truojn de lia eluzita ŝtrumpeto. Sed timigis Ĵermenan precipe lia vizaĝo. Ŝi retrovis tie la trajtojn de Silvano, kaj tamen ne plu estis li. Sur liaj stultigitaj trajtoj, en liaj okuloj, kiuj ne plu vidis, en la fienco de la tuta vizaĝo pro alkoholo kaj elĉerpiĝo, estis io, kiu atestis nedireblan suferadon, kvazaŭ la konscio daŭre memoris malgraŭ tia brutiĝo.

« Dio mia ! » ekkriis Ĵermena.

Ŝi enirigis kaj sidigis lin. Ŝi deprenis lian ŝuon, viŝis la kotajn manojn, la lipojn malpurigitajn de salivŝaŭmo, kaj la frunton, kiu sangis pro vundeto. Ŝi kompatis malgraŭ sia kolero. Ŝi sentis sin aflikta pro la vido de sia edzo en tia stato. Kaj ŝi forgesis sian rankoron ; ŝi provis lin konsoli kaj revigligi. Li lasis sin fari kvazaŭ infano. Fojfoje, li ellasis tiun plendon simila al stertoro, kiu timigis Ĵermenan. Kaj sen ia kuntiro nek ia ekstremo de lia vizaĝo, la larmoj plu formiĝis en liaj okuloj, kroĉiĝis al la okulharoj kaj ruliĝis sur la vangojn. Ne farinte ian geston, li endormiĝis sur la seĝo. Malhumana doloro daŭrigis lian ploradon eĉ dum la dormo.

Silvano rekomencis sian profesion de fraŭdulo. Li denove vivis kiel antaŭe. Li ŝajne pardonis al Ĵermena. Sed li laborigis ŝin de nun. Ŝin li devigis porti tabakon aŭ eĉ iri al Belgio por ĝin aĉeti.

Krom tio, li reiĝis la Silvano, kiun ŝi iam konis. Sed li ja sentis, ke li ne plu estas la sama homo. Estis io frosta, malvarma en li. Ŝajnis al li, kvazaŭ li estas kiel tiuj virinoj, kiuj portas en si senvivan infanon.



## DEK-SESA ĈAPITRO

Ĉar nun Silvano devigis ŝin labori, Ĵermena uzis la ruzon, kiun li instruis al ŝi por transpasi la limon.

Ŝi foriris kun amikino por enpaŝi Belgion kune. Revenante, ŝi lasis tiun personon antaŭiri ĝis la doganejo. Alvenante tien, la virino, kiu kunportis sur si nenian prohibitan varon, trankvile pasis, sed samtempe zorge enrigardis la doganejon por ekscii, ĉu la « kontrolistino » estas en la oficejo. Se tie ŝi ekvidis ŝin, tuj post la transpaso de la landlimo ŝi signis al Ĵermena. Tiu ĉi lasta, ankoraŭ en Belgio, atendis je cento da metroj sen deturni sian rigardon de la amikino. Ĵermena bone komprenis la signon ĉar ĝi estis klare videbla. Sen rigardi returne por ne atentigi la doganistojn, la virino haltis kelkajn sekundojn kaj simulis religi sian ĝarteron super la genuon. Poste, ŝi ree antaŭeniris.

Sed tio sufiĉis. Ĵermena tiam sciis, ke la kontrolistino ĉeestas. Ŝi ne riskis la aventuron. Ŝi returniĝis, realportis la tabakon al la eta nutraĵvendejo, kie ŝi proviziĝis, kaj atendis pli favoran tagon.

Se la amikino foriris ne farinte la konvenan signon, Ĵermena siavice transiris la landlimon.

Ŝi estis beleta virino, el tia peza kaj graseta raso, kiun la popolaj homoj elserĉas. Kaj ŝi sciis kiel uzi tian forton. Ŝi salutis la doganistojn kun plena rideto. Ŝi gaje respondis al la flirtemaj ŝercoj de la plej aŭdacaj. Per vigla sed neniam hezitema frapo, ŝi forpelis la troriskeman manon, kiu aŭdacis iri direkte al ŝiaj ĉarmaĵoj sen suspekti, ke ili fakte estas... kontrabandaĵoj. Tiel, ŝi transpasigis ĉiuvojaĝe tri kilogramojn da tabako.

Du-trifoje ŝi trafis pli senindulgan doganiston, kiu deziris montri sian fervoron kaj, mirante pro ŝia tre dika brusto, intencis ŝin priserĉi. Sed Ĵermena ja sciis kian rolon ludi en tia situacio. Ŝi ŝajnigis indignon, sencede rifuzis sin lasi priserĉi, postulis ke oni enirigu ŝin en la oficejon kaj venigu kontrolistinon. Tia vikleco

imponis al la doganistoj. Por eviti la ĝenon venigi virinon, kiu plenumos ĉiujn tiujn tedajn manipulojn, ili ĉiufoje lasis Ĵermanan foriri sen plua insisto. Pro tiu kaŭzo, Ĵermana nur aŭdacis kiam ne ĉeestis la kontrolistino.

Tiun tagon, kiel kutime, ŝi jam iris por aĉeti tabakon - tri kilogramojn da « Richmond » - en la eta vendejo, tuj malantaŭ la oficejo de la belga doganejo, kiu situis je centoj da metroj de la limo. Enirinte la kuirejon de la vendistino, ŝi metis la tabakpaketojn sub sian korseton, platmasaĝis ilin proksime al siaj mamoj, kaj malantaŭe ĉirkaŭ la koksoj. Antaŭ ol eliri, ŝi longe rigardadis sin en spegulo. Ŝian ŝarĝon oni ne povis suspekti. Ĵermana aspektis nur iomete pli diketa.

Kontente, ŝi pagis sian aĉeton kaj eliris por reiri kun sia kamaradino, kiu atendis ŝin sur la trotuaro.

« Iru nun, ŝi diris. Mi sekvas vin. »

La amikino ekiris antaŭe. Cent metrojn malantaŭe venis Ĵermana. De fore, ŝi ne deprenis sian rigardon de la silueto de sia akompanantino.

La amikino alvenis antaŭ la francan doganejon. Ŝi haltis. Ĵermana vidis, ke ŝi senĝene parolas kun unu el la oficistoj, kaj ridante ŝi dume rigardis tra la fenestron en la doganejon. Kaj ŝi transpasis.

« He ! Ĵermana ! » iu tiam ekkriis.

Ĵermana returne rigardis. Ŝi rekonis maljunan virinon, kun kiu ŝi iam laboris.

- Nu... Kiel vi, Honorina ? ŝi demandis.

- Bone. Kaj vi ? Kio nova ? Kio pri Silvan' ?

- Ankaŭ li fartas bone. Nu, v' iras al Belgio, ĉu ?

- Jes, por paroli al mia filin'. Kaj kion vi faras nun ?

- Nenion ĉar Silvan' bone perlaboras. Sed pardonu, Honorina ! Mi devas ja rapidi. Kiam eblos, ni babilos pli longe, ĉu ?

- Bone. Salut' al via edz' !

- 'Stas konsentite !

Ĵermena plu paŝis. Sed antaŭ si, la amikinon ŝi ne plu vidis. La virino estis jam for. Ĉu ŝi faris la konvenan signon ? Tion Ĵermena ne povis diri.

Dum kelkaj sekundoj, ŝi hezitis. Ĉu la kontrolistino ĉeestas ? Ĵermena emis iri returne por alifoje reprovi. Ŝi tamen ekprenis sian decidon. Estus ja diabla hazardo, se la kamaradino sukcesintus halti, kliniĝi, malkaŝe religi sian ĝarteron kaj pluri antaŭ ol Ĵermena vidus ŝin.

« Eĉ ne duonminuton mi parolis kun Honorina », ŝi diris al si.

Ŝi maltime pasis trans la landlimo per fosto markita, kaj alpaŝis al la doganejo. Granda ŝnurego, streĉita per longa tabulo, estis ligita al du limŝtonoj el cemento kaj baris la pavimintan straton.

- Ĉu ion por deklari, belulino ? demandis la doganisto, iu Korsikano laŭ lia akĉento.

- Absolute nenion, respondis Ĵermena, malfermante la malplenan retsakon, kiun ŝi portis sub la brako por doni al si aspekton de trabutikonta dommastrino.

Ekvidante, ke la viro insiste rigardas ŝian nenormale ŝvelintan bruston, ŝi volis haste fini la aferon kaj pluri.

- He ! Ne tiom rapidu ! Ne tiom rapidu ! diris la viro, firmitenante ŝin je la brako. Kaj ĉu ne estas io tie ?

- For la manoj ! ekkriis Ĵermena, ludante indignon. Ne tuŝu min, ĉu ? !

- Bone. Eniru la oficejon. Oni tuj priserĉos vin.

- Nu, ja ne pensu, ke mi lasos min priserĉi de iu vir' !

- Ĉeestas la kontrolistino.

Ĵermena sentis sin kovrita de ŝvito. Ŝi estis kaptota. Estis la unua fojo. Ŝi sentis tiom fortan emocion, ke malgraŭ ŝia memfido de virino, kiu jam travivis multajn delikatajn situaciojn, ŝia vizaĝo

konsterniĝis. Tion ekrimarkis la doganisto.

- Nu, eniru, eniru do, li senpacience ordonis.

- Ne 'stas inde, Sinjor', ĉar mi ja diris, ke nenion mi havas.

Ŝi rigardis lin per petegaj okuloj, provante kortuŝi lin. Sed la viro ne lasis sin malfirmigi.

« Oni ja vidos. Nu, rapidu ! » li respondis.

Subite, Ĵermena lin vigle puŝis kaj tiel forte forpelis, ke li kontraŭvole sidiĝis sur la benkon kontraŭ la muro. Kaj ŝi ekimpetis direkte al la landlimo.

Belgio estis je nur malpli ol cent metroj. Se tiun limon ŝi trafos, ŝi estos libera.

« Virinaĉo ! » ekriis la doganisto.

Li tuj stariĝis, kursekvis Ĵermenan. Ŝi aŭdis malantaŭ si la obtuzan bruon de liaj ferumitaj ŝuoj.

Ĵermena estis facilmova kaj fortika. Ŝi distance antaŭis la doganiston ; je nur dek metroj al Belgio ŝi jam estis, kiam ŝi koliziis kontraŭ disigita pavimo, kaj falis. La viro reatingis ŝin. Sed ŝi jam plu kuris, sekvata tiom proksime de la doganisto, ke ties anhelantan spiron ŝi klare perceptis. Mano ekkaptis ŝian brakon. Sed ŝi atingis la limfoston, sin krampis al ĝi, plenforte kriegante : « Helpu ! Helpu ! »

Ĉeestis neniu. La kolerega doganisto ĉirkaŭtalie tenis ŝin. Per vigla skuo, li provis trudi ŝin delasi la prenon. Sed Ĵermena enprofundigis siajn ungojn en la foston, kroĉiĝis al ĝi kvazaŭ kato. Tiam la doganisto fortege pugnobatis ŝiajn fingrojn. Ĵermena malfermis la manojn. Kaj kvankam ŝi daŭre baraktadis, la viro kuntrenis ŝin en la doganejon.

Tie estis nur dua doganisto kaj la kontrolistino. Sen plu rezisti, el siaj korseto kaj jupo Ĵermena eltiris tri kilogramojn da tabako.

- Ĉu tio estas ĉio ? demandis la doganisto, kiu arestis ŝin.

- Jes, plorante respondis Ĵermena. Ne indas la pen' viziti min.

Tamen de la kapo ĝis la piedoj, ŝi devis lasi sin priserĉi de la kontrolistino. Dume, ferminte la pordon de la oficejo, la viroj iris sur la trotuaron...

- Nu, demandis la doganisto, kiam li povis reeniri la oficejon post la serĉado. Ĉu vi havas monon ? Ĉu vi akceptu mezarangon ?

- Kion mi devus pagi ? demandis Ĵermena, en kiu ekiĝis espero pro tiu propono.

- Nu, laŭ la tarifo, ĉirkaŭ ok - naŭcent frankojn.

Ĵermena sentis kvazaŭ ŝi falegas.

- Mi havas nur kvardek tri frankojn.

- Tiam, estas nenia solvo.

Ĵermena denove ploris, duone pro ĉagreno, duone por kortuŝi la doganistojn. Sed ili estis kutimiĝintaj kaj restis sensentaj.

- Kio okazos al mi ? ŝi demandis.

- Vi ja vidis. Nur atendu, ke alvenos la leŭtenanto.

Tiuj paroloj donis ideon al Ĵermena.

- Sinjor', ŝi demandis. Ĉu vi konas Lurĵon ? Lia nom' 'stas Dezire Lurĵo.

- De la movbrigado, ĉu ? Kompreneble !

- Bone. Nu, informu lin, ke Ĵermena 'stas arestita.

- Kiel tio povus interesi lin ? Ĉi li konas vin ?

- Jes. Avertu lin.

- Ne primoku nin, belulino. Lurĵo certe zorgas pri aliaj aferoj !

- Nu, aŭskultu. Tamen avizu lin. Por vi, ne 'stas malfacile, ĉu ? insistis Ĵermena, sentante ke la du viroj konfuziĝis. Vi ja vidis, ke li tuj alvenos.

La doganistoj rigardis unu la alian.

- Kial mia pet' ĝenas vin ? Ne 'stas granda help', ĉu ?

- Ba ! diris unu el la viroj, oni povas ja telefoni lin, ĉe la

movbrigado. Ni ja vidos.

Post unu horo, Lurĵo alvenis per taksio. Kiam la afero estis solvita, li kunprenis Ĵermanan al Dunkirko. Sed li ne liberigis ŝin. Li igis ŝin supreniri en lian oficejon, ĉe la sidejo de la movbrigado. Kaj malantaŭ ŝi, li ŝlisis la pordon. Li sidiĝis en sian lulfotelon. Nur tiam li alparolis ŝin. Ĉar depost lia alveno al la doganejo, kie ŝi estis arestita, li nek pridemandis eĉ nek rigardis ŝin.

- Al vi ja ne mankas aplomb', mia ulin', li diris. Tri kilogramoj ! Vi frezeziĝas, ĉu ? Vi opinias, ke doganistoj 'stas stultuloj, ĉu ?

Premita sur sia seĝo, Ĵermana denove ekploris.

- Kio okazas ? pludemandis Lurĵo. Vi 'stis senmona, ĉu ?

Ĵermana intencis respondi, sed plorĝemoj sufokis ŝin.

- La fiul' ! ekkriis Lurĵo.

Ĵermana levis la kapon, senkomprene.

- Kia fiul', jes ja ! rediris Lurĵo. Vi opinias, ke mi ne komprenis, ĉu ?

- Kion ? povis fine demandi Ĵermana.

- 'Stas via belaĉa Silvan', kiu devigas vin fari tian taskon. Li ne plu volas vin, mia ulin'. 'Stas nun lia piĉulin' de Furnes, kiun li volas. Kaj kiam vi 'stos en prizon', li 'stos libera kaj povos reiri tien for. Ĉu ? Nu, mi tut' ne komprenas, ke virin' kiel vi, sperta kiel vi 'stas, lasas sin tiel fari... Tamen, se tion vi dezirintus...

Li ĉesis paroli kaj kolere stariĝis. Tiam Ĵermana impetis al li, sin ĵetis en liajn brakojn, pasie.

- Jes, ŝi diris per disaj vortoj, interrompitaj de larmoj, vi rajtas. Li 'stas fiul'. Kaj mi stultulin', nu ! De semajnoj, mi laboregas kaj 'stas malfeliĉa kiel ŝton'. Li trudas, ke mi iru ĉien kun tabak'... Li trudas min fraŭdi je ĉiu doganej'... Oni centfoj' preskaŭ prenis min !... Mi ne plu havas ion por vesti min. Li elspezas la monon, la tutan monon, kiun mi perlaboras por li.

- Kaj 'stas por tia ul', ke vi rifuzis min, Ĵermana ! Tamen, kiu

pelis vin ĝis arest' ? Kaj kiu trovis solvon por l'afer' ?

- 'Stas vere ! 'Stas vere, Lurĵ' ! Mi malpravis. 'Stas vi pli bona ol li ; mi 'stos pli feliĉa kun vi... Tion mi bone komprenas nun. Nu, mi ŝatus, ke li ja forirus, ke oni arestus lin, ke dek jarojn li restus en prizon' !

- Tio ne 'stas malfacile ! Kiam vi volos, vi povos « doni » lin al mi. Mi ne maltrafos lin !

- Kaj tion mi faros ! Jes ja, tion mi faros ! Lin mi « donos » al vi ! Nu, sufiĉas, ke vi faru traserĉon, hodiaŭ aŭ morgaŭ, kiam vi volos. 'Stas nun en la kel' pli ol dudek kilogramoj da tabak'.

- Bone, diris Lurĵo. Nur silentu, ĉu ? Morgaŭ mi venos. Kaj mi dezirus, ke li ne lasu sin aresti. Oni ne maltrafos lin, ĉifoje. Por longe, vi 'stos liberigita je li, mia belulin'. Kun mi, vi 'stus feliĉa, sciu...

- Jes, multe pli ol kun tiu fripon' ! Li naŭzas min. Mi volus, ke li krevus ! Nu, Lurĵ', se vi daŭre deziras, ankaŭ mi bonvolas ! Tion li ege meritas : repagu al li !

Kaj Lurĵo repagis.

## DEK-SEPA ĈAPITRO

La tutan matenon de la sekvanta tago, Ĵermena montriĝis aparte nervoza. Ŝi ŝajnis atendi ion, kaj atente aŭskultis la plej mallaŭtan bruon.

Silvano fine miris pri tio.

- Kio okazas al vi ? li demandis. Ĉu io timetas vin ?

- Ne, diris Ĵermena, sed mi ne sentas min bone. Tiu hieraŭa afer' ja ĉagrenas min.

- Iam vi ne estis tiom nervoza, kontentiĝis respondi Silvano. Ne indas malkvieti : ĉio estas nun solvita.

Kaj li daŭrigis kalkuli siajn kontojn.

Ĵermena jam inventis por li specialan rakonton pri la hieraŭaj eventoj. Laŭ sia versio, ŝi estis arestita, priserĉita, kaj tenita unu horon en la doganejo. Sed, profitinte de momenta malatento de la doganistoj, ŝi sukcesis forkuri kaj rifuĝi en belgan teritorion. Ŝi tamen devis forlasi sian tabakon sur la tablo de la doganoficejo.

Sen ia malfido, Silvano akceptis tiun kredeblan klarigon. Kaj li rapide konsolis sin pri la monperdo, kiun konsistigis la forlasita tabako. Tri kilogramoj, ĉiu je dekunu frankoj, la tuto kostas nur tridek tri frankojn. Tio estos rapide regajnitita. De sia flanko, li ĵus faris bonajn negocojn. El la kvardek kilogramoj, kiujn li havis en tenejo, li jam liveris dudek kvin la antaŭtagon kaj sep tiun matenon. Nur ok kilogramojn li daŭre havis en sia kaŝejo, sub unu ŝtupo de la ŝtuparo.

Tio turmentetis Ĵermenan. Ŝi nun bedaŭris, ke ŝi informis Lurĵon. Ŝi tute ne sentis ian rimorson. Ŝi estis el tiaj virinoj, kiuj povas nur malami de kiam ili ne plu amas. Sed ŝi timis, ke Lurĵo koleros pro senutila veno... nur por tiuj ok kilogramoj da tabako ! Li verŝajne akuzos ŝin, ke ŝi primokis lin.

Eble, Silvano iros al la fraŭdestro por plu aĉeti kelkajn



kilogramojn ? Sed pri tio li ne parolis. Timante veki liajn suspektojn, tion Ĵermena ne aŭdacis konsili al li.

Silvano ĵus finis kalkuli sian enspezon, kiam, relevante la kapon, ŝajnis al li, ke li ekvidis ombbron pasi sub lian fenestron. Samtempe, bruas kvin fortaj batofrapoj kontraŭ la muron, kiu apartigas la domon de tiu de la dika Luiza.

Silvano eksaltis. Luiza certe vidis ion por tiel atentigi lin. Dum la Cezar-epoko, kvin batoj signifis : « danĝero ».

Fulmrapide, Silvano supreniris al la subtegmento. Ŝovante la kapon tra la klapfenestron, li rigardis en la straton. Li vidis doganistojn ĉe ĉiu stratfino. Fronte al lia pordo staris amaso da homoj en nigra uniformo. Inter ili, li rekonis Lurĵon. Pliaj homoj alvenis, pasis kun kurba dorso antaŭ lian fenestron, por ne esti videblaj de ene.

Silvano komprenis. Oni ĉirkaŭbaris lin. Tuj okazos traserĉo.

Li rapidegis malsupren.

« La negroj », li flustris al Ĵermena.

Li iris rigli la pordon, kiu donas aliron al la strato. Li malfermis sian kelon, malplenigis la kaŝejon, enŝovis la tutan tabakon, kiun ĝi enhavis, en grandan sakon. Tion li ĵetis surŝultren kaj kuris al la korto ; li metis eskalon kontraŭ la muron, kiu apartigas la korton de la eksteraĵo.

« Ĵermena ! », li alvokis.

Ĵermena alvenis. Ŝia paleco okulfrapis Silvanon.

- Kion vi tuj faros ? ŝi demandis.

- Fuĝi. Se ili frapos je la pordo, ne malfermu antaŭ ol mi foriros. Diru, ke vi estis supre do ne aŭdis ilin.

Kaj li supreniris la eskalon, jam preta superpaŝi la muron.

« Damne !... »

Starante ekstere, unu doganisto ironie mansalutis lin :

« Kiel vi, Silvan' ? Vi 'stas nun blokita, ĉu ? » li kriis.

Silvano sobiris kaj reeniris en la domon, ĝustatempe por haltigi kaj malantaŭen forpuŝi Ĵermanan, kiu estis malfermonta la pordon.

- Vi freneziĝas, ĉu ? li ekkriis.

- Oni frapis je la pordo, ŝi klarigis.

- Ĉu vi ne komprenis, kion mi diris al vi ?... Forprenu la kovrilon de la stovo.

Ĵermana obeis. Rapidege, Silvano amasigis la paketojn da tabako en la fajron. Kun ronko, la flamoj konsumis la sekan herbon.

Ĉe la pordo, ekbruegis fortegaj batoj.

« Dio mia ! Dio mia ! » Ĵermana ĝemis.

Febre, Silvano daŭre amasigis siajn paketojn en la stovon. Li denove sakris.

« Neniam ni sukcesos. Ĵermana, donu petrolon ! »

Ĵermana ne aŭdacis lin malobei. Ŝi alportis la kanistron da petrolo. Silvano iom abunde verŝis el ĝi en la stovon.

Tondre elŝprucis flamo, kiu evidentigis la palecon de Ĵermana kaj lumis sur la konvulsiajn trajtojn de Silvano.

Pli forte oni frapis je la pordo, kiu ekkrakis.

« Malfermu, en la nomo de la leĝo ! » unu voĉo kriis.

Ĵermana ekpaŝis al la pordo.

« Ĉu vi ja helpos min ? » ekkriis Silvano.

Kaj li trudis, ke ŝi ĵetu tabakon en la fajron, same kiel li. Sed la stovo estis mallarĝa. Malgraŭ la petrolo, la tabako daŭre brulis tro malrapide.

Tiam Silvano ne plu hezitis. El sia sako, li ĵetis teren la ceteron, ĝin abunde priverŝis per petrolo kaj fajrigis.

Tuj, forte ruĝiĝis la eta ĉambro, lumigita de ekflamanta

incendio. Kaj Silvano elverŝis la ceteron de sia petrolo.

« Li frenezas ! Li frenezas ! Li bruligos miajn meblojn ! »  
Ĵermena kriegis.

Pro la batoj, per kiuj oni forte frapadis ĝin, la pordo krakegis.

« Malfermu ! Malfermu ! » kriis furiozaj voĉoj.

Ĵermena impetis por malfermi. Per eksalto, Silvano tuj estis apud ŝi, retenis ŝian brakon tiom vigle, ke li piruetigis ŝin. Kaj, rigardante ŝin en la okulojn, parolante al ŝi kun kvieto pli timenda ol kolero, li ordonis :

« Restu ĉi tie, Ĵermena ! Mi scias, kial vi volas tiom haste malfermi. Sed se vi tuŝos la pordon antaŭ ol mi finos... »

Kaj super ŝin li levis manon, kiu kapablus dispreni ŝin.

Ĵermena ne plu moviĝis kaj restis tuj kontraŭ la muro.

Dume Silvano, kun sovaĝa mieno, kunpremitaj dentoj kaj severaj okuloj, rigardis forbruli la restaĵon de sia tabako. Li ne returnis sin malgraŭ la bruego de la doganistoj ĉe la pordo. Li eĉ ne plu zorgis pri Ĵermena. Li sciis, ke ŝi obeos.

Cetere, ŝi tiom timis lian koleron, ke ŝi ankoraŭ ne aŭdacis moviĝi, kiam ĉio estis forbruligita. Kaj estis Silvano mem, kiu malriglis la pordon kaj lasis la doganistojn eniri.

Kiel postulas traserĉo, ĉeestis la dogan-kapitano, leŭtenanto kaj subleŭtenanto, unu impostinspektoro, la polickomisaro kaj du doganistoj, inter kiuj Lurĵo.

« Eniru », kviete petis Silvano.

La tuta grupo eniris la fulmoplenan ĉambreton, haladzan pro laodoro de petrolo kaj tabako, kaj kie ŝvebis nigraj densaj fulgeroj.

« Jen kaptitaj ! » diris Lurĵo.

Silvano ĉarme klarigis :

- Mi bezonis longan tempon antaŭ ol malfermi la pordon, ĉar mi ĵus havis kamentuban incendion, kiun mi ja tre malfacile estingis.

- Aŭ ekbruligis, diris Lurĵo.

- Vi venas por traserĉo, ĉu ? daŭrigis Silvano sen reagi al lia pikŝerco. Nu, komencu. Vin mi rigardos !

Kaj li iris por malfermi la pordon al la korto, tiel kaŭzante fortegan trablovon, kiu forbalais fumon kaj cindrojn.

- Nu, kie ni komencu ? demandis la kapitano.

- Ne penindas serĉi, respondis Lurĵo. Ni ne plu eltrovos eĉ eron da tabako ĉi tie. Ne plu restas iu ero.

- Sed... kie ĝi estas ?

- Ĉi tie...

Lurĵo montris la cindrojn.

« ... kaj tie ! »

Li montris la lastajn fumtrenaĵojn.

« Ha ! Ha ! Ha ! mokridis Silvano. Vi certe ricevos belan ekstran pagon, kamarado, ĉu ? »

Kaj fronte al la doganleŭtenanto, li plengorĝe plu ridis.

- Nu, aŭskultu, Silvano ! diris la leŭtenanto kaŝante sian elrevigon. Mi ne komprenas vin. Tamen vi ne estas stultulo ! Mi miras, ke vi ne scias pli bone elturniĝi. Kion vi perlaboras, per tiu afero ?

- Tiom kiom vi ĉiuj.

- Nu, tute ne ! Ni perdas nenion. Sed via tabako forbrulis.

- Vi ne konsideras la plezuron, kiun mi havas pro primoki ĉiujn vin, precipe tiun « belan birdon », kiu jam antaŭĝojis pro sia revenĝo.

Lurĵo deziris respondi. La leŭtenanto signis, ke li silentu. Kaj li plu parolis :

- Eble. Sed post du aŭ tri pliaj amuzaĵetoj kiel tiu ĉi, ne plu restos al vi multe da mono, ĉu ?

- Estas mia afero.

- Konsentite. Sed, nu, mi scias, ke mi alparolas sinhelpeman personon, ulon, kiu bone scias pri kio temas. Ĉu vi estus preta labori kun ni ?

- Kun vi ?

- Jes. Ne estu idiota. Vi tre bone komprenas. Kaj vi ja konas valorajn informojn, ĉu ? Se vi bonvolos, vi multe perlaboros kun ni. Ni kundividos la premiojn.

Ĉiuj rigardis Silvanon.

- Nu, insistis la leŭtenanto. Oni lasos vin trankvila : vi senĝene kaj tute kviete laboros. Imagu, ke vi portas paketojn sub la brako, kiel burĝo, kiu promenas ! Estus por vi granda ŝanĝo, ĉu ne ? Kaj por tio, vi nur bezonos kuniĝi kun ni. Ne ĝenos vin farigi al ni belajn kaptojn, ĉu ? Kion vi diras pri tio ?

- Mi diras : ne ! respondis Silvano, rigardante Lurĵon.

Kaj tio estis tiom firma, ke la leŭtenanto ne plu insistis.

« Nu, diris la kapitano, estas malutile plu perdi sian tempon. Jen fiasko... ĉifoje ! »

La sep viroj eliris.

Sed sur la sojlo, antaŭ ol foriri, la leŭtenanto denove turnis sin al Silvano :

« Vi elektis. Tion vi bedaŭros. »

## DEK-OKA ĈAPITRO

Sian humiliĝon Lurĵo sukcesis konservi en si. Li estis el tiuj, kiujn atendado neniam malkuraĝigas, kaj kiuj scias pacience esperi bonan okazon. Li sciis, ke por li agas la tempo. Per la virino, li fine kaptos la viron. Dekfoje li jam ludis tian ludon. Li memoris, ke li neniam fiaskis.

Kiam li revidis Ĵermenan post la malsukcesa traserĉo, li faris al ŝi riproĉojn tiom malgrandajn, kiom lia kolero permesis al li. Ĉar fakte, li malfacile « digestis » tiun fuŝaĵon. Fidinte la parolojn de Ĵermena, li ekimpulsis la tutan komplikan maŝinon, kiun postulas traserĉo en persona domo. Kun plena memfido, li asertis antaŭ sia estraro, ke oni sukcesos belan prenon. Kaj jen fuŝis la tuta afero. Tial li iom perdis el la blinda fido, kiun liaj estroj metis sur lin. Fronte al Silvano, li denove travivis fiaskon, plian humiliĝon, pri kiuj li ne povis pensi sen ia obtuza furiozo. Kontraŭ la rivalo plu kreskis lia malamo, des pli vipata de la malkaŝa mokado de Silvano.

Sed Lurĵo havis nun fortegan atutan karton en sia ludo : Ĵermenan.

Tagon post tago, la virino pli korligiĝis kun sia amanto. Ŝi estis de li sorĉita. Ĉiujaŭde, ili kune rendevuis en la dormoĉambro, kiun por unu nokto ili luprenis de Sinjorino Johanino. El tie, ŝi eliris laca, kun la korpo elĉerpita de plezuro, sed ne sata - tute male : multe pli malsatega. Estis volupta diboĉado, reciproka konkero per la sensoj. Nuntempe, Ĵermena plu vivis nur en la fervora atendo de tiuj jaŭdaj posttagmezoj.

Ŝi estis tute kaptita de Lurĵo. Sur lin ŝi reportis la pasion, kiun ŝi iam sentis por sia edzo. Male, Silvano nun naŭzis ŝin. Lin ŝi malsimpatias, eĉ abomenis. Ŝi fine atingis malamon. Ŝi sentis en si venĝdeziron, ĉar li flankenlasis ŝin kaj eĉ postulis, ke ŝi laboru. Ŝi ja sentis, ke ilia repacigo nur ŝajniĝas, ke Silvano restas kun ŝi nur pro kutimo, ĉar li kondutas nun kvazaŭ korpo sen animo, kie ajn li

estas. Sed malantaŭ tiu fasado, apartigis ilin fosaĵo. Li ne plu interesiĝis pri ŝi. Plejsupre indiferenta li estis pri ŝi, same kiel pri ĉio ajn. Kaj tion ŝi ja sentis. Pro tio ŝi koleregis.

Ŝi donis sin al Lurĵo kun ekzaltiĝo, kiu enhavis tiom da malamo kontraŭ Silvano, kiom da amo por la doganisto. Kaj ŝi fine pelis Lurĵon, ke li incitu ŝian edzon ; ŝi provokis aŭ vundis lin, por pligrandigi la fortan venĝdeziron, kiun ŝi sentis en li, eĉ se tion li ne volis konfesi. Se eblus al ŝi denove perfidi Silvanon, ŝi tuj farus tion. La amo, kiun ŝi iam sentis por li, fariĝis furiozo, plena de abomeno kaj venĝemo.

Unu jaŭdan posttagmezon, ŝi alvenis la rendezvuon kun gajega mieno, tiel ĝojradia, ke Lurĵo tuj antaŭflaris novaĵon. Ŝi urgis lin, ke li supreniru en la dormoĉambron, kiu estis kutime rezervita por ili tiun tagon. Kaj tie, ne donante al si tempon por senvestiĝi, ŝi kuntiris Lurĵon sur la liton kaj sidiĝis apud li, kun radianta vizaĝo.

- Jen, mia karul' ! ŝi ekkriis. Ni ja tenos lin ! Ĉifoje, vi arestos lin !

- Ĉu Silvan' ? tuj komprenis Lurĵo.

- Jes !

- Vi havas novaĵojn, ĉu ?

- Multajn. Kaj interesajn aferojn. Vi baldaŭ sukcesos belan kapton, dank'al via karega virinet'. Ja vidu, kiom mi 'stas kontenta !

Lurĵo kvietigis ŝin. Li ne plu pensis pri amoro. Pli forte ol ĉio, lin reprenis liaj profesio kaj malamo al Silvano.

- Nu, rapide klarigu, li petis. Mi ne komprenas.

- Aŭskultu : morgaŭ vespere, Silvan' transpasos la landlimon.

- Kien ?

- En Ghyvelde. Inter la kanal' kaj la fervoja lini'.

- Tion li diris al vi, ĉu ?

- Jes. La fraŭdestr' venis al nia dom' por interkonsenti kun li. Mi

ja aŭdis ilin.

- Ĉu li 'stos sola ?

- Ho, ne ! Sesope ili 'stos !

- Ses ? !

- Jes. Ili transpasos per kamionet'.

Lurĵo fajfis.

- Jen malfacila task'. Kial do Silvan' prenos tian riskon ? Mi opiniis lin pli ruza.

- Sed kun ili 'stos unu doganist'.

Lurĵo unusalte levis sin. Nun li ja tute ne plu pensis pri amoro.

- Vi 'stas certa, ĉu ?

- Ja tutcerta. Ili transpasos, ĵus kiam tiu doganist' komencos sian deĵoron.

- Do, kial sesope ili 'stos ?

- Ĉar ili pasos tra la kampoj. Ŝajne, ili devos puŝi l'aŭton super fosaĵoj. Po mil frankoj ĉiu el ili havos por tiu afer'.

- Ĝi ja valoras tiom. Vi 'stas tutcerta, ĉifoje, ĉu ? Mi tute ne volas, ke okazos sama fuŝaĵ', kiel antaŭe !

- Plene certa ! Mi aŭdis ĉion.

- Mil diabloj ! ekkriis Lurĵo. Ĉifoje, mi kaptos lin !

Laŭlonge kaj laŭlarĝe, li paŝetis en la ĉambro. Lia ekzaltiĝo malpermesis, ke li restu kvieta.

- Nu, li plu diris turnante sin al Ĵermena, oni ja bezonos dekon da homoj, ĉu ?

- Mi samopinias.

- Jes. Kaj vi diris, ke ili pasos tra la kampoj, ĉu ? Bone. Oni faros embuskon. Kiu 'stas tiu doganist', kiu lasos ilin transpasi ?

- Lia nom' 'stas Leret aŭ Laret...

- Lorret ! Nu, kia fiul' ! Sed tio ne mirigas min, ĉar li havas



amatinon... Mi senmaskigos lin. Ĉe bona posten' li baldaŭ deĵoros, tion mi jam imagas. Kaj tucerte ili ĉiuj enkaptiĝos !

Subite vervega kaj agema, Lurĵo ĝoje revenis al Ĵermena kaj brakumis ŝin. Ĵermena kun feliĉo premis sin al lia flanko :

- Nu, post l'afer', kiel feliĉaj ni 'stos ambaŭ, ŝi diris.

- Jes ja ! Nenio kaj neniu plu tedos nin ! Mi volus, ke l'afer' jam komenciĝus.

- Kaj mi, ke ĝi jam finiĝus. Ho ! mi povos tiam pasigi tutan nokton kun vi !... Fakte, jam ĉi-nokte mi ne devos rapidi. Hodiaŭ, mi havas tempon.

- Kial ?

- Ĉar Silvan' foriris.

- Ĉu por fraŭdi ?

- Ne. Por serĉi Tom.

- Tom?

- Jes, sian hundon. Li sendis ĝin por tabak' hieraŭ, kaj oni ne plu revidis ĝin.

- Ha !... Via edz' ankaŭ faras tion, ĉu ?

- Jes. Ekde nia kverel', li rekomencis. Ĉar tiu 'stis la hund' de Cezar', Silvan' nun malkvietas. Li ŝatis ĝin.

- Ĉio baldaŭ finiĝos, diris Lurĵo. Nu, hop ! enlit' ! Ĉi tien ni venis ne por paroli pri doganaferoj !

Fakte, tuj post vespermanĝo, Silvano foriris por serĉi Tom.

La antaŭtagon, li estis kunpreninta ĝin al Belgio, esperante ties rehejmeniĝon ĉirkaŭ noktomezo, kiel kutime. Sed la hundo ne jam revenis.

Silvano multe malkvietiĝis. Neniam Tom malfruis je pli ol unu horo. Dresita hundo ĉiam rekte revenas al la domo de sia mastro

tuj post kiam oni ellasis ĝin. Kaj jam de longe Tom estis kutimiĝinta al tiu laboro. Oni povis facile veti, ke nun ĝia «kariero» estas finita.

Fraŭdanto neniam iras por serĉi sian hundon. Estus por doganisto tro facile lin atendi kaj aresti. Hundon, kiu ne revenas, oni lasu kaj forgesu. Oni ne plu parolu pri ĝi kaj tuj dresu alian. Sed por Silvano, Tom ne estis hundo kiel la aliaj. Jam de tro longe ili kune laboris. Plie, ĝi estis la memoraĵo kaj la heredaĵo de Cezaro.

Tial Silvano foriris per biciklo al Belgio.

Li unue iris al la nutraĵvendejo, kien li antaŭtage kondukis la hundon. La estro klarigis, ke li ellasis la hundon ĉirkaŭ la deka vespere, kiel kutime. Li montris al li la vojon, laŭ kiu la besto estis foririnta, tre fortika sub sia ŝarĝo.

Nenian kialon Silvano havis por dubi pri la homo. De ĉiam, ili kune laboris. Kaj oni konis Tom pro ĝia humoro. Ĝi ne estis tia hundo, kian nova mastro povus facile malsovaĝigi. La vendisto tute ne povintus pensi kaŝi kaj revendi ĝin.

Silvano do petis precizajn klarigojn koncerne la irvojon, kiun Tom elektis. Li poste reprenis sian biciklon por sekvi tiun direkton.

Li forlasis la vilaĝeton, antaŭeniris en la kamparon kaj laŭ mallarĝaj vojetoj ĉe la rando de la kampoj. Instinkte, sen ia gvidsigno, li direktis sin al la landlimo. Li strebis nur diveni la irvojon, kiun Tom certe preferintus sekvi. Li ofte revenis returne, celante ne preteratenti lokon survoje, kien la hundo eble paŝis.

Sen ekkonscii tion, li transpasis la landlimon, en tiu plata kaj nuda ebenaĵo, tiel malplena kiel la senlima ĉielvolbo, kiu kovris ĝin. Estis regiono, kiun oni nomas ĉi tie « les moères » (la marĉoj), kaj kiun la homoj malrapide ekprenis de la maro. Tiu tero konservas ankoraŭ iom de la grandeco kaj melankolio de sia mara pasinteco, pro sia dezerta nudeco, siaj monotone plataj horizontoj kaj samaspektaj areoj, kie la vento libere impetegas. Kampoj de

sekalo kaj aveno, kaj paŝtejoj partigas tiun ebenaĵon. La akvo, tiu malamiko, kiun oni devas sencese reteni, elŝprucas el ĉie, saturas la teron, sin lasas diveni tuj sub la sabla kaj malriĉa grundo. Sennombraj rojetoj limigas ĉiun ĉirkaŭbarejon, ricevas la akvon de defluiloj kaj dreniloj, dise plivastiĝas en marĉetoj, kie trinkas la brutaro. Ilin oni konjektas sub la ebena tapiŝo de la herbejoj, pro la viglaj vegetaĵoj - kanoj, junkoj, akvaj herboj - kiuj kreskas en iliaj fluejoj. Kaj trairante tiun regionon, oni miras vidi ĝin tiel dispecigita, ŝajne partigita per tiuj riveretoj kun rekta, geometria fluo, kruciĝantaj je ortangulo. Ili estas kvazaŭ vivanta kvadrataĵo desegnita de homoj por dreni la landon.

Tra tiu akva reto, Silvano antaŭeniris malrapide. Li estis tute sola. Ĉirkaŭ li, kun daŭra forto, la vento fajfis senĉesan kanzonon, kiu bruis en liaj oreloj. El lontano oni vidis ĝin alkuri, pro la senfina ondiĝo, kiu pasis kvazaŭ hulo sur la avenojn kaj herbojn. Pro tiu daŭra malmilda blovego, oni sentis la proksimecon de la maro.

Silvano transpasis la rojetojn sur tabuloj instalitaj ie kaj tie. Aŭ li ĵetis sian biciklon super tiujn ĉi antaŭ ol mem transsalti. Laŭ la akvoprofundo, li strebis malkovri la vadejojn, kiujn Tom preferintus. Ĉiufoje, kiam li vidis sur la ondo malproksiman makulon, li devojiĝis kaj alproksimiĝis por kontroli, ĉu ne temas pri lia hundo. Li iom post iom laciĝis kaj malkuraĝiĝis. Nuntempe li plu antaŭeniris en francan teritorion. Baldaŭ li nepre rezignos sian serĉadon, por ne esti videbla el la doganejo.

Ĝuste tiam, li ekvidis padon kvazaŭ desegnita tra la altaj herboj de ia paŝtejo. Iu certe paŝis tien antaŭ ne longe ĉar la kreskaĵoj ankoraŭ ne rektiĝis.

Silvano eniris ian vojeton. Li alvenis al vastigita areo, kie la surtretitaj herboj evidentigas, ke tie okazis batalo. Poste la pado fariĝis pli larĝa kaj tre konfuza, kvazaŭ pluraj homoj aŭ bestoj jam pasis tien.

Silvano plu iris... kaj tiam li retrovis Tom. La hundo surflanke

kuŝis. Ĝi ne plu havis sian nazon. Tion elŝiris dentmordo kaj ĝin anstataŭis horora truo. Dudeko da ŝiroj en la haŭto atestis, ke ĝi kuraĝe defendis sin antaŭ ol morti. Unu doganisto detranĉintis ĝian dekstran piedon por enspezi la rekompencan.

Dum momento, Silvano rigardis sian hundon. Li sentis akran ĉagrenon, pri kio li miris. Neniam li emis plori por iu ajn hundo. Se li havus ilon, li enterigus ĝin. Sed mane, tio tute ne eblis.

Antaŭ ol foriri, li denove rigardis Tom.

« Ĝi estis brava hundo », li elparolis.

Kaj li foriris, forlasante sian hundon en tiu senlima kaj trista ebenaĵo, kie loĝis nur la eterna ventoplendo...

## DEK-NAŬA ĈAPITRO

Tiun postan tagon, Silvano devis foriri al Belgio por tiu riska afero kun la aŭto. La fraŭdulo estis trankvile vestiĝanta en la kuirejo, kiam oni frapis je la pordo.

De post la traserĉo de Lurĵo, Silvano fariĝis singarda. Ĉiam, li riglis sian pordon. Li supreniris al la fronta dormoĉambro, kie Ĵermena ankoraŭ dormis, kaj li rigardis tra la fenestro. Dank'al lia kepo, li rekonis la policiston Julio.

Li scivolis, ja kion deziras la kamarado. Rapide, li malsupreniris por malfermi la pordon.

- Ĉu novaĵoj ? li demandis.
- Ĉu vi 'stas sola ? demandis la policisto.
- Jes. Eniru.

Julio eniris.

- Kio pri Ĵermena ?
- Ŝi ankoraŭ dormas.
- Vi certas, ĉu ?
- Mi ĵus supreniris.
- Nu, vi 'stas singarda. Vi pravas.
- Kial vi ne laŭte parolas ?
- Mi ne volas, ke ŝi aŭdu nin.
- Kiu ? Ĉu Ĵermena ?
- Jes. Mi aŭdis aferojn pri ŝi.
- Kiajn ?

Pro singardo, Julio kunprenis Silvanon apud la fenestron, kiu rigardas al la strato, malproksime de la pordo al la ŝtuparo.

- Ŝi havas aventuron, li flustris.

- Ĉu Ĵermena ?

- Jes, kapsignis Julio.

Silvano tuj komprenis.

- Kun kiu ? li demandis.

- Tion vi scios post nelonge. Tion mi diros al vi, nur se vi promesas esti prudenta.

- Vi opinias, ke mi 'stas knabeto ? Nu, rapide diru al mi pri kiu temas.

- Antaŭe, lasu min diri, kiel mi eksciis l'aferon. Tion diris al mi kamarado, alia policisto. Li daŭre iras al la drinkejo de Henriko, sciu. Kaj tute hazarde li eksciis, ke ĉiujaŭde ŝi supreniras en dormoĉambbron.

- Nun, mi komprenas, diris Silvano. 'Stas Lurĵo.

- Jes.

- Tion mi komencis konjekti ekde l'afer' de la traserĉo.

- Vi ne tro malkvietas pro tio, ĉu ?

- Kial mi malkvietus ?

- Nu... diris Julio, iom mirigita de la kvieto de Silvano. Ĉiaokaze, mi venis por antaŭdiri, ke vi malfidu. Tamen silentu pri ĉio. Komprenu, ke mi riskas mian postenon. Sed estu ja singarda, ĉar post nelonge ŝi rakontos viajn aferojn al la doganist' - eble ŝi jam faris tion... Kion vi mem faros nun ?

- Nenion.

- Ŝin vi tute ne riproĉos, do ?

- Jes ja. Eble pli malfrue. Nun mi prifajfas, komprenu min, amiko : Cezar' en malliber'... Tom mortinta...

- Mortinta ?

- Jes, dum la antaŭtaga nokto... Mi dezirus, ke tio ĉesus. Ĉio lacigas min.

- Silvano, vi devas reagi. Serĉu laboron, ĉesu fraŭdon, forlasu Ĵermenan.

- Ĉio tio nun finiĝis, Julio. Oni ne povas ĉiam rekomenci, ĉu ne ? Oni ne povas ĉiam rekomenci...

- Ne faru ian stultaĵon, ĉu ? plu diris Julio, malkvieta pro lia stranga mieno.

- Trankviliĝu, ridetis Silvano. Mi jam travivis pliajn malfacilaĵojn, kredu min ! Dankon, amiko. Vi 'stas bravulo, eĉ se policisto !

Je la sepa vespere, Silvano denove foriris al Belgio.

Post kvardek minutoj, li alvenis al la eta vendejo, kie la fraŭdestro jam atendis siajn homojn. Ĝi situis dek kilometrojn de la franca landlimo.

La rendezuo devis okazi je la oka. La veturilo jam staris antaŭ la pordo. Tio estis kamioneto Berliet, forta je proksimume du tunoj. Ĝi alvenis kun dokumentoj - franca atesto kaj tripaĝa licenco - ŝtelitaj en alia aŭto, kaj lerte falsitaj. En la vendejo troviĝis stakoj da paketoj jam preparitaj : tabak- kaj cigaredpaketoj, envolvitaj en griza fortika papero kaj firme ŝnurligitaj. Por ke ili okupu malpli da spaco, unu viro platigis la tabakon per ofica premilo ; dume, alia nombris kaj envolvis la paketojn.

Je la naŭa, ĉar aperis brumo, la fraŭdestro kontrolvokis siajn homojn. Ili estis ok ĉar, en la lastaj momentoj, oni opiniis pli saĝe kunpreni pliajn helpantojn.

« Ĉio iras glate », diris la fraŭdestro.

Li eliris por kontroli la senvivan straton kaj la ĉielon, kiu rapide malheliĝis.

« Neniu. Oni povas ŝargi », li diris revenante.

Li timis, ke eble iu « negro » hazarde vagante en Belgio interesiĝos pri tiuj pretigoj.

Sub lia kontrolo, la homoj rapide transportis la pakegojn en la

kamioneton. Silvano rimarkis, ke la aŭtorisortoj rapide subfleksiĝas.

- Kiom oni enmetos ? li demandis.

- Du mil ducent. Nun, ĉio estas ŝargita. Ni havas bonŝancon, ĉar ne 'stas lunlume.

- Kie ni estos ? demandis unu el la alvenantaj homoj.

- Du sur la tegmento. Kvar en la aŭto kun la tabak'. Silvan' estos tuj apud la ŝofor'. Ĉu la tabuloj 'stas sur la tegmento, Zidor' ?

- Jes, respondis la ŝoforo.

- Bone. Nu, he ! vi ĉiuj ! Atente aŭskultu Zidoron kaj faru, kiel li diros, se vi volas enpoŝigi vian monon !

Komuna grumblado signifis konsenton.

« Do, ni foriru nun. »

Ĉiu okupis sian lokon.

Zidoro startigis la motoron per krankturno. Li sidiĝis malantaŭ la stirilo, ekfunkciigis la unuan rapidumon kaj premis la kluĉopedalon. Kaj la peza aŭtomobilo ekveturis direkte al la franca landlimo.

Dum longa tempo, ili ĉiuj silente veturis. Pli-malpli, ĉiu sentis sian gorĝon kunpremita de ia emocio, kiam alvenis la momento por riski la aventuron. Feliĉe, en la aŭto, unu fraŭdulo estis kunpreninta botelon da rumo, kiun li disdonis al la aliaj, tiel gajigante ĉiujn. Necesis, ke Zidoro kolere ekkrii, por ke la du kamaradoj sur la tegmento ĉesu refrenon, kiun ili ekkantis.

- Ĉu ni 'stas tuj apud la landlimo ? demandis Silvano. Mi tute ne rekonas la lokon.

- Jes, respondis Zidoro. Neniam vi venis ĉi tien, ĉu ?

- Jes ja, sed mi iris trans la dunojn. Oni 'stas proksime de Furnes, ĉu ne ?

- Ne. Ĝi situas malantaŭ ni ; la kanalo 'stas maldekstre kaj la



dunoj dekstre.

Silvano instinkte rigardis returne, kvazaŭ en la mallumo li povus vidi la domon, kies memoro lin obsedis.

La kamioneto veturis laŭ mallarĝaj tervojetoj, ĉe la rando de rojoj, trans etajn lignopontojn. Ĝi haltis en kava vojeto.

- Ĉu paneo ? demandis Silvano.

- Ne. Oni devas atendi ĝis la unua. La doganist' deĵoros nur de tiam.

Unu post la alia, la homoj eliris el la aŭto. Ili sidiĝis sur la herbo kaj ekbruligis cigaredojn. La botelo da rumo estis rapide malplenigita. Oni gajiĝis kaj ŝercis, sed mallaŭte, senbrue, ĉar la landlimo ne estis malproksime. Eble iu doganisto povus aŭdi tiujn konfuzajn voĉbruojn kaj signali alarmon.

- Kioma horo estas nun ? demandis unu viro. Ĉu ni devos ankoraŭ longe plu atendi ?

- 'Stas noktomezo, diris Zidoro. Restas nur eta horo.

Li iris priserĉi sub la seĝo de la kamioneto, elŝovis ion, el kiu ŝprucis hela penikforma lumo.

« Silvan', venu lumigi al mi », li petis.

Kaj li levis la kapoton de la kamioneto.

Silvano enmanigis la elektran lampon, kies lumon li direktis sur la motoron. Per tuba ŝraŭbilo, Zidoro malmuntis la sparkilojn, purigis ilin kaj kontrolis la interspacojn de ties elektrodoj. Poste, li kontrolis la magneton kaj ties kontaktilojn. Fine, li provis startigi la motoron, kiu tre facile ekfunkciis.

Zidoro tuj haltigis ĝin.

- Nu, ĝi bone funkcias, ĉu ? ! li fiere diris.

- Jes !

- Nepras. Baldaŭ ni ja ne povos uzi la krakon !

Por plia sekuro, li ankaŭ verŝis kelkajn gutojn da benzino en la

kompresorojn - ĉar la malnova veturilo ankoraŭ havis tian sistemon. Poste, referminte la kapoton, ankaŭ li ekbruligis cigaredon.

- Ĉu ni estas malproksime de Francio ? demandis Silvano.

- Je kvincent metroj. 'Stas granda fosaĵo ĝuste sur la landlimo.

- Ĉu ponto ?

- Ne, ne 'stas ponto.

- Ni faros ĉirkaŭiradon, do ?

- Ne. Vi ja vidas, ke oni kunprenis tabulojn, ĉu ? Ponton ni mem faros. Poste, ni fulmrapidos tra la kampoj.

Sub la lumo de la elektra lampo, li rigardis sian brakhorloĝon.

« Kvaron' antaŭ l' unua. Mi tuj iros kontroli. Nu, vi ĉiuj silentu, knaboj ! »

Li malproksimiĝis direkte al la landlimo.

Silvano profunde spiris. Kiel okazis antaŭ ĉiuj danĝeraj aferoj, lia brusto estis nun premita. Ŝajne, li sentis malvarmon. Li iomete tremis. Fakte, tio malaperis tuj kiam ekiĝis la danĝero, sed li timis en tiu ĉi momento. Li preskaŭ bedaŭris sian partoprenon. En lian memoron revenis la paroloj de Julio. Ĉu Ĵermena perfidis lin ?... Li forpelis tian penson.

Rigardante la malhelan stelplenan ĉielon, li iom paŝis laŭ la vojo, kiun ili ĵus sekvis. Kontraŭ lia volo, tristaj pripensoj venis en lian menson. Premegis lian animon la senlima profundeco de tiu volbo senviva kaj abismo-nigra. Li sentis sin strange malgrandiĝinta. Por la unua fojo, li ekkonsciis pri la eta spaco, kiun li okupas inter tiuj aĵoj. Li ne plu komprenis, ke oni povas klopodi por zorgi pri afero tiel vana, kiel estas ekzistado. Fakte, ĉio tio gravis nur antaŭ liaj okuloj, ĉar temis pri li. Sed post li, same kiel li, kiom da homoj ankaŭ ĉesigos dum momento sian malesperan lukton kontraŭ neniigo ?... Kiom da ili plu observos tiun indiferentan ĉielon, kiu, de jarmiloj, senemocie ĉeestis la senfinan ripetadon de la sama dramo ?... Silvano estis nur

sensignifa epizodo... Kaj fronte al la universo, ne multe gravis lia suferado...

Alvenis al li obtuza fajfo, kiu eltiris lin el lia revado. Tiam li reiris al la aŭto.

Sub la ordonoj de Zidoro, la homoj jam estis malŝarĝantaj la tabulojn el la tegmento.

« Nu ! rapidegu ! Ja tempas ! » diris Zidoro, ekvidinte lin.

Silvano grimpis sur la veturilon kaj helpis la aliajn. La tabulojn, ili malsuprenigis kaj surteren aranĝis laŭ duobla vojo, tra la freŝplugita kampo, kiun la aŭto estis traveturonta. Sur tiun preparitan vojon, ili manpuŝis la kamioneton, kies motoro estis haltigita. Zidoro sidis malantaŭ la stirilo. Puŝis du homoj la antaŭajn radojn, du la malantaŭajn, kaj la aliaj ĉe la flankoj. En la nokto, oni aŭdis nur la krakojn de la tabuloj kaj la kurtajn anhelojn de la viroj. Trairinte la tutan longon de la tabuloj, tiujn ili levprenis por rearanĝi antaŭ la aŭton. Kaj ili denove puŝis ĝin.

Du-trifoje, la kamioneto forlasis sian vojon kaj profunde enŝlimiĝis en la grundo. Tiam necesis uzi dikajn stangojn el ligno por ĝin levi kaj eltiri el la glueca argilo.

Ili fine atingis la etan rojon, kiu formis la landlimon inter Francio kaj Belgio... Kaj tie, ili haltis. Sur la alia flanko, Silvano divenis la silueton de la doganisto.

« Bone ! Ekprenu la trajojn kaj kuŝigu ilin trae ! » ordonis Zidoro.

Ili levprenis kaj trametis la dikajn trajojn super la rojon. Sur tiujn, ili laŭlarĝe aranĝis la tabulojn. Ili tiom rapidegis, ke ĉiuj ŝvitis malgraŭ la nokta malvarmeto. Vestita per longa kapoto, la doganisto senmove kaj silente rigardis.

« Kia fiul' ! Sijajn mil frankojn li lukras pli facile ol ni ! » grumblis unu el la fraŭduloj.

Ĉiuj ridis.

Kiam la ponto estis preta, ili reiris al la kamioneto. Denove, ili

manpuŝis kaj ruligis ĝin malrapide sur la tabulojn. La traboj ekĝemis sub la ŝargô. Sed post kiam ĝi transpasis la duonon de la ponto, ne estis plu romporisko. La malplipezigitaj traboj malrapide rektiĝis. Kaj la kamioneto atingis la francan bordon.

Tie, ili estis sur firma grundo, ia herbejo el malaltaj kreskaĵoj, sur malmola kampo, kie la aŭto facile veturos.

Ĉirkaŭrigardante, Silvano ekvidis iom pli fore straton, kiun ili povos atingi sen obstaklo. La plej malfacila parto estis farita.

Dekstre, je cent metroj, ankaŭ nigra maso atentigis lin.

- Kio estas, tie for ? li demandis.

- Nenio, tiam respondis la doganisto, kiu unuafoje parolis. Estas ŝirmejo por la bovinoj, kiam pluvos.

Zidoro denove kunvenigis siajn homojn kaj diris :

« Vi ambaŭ levprenu kaj stakigu la tabulojn sur la belgan flankon. Oni venos repreni tiujn morgaŭ. Revenu post kiam vi finos tion. Silvan' kun Ludvik', dum momento vi helpos ilin. Ni atendos vin tie for, sur la bona vojo, pretaj por rapidege forveturi. La aliaj puŝu la aŭton ĉe ties postaĵo. Ni tuj metos ĝin sur la straton. »

Li iris preni la krakon en la kamioneto por startigi la motoron. Silvano jam estis transdononta tabulon al unu el la du fraŭduloj, kiuj atendis sur la alia bordo de la rojo. Ĝuste tiam, li aŭdis laŭtegan parolbruon. Li rigardis returne. Deko da homoj ĉirkaŭis la kamioneton. Ekestis furioza batalo.

Silvano tuj komprenis. Unu doganisto saltis sur lin - ĝuste tiu, kiu antaŭe lasis la aŭton transpasi, kaj kiu eble esperis nun simuli sian rolon en tiu afero, fronte al la kamaradoj. De sube, Silvano frapis lian makzelon per hoko<sup>18</sup> supren, kiu laŭvorte lin levis el la grundo kaj ĵetis malantaŭen, svenigita de la bato. Liberigita, Silvano impetegis en la miksbatalon.

Estis, ĉirkaŭ li, konfuza kirliĝo de brakoj kaj levataj pugnoj. Sur

---

<sup>18</sup> Hoko : pugnofrapo donita horizontale per fleksita brako.

la kapon li ricevis batojn, kiujn li redonis hazarde al aliaj. Proksime, li vidis Zidoron, kiu, per sia kranko, frapis la kranion de unu atakanto kaj kuris al la aŭto. Li ne plu vidis lin, sed tuj poste, la motoro ekbruis.

La batalo tiam fariĝis sovaĝa. Du kurtaj fulmoj kun pafoj. Unu homo ruliĝis teren tuj antaŭ Silvanon, kiu ne povis vidi, ĉu temas pri amiko aŭ malamiko. Instinkte, ĉiuj fraŭduloj alproksimiĝis al la kamioneto, la sola espero por fuĝi. Zidoro certe sukcesis preni la stirilon, ĉar ekestis forta grincado de dentradetoj nervozege endentigitaj. Unu homo dorse atakis Silvanon, alia kroĉis lian maldekstran brakon. Duonsvene batita de pugno pli peza ol martelo, tiu tamen eltenis la batojn, kaj kroĉiĝis al sia predo. Tiam helpe alvenis tria homo. Neeblis reatingi la kamioneton.

Malgraŭ ĉio, Silvano provis fari tion. Li kunigis siajn fortojn, kuntrenante la tri homojn, kiuj kroĉiĝis al li. Li fortege pugnobatis ilin. La motoro pli laŭte bruis. La aŭto ekmoviĝis. Dek brakoj vane etendiĝis por ĝin reteni. Ĝi estis veturonta.

Silvano terure eksaltis pro furiozo. Li ekprenis la orelon de tiu, kiu firme tenis lian maldekstran brakon, kaj li nerezisteble relevis lian kapon. Kaj, kun liaj falangostoj antaŭe, per frapo en kiun li metis sian plenforton, li pugnobate frakasis lian vizaĝon. La viro falegis. Hoko al hepato estigis strangan singulton el la dua homo kaj duonkurbigis lin, kvazaŭ rompita ĉe la korpomezo. Silvano estis impetonta malantaŭ la veturilon, kiam la doganisto sur lia dorso ekkaptis lian kolon de malantaŭe, kaj interrompis lian spiron.

Silvano haltis, strebis enspiri la aeron, kiu mankis al li. Tiam la kamioneto startis kaj forveturis.

Plia fulmo ŝprucis apud la aŭto. Unu korpo, kiu kroĉiĝis al ĝi, groteske rulfalis.

Ĉi tie, sur la landlimo, restis nur Silvano kaj du kamaradoj, kiuj daŭre bataladis. Silvano tuj estis ĉirkaŭita de kvar doganistoj. Malantaŭ li, tiu, kiu firme tenis lin, malstreĉigis sian

ĉirkaŭpremon.

« Kapitulacu ! » diris unu el la viroj, irante al Silvano kun mankateno enmane.

Obeeme, Silvano etendis siajn manartikojn al la kateneto.

Sed iu flankenpuŝis la doganiston.

« 'Stas mi, kiu arestos lin ! »

Kaj Lurĵo stariĝis fronte al Silvano.

En la miksbatalo, lin ankoraŭ ne vidis Silvano. Lia sango refluis al lia koro, per brutala fluo. Nova furiozo subite ŝprucis en li. Li retropaŝis, rifuzante prezenti siajn manojn al la mankateno de Lurĵo.

« Ne vi ! », li ekkriis.

Lurĵo antaŭeniris kaj intencis perforte lin mankateni. Plenforte frapante per sia dekstra pugno, Silvano frakasis lian makzelon.

Lurĵo kriegis. Li retropaŝis kaj faris rapidan geston. Tiam Silvano vidis en lia mano la flamon de revolvero.

La kuglo rekte trafis lian ventron. Tiun momenton, Silvano nur sensis ian brulvundon. Sed li daŭre sentis sian tutan forton en la brakoj. En lia cerbo fulmrapide pasis tiu penso, ke li nepre tuj agu, kiam li ankoraŭ povas. Li impetis al Lurĵo. Lin trafis dua pafo, kiu trapasis lian hararon. Li elŝiris la pafilon el la mano de la viro kaj premis ĝin sur lian frunton. Kaj la kranio de Lurĵo malfermiĝis, fendiĝis, elŝprucante sangajn karnpecojn. Silvano rigardis lin subenfali kvazaŭ malplena ĉifono.

Samtempe, kuglo ektranĉis lian orelon. Li rigardis returne, malplenigis la pafilon hazarde kaj vidis ombrojn fali ĉirkaŭ li. Per eksalto, forlasante la batalon kaj la du kamaradojn, kiujn li ne povis plu helpi, li transiris la rojon kaj enprofundiĝis en la nokton.

## DUDEKA ĈAPITRO

Tiom longe, kiom li povis kuri sen halti por reakiri la spiron, Silvano kuradis. Li transiris fosaĵojn, rekte trairis la kampojn, hazarde, nur celante malproksimiĝi de la franca landlimo. Li tiel iradis dum longa tempo, ŝajnis al li. Komence sendolora, la vundo nun suferigis lin.

Varma likvo elfluis el lia ventro laŭ la kruroj. Tamen, li plu paŝis, kun klinita kapo, same kiel oni rapidiras kontraŭ la vento. Liaj oreloj zumis, sed li ne sciis, ĉu estis pro la rapideco de la kurado aŭ pro la progresiva senforteco, kiu invadas lin. Kaj, ne konsciinte pri tio, li alvenis al la bordo de la kanalo inter Dunkirko kaj Furnes. Unuafoje, li tie falis.

Li flanke kuŝis dum longa tempo. La doloro kreskis en li kune kun lia malforto. Liaj pensoj ne estis plu tiel klaraj kiel kutime. Li sentis sin kvazaŭ en sonĝo.

Per granda peno, li koncentris sian atenton. Li troviĝis ĉe la bordo de la kanalo, en tute senviva loko. La ununura domo, kiun li konis, meze de tiu erikejo, estis...

Silvano eksaltis. En la estiĝanta brumo, kiu invadis lian cerbon, la nomo Paskalina subite ekstaris kvazaŭ savlumturo. Abunde revenis lia kuraĝo. Nova forto hardigis lin. Kaj li genuiĝis, relevis sin, iomete atendis, kaj poste li denove ekiris.

Li paŝis pli malrapide. Nun, li tute ne kapablis kuri. Li plu iris nur per granda fortostreĉo de sia volo. Ĉiu paŝo kostis al li suferadon. Li subpremis ekkrion pro doloraj reagoj en la ventro, kiam li stumbladis sur la herbo. Sed en la tenebro, sur la akvo li vidis la malhelan speguliĝon de ponto, kiu strekis la kanalon. Tion li rekonis. Subita esper-reveno kuraĝigis lin. Kaj li denove antaŭeniris, nun pli rapide, ĉar alproksimiĝis lia celo.

Sur la senhoma kaj nigra ponto, li devis apogi sin sur la parapeto. Malvarma ŝvito kovris lin. Frostaj ondoj kuris tra lia

korpo, elĉerpis liajn fortojn, forprenis lian tutan energion. Ŝajnis, ke liaj kruroj ne apartenas plu al li. Ili estis pezaj kaj moviĝis kun mallerta malrapideco.

Dum momento, li profunde spiris. Fulmdoloro boris lian ventron je ĉiu spiro. Sed malgraŭ la suferado, li daŭrigis, kontenta pro tiu doloro, kiu certigis lin, ke li ankoraŭ vivis.

Post momento, li rektiĝis. Per sia tuta volo, per sia tuta energio, li deziris denove ekiri, fari unu paŝon. La rigido de liaj muskoloj kaŭzis al li terurajn ŝirdolorojn. Li subite rimarkis, ke li ŝanceliĝas. Li timis fali sen konscii pri tio. Kaj li antaŭen kliniĝis, apogis sian manon sur la balustrado kaj iris plu. Li havis la impreson, ke li paŝas per mortaj kruroj, pezaj blokoj, kiujn li ne regas plu.

Trapasinte la ponton, li paŝis pluajn cent metrojn. Li fermis la okulojn, timigita vidi la kamparon kaj la ĉielon kirliĝi ĉirkaŭ li. La sango alfluis al lia kapo per grandaj doloraj puŝoj, kiuj resonis en li, kvazaŭ martelbatoj. Flamoj, sangaj lumbriletoj dancis antaŭ liaj fermitaj okuloj. Li trovis sin surtere, falinte sen rimarki tion. Kaj li kredis, ke ĉio finiĝis, ke li tuj mortos tie. Li tuŝis sian vizaĝon kaj sentis ĝin gutanta; li ne povis konscii, ĉu temas pri larmoj aŭ ŝvito. Tiam li teruriĝis, ĉar li timis morti.

Longatempe, li restis tie, kuŝante sur la grundo, kunigante siajn fortojn, regante la nekontroleblan vertiĝon, en kiu lia kapo estis kunprenata. Poste, li malrapide reprenis sian memregon; li ankoraŭ retrovis sian lucidan konscion. En lian menson revenis penso, kiu trankviligis lin. Li rememoris, kion iam diris al li maristo, kiun oni elmarigis senkonscia: « Mi scias kio estas, kiam oni mortas. Kaj estas tute ne grave. Kiam oni estas mortonta, kiam oni estas vere elĉerpita, tio tute ne gravas por vi. Oni estas sufiĉe kontenta, ĉar ĉio estas finita. » Silvano pripensis; en sia tuta estaĵo li sentis indignon, ribelon, nenomeblan hororon fronte al la neniigo. Kaj li ĝojis pri tiu vivdeziro, daŭre firma en si.

Malrapide, celante ne vekti tro akran doloron, li ŝovis unu manon



sub sian jakon, malfermis la bukon de sia pantalono, pasigis la fingrojn sub sian ĉemizon kaj, kun ega singardo, palpis sian sangogluecan ventron. Trafinte la vundon, li tremetis sentante, ke la sango daŭre elfluetas inter liajn fingrojn. De tie foriris lia vivo. Li premis sian manon sur la truon, retenis tiun elflueton. Kaj post plua ripozo, li sukcesis relevi sin, unue surgenuje, poste stare.

Li denove ekpaŝis.

« Necesas... Necesas... » li flustris al si mem.

Sed li ne povis plu vidi. Li antaŭeniris tra ruĝa nebulo. Estis kvazaŭ arda feraĵo brulus en lia ventro. Li duonflekxiĝis por subpremi tiun doloron, kiu torturis lin. Li ne povis plu spiri. Li paŝis kiel blindulo. Duonkonscie, li trairis nekohercan mondon, kie la neniaĵo enkorpiĝis kaj karambolis kun li, kie obstakloj subite estiĝis sen realo, sen ekzisto. Li vidis tion, kio ne ekzistis kaj ne vidis tion, kio ekzistis. Kaj li kredis, ke li daŭre paŝas ; li streĉis kaj kontrahis siajn muskolojn, dum li tere kuŝis jam delonge, ekde kiam li stumblis kaj rulis sur teramaseto.

Kuŝante sur la grundo, post tempeto li retrovis la konscion. Lia cerbo estis denove proviziita per sango, sekve revenis lucido. Li ree malfermis la okulojn, rigardis ĉirkaŭ sin kaj vidis teron, legomojn, ribuojn. Li estis en ĝardeno. Kun du vicoj de pirarboj ĉe la randoj, aleo malvolviĝis fore.

Unu momenton, per energia skuiĝo, Silvano sin apogis sur unu kubuto kaj rigardadis. Li rekonis la ĝardenon de Paskalina. Sen konscii pri tio, li estis trairinta la heĝon kaj falinta je kelkaj metroj de la domo.

Silvano lasis sin refali kun kvietiga suspiro. Li estis trafinta sian celon. Kun la okuloj direkte al la ĉielo, li kontemplis la komenciĝantan helecon, kiu blankigis la firmamenton. Eble estis la kvina. Post unu horo, Paskalina ellitiĝos, malfermos sian fenestron. Necesas atendi.

Baldaŭ tagiĝos. Kuŝante sur la dorso, Silvano komencis ekvidi ĉirkaŭ si la malhelajn siluetojn de la arboj, kaj, tuj apud siaj

okuloj, maldikajn herbvergetojn, kiuj balanciĝis pro la matena vento...

Li sentis malvarmon. Lin sufokis pli kaj pli granda premo. Li alarmiĝis : neniam li povos atendi ĝis la tagiĝo. Kaj li intencis starigi sin por peti helpon. Se li sukcesos trafi la pordon, li estos savota.

Li provis stariĝi, kaj tio donis al li strangan impreson. Krurojn li ne havis plu. Almenaŭ, ili ne plu obeis lin. Ili eĉ ne sentis plu malvarmon. Tiuj ĉi estis ja kvazaŭ ili ne ekzistus plu. Neniam li povus paŝi.

Li ekpensis, ke li almenaŭ povos voki, krei por helpo. Per granda peno, li turnis sin flanken, por fiksi sian rigardon sur la fenestron de Paskalina. Kaj li ekkriis :

« Paskalina... ! »

Poste, li atendis, kubutapoge.

Nenio moviĝis en la domo.

Silvano ekstremis. Liaj fortoj elĉerpiĝis. Necesis ŝpari ilin, se li deziris elteni unu horon pli.

Tiam li ree kuŝiĝis sur la grundo. Trempitaj de sango, liaj vestoj alpremiĝis al lia korpo. Kaj li ekpensis, ke li estas tute sensanga post tioma sangado. Li subite ekkonsciis, ke liaj okuloj ne vidas plu la fenestron. Li ne vidos tiun-ĉi, kiam oni malfermos ĝin. Grizaĉa nebulo alproksimiĝis al li, limigis lian vidon, kvazaŭ ĝi enmurigis lin en konfuza cirklo. Tio timigis lin. Li kunigis sian tutan spiron por krei :

« Paskalina... »

Sed lia voĉo ne estis plu aŭdebla.

Ĉirkaŭ li, la kamparo paliĝis. La ventblovo plifortiĝis. La herbo flustris ĉirkaŭ la kapo de Silvano, per lasta kareso tuŝetis lian vizaĝon. Lia dekstra mano daŭre tenis lian vundon fermita. Per la maldekstra, li palpis sian korpon sed apenaŭ sentis ĝin. Tiu bela kaj fortika maŝino jam ne apartenis plu al li. Kaj lia brako pli

peziĝis, kontraŭvole refalis ĉe lia flanko.

Tiam Silvano sciis, ke li mortos sen revidi Paskalinan. Kaj por la unua fojo, li sentis sin malbrava, li malespere ekploris.

Li volis krei plu. Sed li esprimis nur konfuzan kaj neaŭdeblan sonon. Lian buŝon obstrukcis ŝaŭma kaj sangogusta muko. Nun mankis al li la forto por elkraĉi tiun ŝaŭmon. Kontraŭ lia volo, kun gargarobruo ĝi eliris el lia gorĝo, fluis en ruĝaĉa salivo sur lia mentono, invadis lian tutan vizaĝon.

Cetere, plej supra indiferenteco eniris lin. Pli kaj pli malheliĝis lia menso. Ĉio ŝajnis al li konfuza, malproksima, ekster lia vivo. Ĵermena, Lurĵo, Cezaro, eĉ Paskalina, tiuj estis nur vortoj, fantomoj, kiuj malrapide fariĝis nebulaj en lia memoro. Li mem, Silvano, estis nur nenio, nesensiva korpo, sur kio li koncentris reston de agonianta lucido...

Li unuafoje svenis ; rekonsciinte, li rimarkis, ke li laŭte ĝemas kaj ne povas ĉesigi tiun gorĝobruon, kiun li spirante eligas. Cetere, tio ne gravis plu. Malrapide, li reiris al la konfuza stato de naskiĝonto, la sonoj estis nur nedistingeblaj rumoroj, la lumo nur malklara blankaĵo sur liaj pupiloj...

Lia animo mortis la unua. Kaj nenion li ekkonis pri la lasta dramo, kiu okazis en lia karno - pri la ankoraŭa sovaĝa lukto de lia estaĵo antaŭ ol ĝi reestiĝos materio...

FINO



